





VFRIN... O...
ESPERANCO... TYSKI...
SOCIETY... J...
GDANSKOTREK... IN...
...

V-19034/1961

SPOROŁA ĈINIO

1
1961

人民中國報道



BRILA BELO EL LA ĈIZILOJ

de

Novĉiniaj Skulptistoj

Supre maldekstre: La Kontraŭ-imperiisma Maj-30-a Movado de Ŝanhajaj Laboristoj kaj Studentoj en 1925 (Skulptita de Vang Linĵi por la Monumento al la Popolaj Herooj)

Supre dekstre: Prezidanto Maŭ Vizitas Kampananojn (Kolektive skulptita de anoj de la Lusin-a Belarta Kolegio de Nordorienta Ĉinio)

Sube maldekstre: Vivu la Popola Komunumo (Unu el la du samtitolaj kolosaj skulptaĵoj antaŭ la Agrikultura Ekspoziciejo en Pekino, skulptitaj de la supre menciita kolegio)

Sube dekstre: Unu el la kvar marmoraj bareliefoj prezentantaj la unuecon de nia patrolando kaj la unuiĝon de la ĉinaj nacioj (Kolektive skulptita de Fu Tianĉou, Vang Linĵi, Juan Hiaŭkin k. a.)



Antaŭenmarŝas Tutmondaj Popoloj

VERDA VOJO
ESPERANCKI KUNDOVARZYSK
SOCIETA ESPERANTO-LIGO
GDANSK-DYREKCYJA

Venis nova jaro 1961.

Tiun ĉi novan esperplenan jaron la popoloj de la tuta mondo renkontas en la plej bona situacio favora al paco, demokratio, nacia liberigo kaj progreso de la homaro.

Rigardu retrospektive ni unue la pasintan jaron!

La pasinta jaro 1960 estis jaro plena je bataloj kaj kolizioj inter fortoj progresaj kaj reakciaj. Por la popoloj de la tuta mondo ĝi estis jaro de grandaj venkoj. Por krei al si pli belan vivon kaj ankaŭ por defendi pacon, kontraŭi la agresan kaj militan politikon de imperiismo, la miliarda popolo de Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj, inkluzive la 650-milionan popolon de Ĉinio, faris senlacan kaj diligentan laboron. En tiuj landoj daŭre kaj prospere

disvolviĝis la nacia ekonomio, scienco kaj tekniko. Tio manifestis la senkomparan superecon de socialismo.

Antaŭ la fino de tiu jaro eliris el Moskvo la Deklaro kaj Alvoko al Tutmondaj Popoloj, kiujn subskribis la reprezentantoj de la komunistaj kaj laboristaj partioj el 81 landoj, kaj kiuj ricevis entuziasman aplaŭdon de la popoloj tra la tuta mondo. La Moskva Deklaro mem montras senkomparan potencon de la monda socialisma sistemo kaj ĝian rapide kreskantan internacian influon.

1960 estis jaro de senprecedenca alta tajdo de naciliberiga movado. De Pacifiko ĝis Atlantiko, de Karaiba Maro ĝis la Nigra Afriko leviĝis la popoloj subpremataj kaj sklavigataj. Dume la imperiismo kaj koloniismo estis ĉiam pli disfalantaj survoje al pereco.

Ni ĝojkrias pro la apero de 17 novaj sendependaj landoj afrikaj! Ni ĝojkrias pro la venko de la heroa naciliberiga batalo de la alĝeria popolo, persistanta jam por pli ol 6 jaroj! Kaj ni ĝojkrias pro la obstinaj bataloj, kiujn faras la popoloj de Kongolando kaj aliaj landoj en Afriko por defendi sian sendependecon!

Ni salutas la heroan kuban popolon! La venka disvolviĝo de la naciliberiga batalo de la kuba popolo kaj la lavange leviĝantaj bataladoj de la popoloj de Latinameriko kontraŭ la usona imperiismo estas brilaj historiaj eventoj de la popola batalo de nia epoko.

En Azio, eĉ en regionoj strikte regataj de la usona imperiismo ankaŭ senĉese kreskas fortoj de la popolo. En Japanio, Suda Koreio, Turkio, Suda Vjetnamio leviĝis lastjare sinsekvaj ŝtormoj de bataloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

La fortoj de la popoloj venkis tiujn de imperiismo. La fortoj de la paco venkis tiujn de la milito. La diverslandaj popoloj, kiuj amas pacon kaj liberon, nun formiĝas ĉiam pli vaste en unuecan fronton kontraŭ la agresa kaj milita politiko de la usona imperiismo. Ju pli kreskas kaj firmiĝas tiu ĉi unueca fronto, des pli ĝi povas malebligi la mondmiliton intencatan de imperiismo. Nia epoko ja antaŭenmarŝas ĝuste al tiu ĉi direkto.

Estas anticipeble, ke en la nova jaro la paca afero de la mondo rikoltos certe novan grandan venkon.

(Daŭrigo sur p. 9)

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro (66) 1961

Bildo sur la kovrilo — Sceno el la Filmo
Antaŭenmarŝas Tutmondaj Popoloj
Rondiro tra la Tutlanda Agrikultura
Ekspozicio

**Abundproduktaj Areoj — Prototipo de
Moderna Ĉina Agrikulturo**

Pompas Ĉie Ruĝaj Floroj

**Komuna Manĝejo sub la Lumo de la Penso
de Maŭ Zedong**

Elstara Ĝardenisto Laborema

Patrino kaj Filino

Brilaj Sukcesoj de la Ĉina Skulptarto

Kion Ili Faris por Ŝtalo

**Ricaĵ Literaturoj de la Naciaj Malplimulto
en Junnan-provinco**


Se Ne Ekzistus la Popola Komunumo

La nova filmo: "NIE ER"

Vegetaĵoj sur la Tegmento de la Mondo

Bildo sur la dorsa kovrilo — **La Fabriko Venas
Helpi la Kamparan Popolkomunumon**
(Novjara bildo pentrita de Ĝang Hiuŝan)

Rondiro tra la Tutlanda Agrikultura Ekspozicio



EN la orienta antaŭurbo de Pekino, aro da konstruaĵoj kun smeraldaj kaj orkoloraj tegoltegmentoj en ĉina tradicia stilo gracie staras en parkosimila pejzaĝo. Ambaŭflanke de la placo antaŭ la ĉefa konstruaĵo staras du kolosaj statuaroj. En unu el ili rajdas forta juna kamparano vigle tamburanta sur du impetantaj ĉevaloj ĉirkaŭate de figuroj reprezentantaj laboriston, kamparanon, komerclaboranton, studenton kaj soldaton. En la alia rajdas juna kamparanino cimbalanta, ankaŭ sur du impetantaj ĉevaloj ĉirkaŭate de figuroj de homoj sin okupantaj pri terkulturado, forstado, bestobredado, fiŝaĉo kaj aliaj flankokupoj.

Tiuj ĉi statuoj, celebrantaj la popolajn komunumojn kaj simbolantaj la 500 milionojn da ĉinaj kamparanoj antaŭen marsantaj per gigantaj paŝoj de antaŭensaltego, bonvenigas la vizitantojn al la Tutlanda Agrikultura Ekspozicio.

Tiu ĉi ekspozicio, kompletigita je la fino de 1959, servas kiel konstanta montrejo pri la atingoj de la ĉina agrikulturo. Terkulturistoj el la tuta lando venas al ĝi por vidi la progresojn akiritajn kaj pristudi novajn teknikojn de sia propra okupo. Dekmiloj da ekspoziciaĵoj alsenditaj el ĉiuj partoj de Ĉinio estas aranĝitaj en 11 salonegoj kaj unu subĉiela placo, kun tuta plankspaco de 28,000 kvadrataj metroj. La nuna ekspozicio donas kronikon pri la progreso de la ĉina agrikulturo sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio post la Liberigo. La plej okulfrapaj ŝanĝoj, kiel prezentite, okazis depost la komenco de la antaŭensaltego en 1958 kaj la fondiĝo de la popolaj komunumoj, kiuj ege rapidigis la disvolvon de la kamparaj produktfortoj.

En la unua salonego, kiun oni dediĉis por prezenti la ĝeneralan progreson en agrikulturo, unu

stando post alia montras la riĉaĵojn de Ĉinio en greno, kotono kaj ampleksaj sortimentoj de akvaj kaj arbaraj produktaĵoj; kampara industrio estas reprezentata de buntaj metiartaĵoj, porkonsumaj produktaĵoj, ŝtalo, instrumentoj kaj aliaj aĵoj el fabrikoj kaj produktaĵoj funkciigataj de popolaj komunumoj. Oni vidas, kiel bone prosperas, sub la popolkomunumoj, ne nur grenkulturado, sed ankaŭ forstado, bestobredado, fiŝado kaj aliaj flankokupoj.


De Mizero al Prospero

La stando pri la Gianming-a Popolkomunumo en Zunhua-gubernio, Hebej-provinco, montras, krom bonaj grenoj, ankaŭ arĝente brilajn silkkokonojn, rarajn drogherbojn kaj multajn aliajn aĵojn—signifantajn ne nur kvaliton sed ankaŭ sortimentan riĉecon de agrikulturaj produktaĵoj. Post tiu ĉi montraĵo estas historio tipa por multaj antaŭe deprimitaj regionoj. Estas malfacile por ni kredi, ke tiu loko iam estis mizera montvilaĝo plagita jaron post jaro de inundo, trosekeco kaj aliaj naturaj katastrofoj.

Nur de la jaro 1956, post la fondiĝo de la tute socialismaj agrikulturaj kooperativoj, tiu ĉi regiono, al kiu antaŭe ĉiam mankis greno, komencis produkti pli ol la loĝantaro konsumas. Depost la jaro 1958, kiam la 33 agrikulturaj kooperativoj unuiĝis en unu popolkomunumon, ĉiuj produktaj branĉoj rapidis antaŭen kiel konkursaj ĉevaloj. Fotoj kaj grafikaĵoj montras kiel la popolkomunumo sukcesis fari, en sia unua jaro, dank' al ĝenerala planado kaj plena utiligo de homfortoj kaj materiaj rimedoj, dekoble tiom da akvokonserva laboro kiom en la antaŭaj sep jaroj, altigis la meznombrojn grenprodukon po-muan* je 22

* Muo=6.666 aroj.

Jang Liven kaj Nimen Lusa



procentoj, kaj antaŭenpuŝis ĉiujn aliajn branĉojn de sia produktado.

Alia sekcio de la ekspozicio prezentas reliefe la grandajn ŝanĝojn en Hajling-insulo kuŝanta ĉe Liangjang-gubernio apud la suda marbordo de Guangdong-provinco, kie tajdonegoj tajfunoj kaj trosekeco ofte terure detruis la grenplantajojn. La fondiĝo de la popolkomunumo en 1958 ebligis al la loĝantoj pliigi la grenprodukon malgraŭ tio ke la vetero restis same malfavora. Bildoj prezentas la novan silueton de la insulo kun kamentuboj de

elektrejo, malgranda konstruejo de fiŝboatoj, kablo-fabrika, produktejo de fiŝkaptaj retoj kaj rizpri-laborejo. La akvoj ĉirkaŭ la insulo fariĝas bredejoj de fiŝoj, salikokoj kaj aliaj maraj produktaĵoj.

Vivece montriĝas en fotoj el Hajlung-gubernio en norda Hejlonggiang-provinco, kiel la komunumoj komencas mekanikigadon en la kamparo per siaj pli grandaj fondusoj. Havante nur tre malmulte da maŝinekipaĵoj en la komenco, la komunumoj aĉetis kelkajn traktorojn kaj motormovatajn terkulturilojn, kaj nun 70 procentoj de la grenkampoj de la gubernio estas prilaborataj per maŝinoj. Kaj dank' al utiligo de ili, la komunumanoj jam sukcesis pliampleksigi per 27,300 hektaroj la agron por grenplantado jam en la unua jaro. Tiamaniere la gubernio, kie la senprujna periodo estas mallonga, la tero vasta kaj la labormanoj malmultaj, jam unuapaŝe solvis la problemon de pliprodukto de greno.


Historiaj Ŝanĝoj

Speciala sekcio de la unua salonego prezentas kronikon de la grandaj historiaj ŝanĝoj okazintaj inter la ĉinaj kamparanoj. Okulfrapaj fotoj montras kamparanojn ĝoje bruligantajn terposedajn aktojn de bienuloj, kaj ĝoje celebrantajn en amaskunveno la agraran reformon en 1950-1952. Dum tiuj jubilaĵaj tagoj, 46,600,000 hektaroj da tero, granda nombro da dombestoj, terkulturiloj kaj domoj, apartenintaj al ekspluatantaj terposedantoj, estis distribuitaj al kamparanoj kiuj havis malmulte aŭ neniom da tero antaŭe.

Estas ekspoziciataj en ĝi ankaŭ deklaroj kaj decidoj de la Komunista Partio kaj la Popola Re-

Ekspozitaj objektoj kaj plakatoj en la Tutlanda Agrikultura Ekspozicio montras novajn pliproduktigajn aranĝojn desegnitajn en la "okpunkta konstitucio" por agrikulturo.

Foto de Vang Ŝunde



gistaro pri organizado de agrikulturaj interhelpaj grupoj kaj kooperativoj, kiuj gvidis la ĉinajn kamparanojn sin turni el individua terkulturado kaj surpaŝi la vojon de socialisma kolektiva agrikulturo. Tie prezentiĝas ankaŭ faksimilo de la fama raporto *La problemo de agrikultura kooperativigo*, farita de Prezidanto Maŭ al gvidantaj partianoj en julio, 1955, kiu levis la kooperativigan movadon ĝis nova alteco. Je la fino de 1956, 96.3 procentoj de la kamparaj familioj de la tuta lando jam partoprenis agrikulturajn kooperativojn, en kiuj la agroj fariĝis kolektiva posedaĵo. Alia historia foto montras jubilantajn homamasojn sub flirtantaj standardoj celebrantaj la fondiĝon de la unua popola komunumo en Ĉinio, la Sputnik-popolkomunumo, starigita en Henan-provinco en 1958.

Grenprodukto Altiĝis

Se vi turnas vin maldekstren de la ĉefsalono en la Salonon de Agroproduktajoj, vin bonvenigas

Vizitantaj terkulturistoj el ĉiuj partoj de la lando aŭde notas pri racia densa plantado de rizo.

Foto de Huang Ginta



giganta pavo kun disetendita bunta vosto el divers-specaj grenspikoj sur kiu estas skribitaj ciferoj prezentantaj la fakton, ke inter 1949 kaj 1959 la totala grenprodukto de la lando kreskis je 1½ obloj. Ankaŭ la meznombra po-mua produkto de tritiko, ĝenerale konsiderata kiel malaltprodukta grenplanto en Ĉinio, altiĝis konsiderinde. Tie oni povas vidi multajn novajn plibonigitajn speciojn de tritiko kaj rizo elkulturitajn en la lastaj jaroj.

Ekspoziciaĵoj ankaŭ montras, ke en la unua postliberiga jardeko, la tutlanda produkto de kotono kreskis je 4.4 obloj. Kaj la po-mua produkto de sensemigita kotono de 1959 kreskis je 1.5 obloj kompare kun tiu de 1949. Por tio ĉi multe kontribuis la strikta apliko de la teknikoj de la "okpunkta konstitucio" por agrikulturo: profunda plugado kaj plibonigo de grundo, uzado de pli multe da sterko, irigacio uzo de selektitaj semoj, racia densa plantado, plantprotektado, administrado surkampa kaj reformo de instrumentoj. Tiuj ĉi estas elmetitaj de Prezidanto Maŭ en 1958 surbaze de scienca studo pri la spertoj de ĉinaj terkulturistoj dum longa tempo.

Kelkaj eksterordinare sukcesaj produktoj en la ekspozicio montras, kion la ĉinaj terkulturistoj povas fari, kiam ili uzas ĉi tiujn teknikojn kun heroa spirito. Hebej-provinco ekspozas kotonplanton arbeidsimilan kun 2,292 fruktoj. La 2.7 metrojn alta *tritiko-reĝo* kun 375 spikoj estas elkulturita de kamparanoj en Gansu-provinco. Unu el ĝiaj plej grandaj spikoj surhavas 145 grajnoj. Liaŭjuan-a Popolkomunumo en Hinhua-gubernio, Hunan-provinco, elmontras 77.75 kilogramojn pezan grapolon da dolĉaj batatoj, kiu vidiĝas kvazaŭ nesto da grasaj porkidoj. Sin montras tie ankaŭ grandegaj maiz- kaj kolz-tigoj.

Akvo—la Vivlinio

"Akvo-konservado estas la vivlinio de agrikulturo" —tiu ĉi aserto de Prezidanto Maŭ altiras al si la atenton de la vizitantoj al la salonego dediĉita al tiusfera aktivado. Sub tiuj brilaj vortoj troviĝas granda mapo montranta kiel tiu vivlinio jam kreskis dum la unua jardeko de nova Ĉinio. Punktoj kaj linioj iluminitaj en koloroj prezentas la konstruadon de pli ol 60 grandaj akvorezervejoj —ĉiu kun kapacito de ĉ. 100 milionoj da kubmetroj—de 19 grandaj hidroelektrejoj kaj de granda nombro da kamparaj elektrejoj. Kompletaj irigaciaj sistemoj jam estas instalitaj al pli ol 4,000 grandaj areoj, kaj akvo- kaj tero-konservado estas efektivigita en grandega skalo en la serioze eroziitaj partoj de norda kaj okcidenta Ĉinio. Tio ĉi estas farita laŭ la politiko emfazanta akvo-konservadon por utiligo pli ol nura drenado, kaj akcentanta malgrandskalajn kaj de komunumo entreprenatajn projektojn, kiuj lastaj estas kombinitajn kun la mezgrandaj kaj grandtipaj.



Vizitantoj pririgardas projektomodelon de kampara popolkomunumo.

Foto de Giang Kiŝeng

La salonego montras ankaŭ la jungadon de la riveroj Huaj, Haj, la Flava, Jangzi kaj Perlo. Multaj modeloj vive prezentas al ni la grandiozan laboron faritan sur Huaj-rivero. Kun sia riverbuŝo ŝlimŝtopita de la Flava Rivero, kiu iam uzis Huaj-riveron kiel sian elfluejon, tiu ĉi rivero kaj ĝia sistemo de lagoj kaj branĉoj kovranta tri provincojn de centra Ĉinio, ofte estis unu el la plej grandaj inundminacoj en la lando.

Jam en la jaro 1950 Prezidanto Maŭ elmetis la alvokon: "Huaj-rivero nepre devas esti jungita." De tiam, la popolo de tiu regiono konstruis dekojn da grandaj kaj mezgrandaj valaj akvokonservejoj, pli ol dek entenejajn projektojn utiligante lagojn kaj malaltajn areojn kaj sennombrajn kluzojn kaj irigaciajn kanalojn en reformo, tiel ke la rivero estas grandparte jungita kaj la irigaciata areo multe etendita. Nun multaj partoj de tiu ĉi regiono antaŭe mizeraj, kaj alterne plagitaj de inundo kaj trosekeco, jam fariĝis prosperaj kun fekundaj kampoj, fruktarbaroj kaj sennombraj fiŝoj kaj anasoj en lagoj kaj akvorezervejoj.

Tiu ĉi salonego ankaŭ primontras la rimarkindan laboron faritan por reteni akvon en la montet-regionoj por ĝin rezervi kaj turni al irigaciado kaj samtempe preventi inundojn en la malaltaj landpartoj. Fotoj kaj modeloj bildigas la diversajn metodojn uzitajn en la vastaj loesaj altebenajoj de la provincoj Ŝanhi, Ŝenhi, kaj Gansu: teras-kampoj, "skvamkavoj" sur akutaj deklivoj, retoj de "vinber-grapolaj" fosajoj kaj lagetoj por enteni akvon en la altebenajoj, kaj serioj da forstozonoj. Ili estas faritaj en amasaj movadoj, kie akvoperdo kaj tererozio estis seriozaj. Dank' al la konstruo de teraskampoj kaj kulturo de forstozo-

noj, la pejzaĝo jam estas ŝanĝita en gigantan skulptitan verkon de arto.


Novaj Maŝinoj

Ĉe la enirejo de la Maŝina Salonego staras la ruĝa Dongfanghong (la oriento ruĝiĝas) — traktoro, produktita de la Unua Traktor-fabriko de Luoĵang. Ĝi estas nur unu el la multaj tipoj de traktoroj nun fabrikataj en Ĉinio. Montriĝas tie, en bonordaj vicoj, plugiloj, semiloj, rikoltiloj, irigaciaj maŝinoj kaj rizplantiloj. Multaj el ili estas por uzado kun traktoroj aŭ ĉevaloj, sed kelkaj estas projektitaj por esti kabloutrenado — malmultekosta rimedo de trenado unue uzita de terkulturistoj en Giansu-provinco kaj nun enkondukita ĉiuloke en Ĉinio. Ili funkcias per moveblaj kabloj sur vinĉoj, kiujn oni povas turni per forto de homoj, brutoj, vento aŭ elektro. Multaj el la aliaj maŝinoj nun liberigantaj la ĉinajn terkulturistojn de la peza fizika laboro, kiu estis ilia fatalaĵo por miloj da jaroj, estas pruvo pri la saĝo de la laboranta popolo liberigita, kaj la efikeco de la politiko de la Komunista Partio alvoki la amasojn por invento de novaj instrumentoj. La unuaj ĉinaj rizplantiloj, ekzemple, estas projektitaj de spertaj terkulturistoj kaj kamparaj metiistoj kun helpo de inĝenieroj.

Arboj Kreskas Pli Rapide

En la Arbarkultura Salonego, oni povas informiĝi pri la forstado farita sur 51,300,000 hektaroj da tero en la jardeko depost 1949. La areo forstigita en 1958

La riĉeco de ĉinaj akvoproduktajoj pro ĝiaj longa marbordlinio kaj sennombraj riveroj kaj lagoj estas montrita en la Salonego de Akvoproduktajoj. Tiuj ĉi estas vaste utiligitaj depost la fondiĝo de la popolaj komunumoj. La lokoj, kiujn oni ŝanĝis en bredejojn de freŝakvaj vivestajoj en 1958, kovras areon pli grandan ol tiu uzita en tiu produkto-branĉo depost ĝia komenco antaŭ la Liberiĝo. Motoraj fiŝboatoj kaj aliaj plibonigitaj ekipaĵoj por fiŝado kiaj nilon-retoj, esploraj instrumentoj kaj radiaparatoj, kiujn oni uzas por direkti produktadon, indikas la amplekson de granda teknika revolucio en tiu ĉi sfero.




Tiu ĉi 3.7 metrojn alta kotonarbeto kun 2292 fruktoj estas elkulturita de Hingi-a Popolkomunumo, Ŝulu-gubernio, Hebej-provinco.

Foto de Huang Ginta

kaj 1959 sola estas 90 obloj de tiu en la 35 jaroj antaŭ 1946!

Parto de la movado "verdigi la landon" estas la kampanjo por rapidigi la kreskadon de arboj. Ekspoziciaĵoj montras kiel vaste semitaj estas cedroj tra la sudaj provincoj por kontentigi la ekonomian bezonon de ligno. Dank' al elekto de la plej taŭga tero, intensa kulturado, selektitaj semoj kaj zorgema flegado al la arbidoj, la cedroj en multaj lokoj nun maturiĝas en nur dek jaroj, t. e. duono de la tempo ordinare bezonata. Eŭkalipto kaj melio (*melia azedarach*) — pli bone konata kiel la ĉina arbo — atingis plenkreskon en 5 ĝis 6 jaroj, kaj paŭlovnio (*paulownia fortunei*) kreskis ĝis la alteco de du homoj en nur iom pli ol unu jaro.

Materialoj en la Bestobreda Salonego vidigas al ni la rapidan disvolviĝon en tiu ĉi branĉo, precipe depost la popolkomunumigo. La totala nombro de dombestoj de nia lando kreskis je 42.3 procentoj inter 1949 kaj 1959. La nombro de porkoj pliiĝis je 2.1 obloj. Ne longe post la Liberiĝo, estis meznombro nur 3.9 porkoj por ĉiu cento da muoj da agro, sed en 1959 la cifero altiĝis ĝis 11.3 — kaj nun amasa movado por porkobredado celas altigi la meznombrojn ĝis 1 porko por ĉiu muo.



81 kg. peza beninkaso produktita de Longkan-ŝtatformo en Hebej-provinco.

Foto de Huang Ginta

Industrio venis al la kamparo nur post la fondiĝo de la popolaj komunumoj. Nun ĝia disvolvo fare de la popolaj komunumoj rapidigas la industriigon de la tuta lando kaj malpliigas la diferencon inter la urbo kaj la kamparo. En unu angulo de la unua salonego montriĝas produktaj el Lutun-komunumo en Gajpin-gubernio, Liaŭning-provinco, kiuj atestas rapidecon de tiu ĉi kresko. Antaŭ la apero de la popola komunumo, la gubernio havis nur unu solan metal-fabriketon. Nun ĝi havas fabrikojn produktantajn koakson, glimoprilaboraĵon, ĉ. 100 tipojn de malgrandaj kaj mezgrandaj terkulturaj maŝinoj, kemian sterkon, diversajn ledaĵojn kaj trikaĵojn.

Vivo Antaŭensaltanta

Ekspoziciaj materialoj en la unua salonego vive ilustris ankaŭ kiel ĉio ĉi tio ebligis antaŭensalton de la vivnivelo de la terkulturistoj. Unu foto montras la tutan posedaĵon antaŭliberiĝan de paŝtisto el Interna Mongolio nomata Bujanhesik: kaduka terkabanaĉo kaj kelkaj difektitaj potoj kaj vazoj. Tuj apude estas modelo de ĉambro en lia fortika nova domo. Sur la hejtlito sterniĝas dika lankovrilo en buntaj koloroj kaj kuŝas bonorde unu sur la alia kvar falditaj vatitaj litkovriloj. Sur la tablo sin trovas

radiaparato kaj horloĝo, kaj staras apude kudromaŝino.

Aliaj fotoj montras al ni scenojn pri la komunaj manĝejoj, infanvartejoj kaj hejmoj por respekto al maljunuloj, starigitaj de la popolaj komunumoj tra la tuta lando. Ankoraŭ aliaj emfazas pri la pli riĉa kultura vivo de la terkulturistoj. Ĉirkaŭ 80 procentoj de la gubernioj tra la tuta lando jam eliminis analfabecon inter siaj junaj kaj mezaĝaj loĝantoj, kaj popularigis la elementlernejan edukadon. Ekspoziciĝas kelkaj el la poemoj kaj pentraĵoj de terkulturistoj, kiuj aperis en gazetoj. Ili laŭdas la Komunistan Partion kaj la novan kamparan vivon, kaj esprimas diversmaniere la fidon kaj grandajn esperojn de la terkulturistoj pri la estonteco.

La grandiozaj atingoj en la ĉina kamparo en la pasinta jardeko, kiujn la Agrikultura Ekspozicio montras al ni, metis firman fundamenton por daŭrigi la antaŭensaltadon en la tuta nacia ekonomio. Nun la agrikulturo de Ĉinio, sub la tri ruĝaj standardoj de la Ĝenerala Linio por Socialisma Konstruado, la granda antaŭensalto kaj la popolaj komunumoj, antaŭen marŝas flugrapide al socialisma modernigo. Ankoraŭ pli da riĉeco kaj prospero certe estos alportita al la tuta popolo.

(Daŭrigo de p. 3)

Malgraŭ la obstinado de la usona imperiismo en sia agresa kaj milita politiko, dank' al la unuiĝo de la fortoj de la tutmondaj popoloj en senlaca batalado, la popolo nepre venkos, la imperiismo ĉiam pli falos en situacion izolitan kaj ĝia agresa kaj milita politiko nepre fiaskos.

En la pasinta jaro la ĉina popolo daŭre sekvis la Ĝeneralan Linion por Socialisma Konstruado kaj daŭre antaŭensaltegis en la konstruado de nacia ekonomio, kaj ĉiam pli firmiĝis kaj disvolviĝis la popolaj komunumoj en urboj kaj kamparoj. La ĉina popolo persistis kune kun la popoloj de la aliaj socialismaj landoj en la politiko de oponado kontraŭ imperiisma agreso, de subtenado al la revolucia batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo fare de la popoloj en la tuta mondo, de strebado al paca kunkuzistado de landoj kun malsamaj socisistemoj kaj de defendado de la mondpaco, kaj atingis jam grandan sukceson.

Kvankam la imperiistoj vane faris multajn incitojn por kaŭzi malkonkordon kaj subfosi la amikecon kaj solidarecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj, tamen stariĝis intimaj pacaj kaj amikaj rilatoj inter Ĉinio kaj vico da proksimaj najbarlandoj. Pli kaj pli oftigiĝas la amikaj vizitoj kaj ekonomiaj kaj kulturaj intersanĝoj inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Ke

niaj amikoj troviĝas en ĉiuj partoj de la mondo, ja estas fakto sunklare videbla.

Amikoj de la ĉina popolo, loĝantaj en ĉiuj mondanguloj, ĉiuj kunbatalantoj por paco, demokratio, nacia liberigo kaj progreso de la homaro kaj ĉiuj personoj kun bona volo! Pere de tiu ĉi revuo, ni sendas al vi je komenco de la nova jaro niajn plej bonajn dezirojn.

Ni unuiĝu pli intime por batalakiri la venkon de la mondpaco kaj novajn sukcesojn de la tutmondaj popoloj!



Abundproduktaj Areoj—Prototipo de Moderna Ĉina Agrikulturo

EN la lastaj jaroj leviĝis novtipa kampmastrumado kaj terkultura sistemo en la kamparo de Ĉinio, tio estas la sistemo de abundproduktaj areoj disvolviĝanta kun granda vivforto. Abundprodukta areo, por diri malmultvorte, estas kunigo de multaj malgrandaj terpecoj en granda areo, kie oni kulturis diferencajn plantaĵojn en diversaj parceloj dividitaj laŭ diferencaj grundoj. Kaj sur tiu areo oni kulturis intense kaj mastrumas science, por atingi la celon de grandkvanta abunda rikolto en la vasta areo. Tio estas la prototipo de moderna ĉina agrikulturo.

Frue en la tempo de agrikulturaj kooperativoj, responde al la alvoko de la Partio, multaj kamparaj kadroj jam komencis kulturis eksperimentajn kampojn, plejparte el kiuj akiris grandkvantan abundan rikolton. En la jaro 1958, post la efektiviĝo de popolkomunumo en la kamparo, la spertoj akiritaj en la eksperimentaj kampoj estis aplikitaj sur vastaj areoj kaj akiris same sukcesojn. Tiuj ĉi vastaj areoj abundrikoltaj estas nomataj “abundproduktaj areoj”.

Kun la disvolviĝo kaj firmiĝo de la popola komunumo, la abundproduktaj areoj disvolviĝis de malgrandaj al grandaj unuoj kaj de malaltaj al altaj formoj de mastrumado. En la jaro 1958 la abundproduktaj areoj unue formiĝis en partoj de la provincoj Henan kaj Hebej kaj en malgranda skalo, ĝenerale konsistantaj nur el kelk-dek aŭ kelk-cent muoj da tero kun malmulte da kapitala konstruado. Nun, la abundproduktaj areoj jam estas prove disvastigitaj en multaj lokoj de la tuta lando. Iuj el ili jam ampleksas kelkmil aŭ eĉ dekmil muojn, dume ilia kapitala konstruado ankaŭ eniris en novan etapon de kompleksa konstruado.

Nu, kiamaniere nun estas formataj abundproduktaj areoj en Ĉinio? Ĝenerale, antaŭ ilia stariĝo, ĝenerala plano estas farita pri la tero de la popola komunumo, kiu estas konsiderata kiel unuo. Divido de areoj estas farataj surbaze de la kondiĉoj de la loka topografio, akvo-utiliga oportuneco kaj kvalito de la grundo. Ne estas necese unuecigi la areojn en grandeco kaj formo. Tamen, interne de ĉiu abund-

produkta areo, la irigacia sistemo, sterko-centro kaj kampaj vojoj estas aranĝataj laŭ ĝenerala plano por atingi racian lokigon. Tiam, laŭ la plano, la apartaj malgrandaj terpecoj estas kunigitaj en unu vastan areon por ebenigo de kampeĝoj kaj plenigo de fosajoj. La seninterrilataj putoj, kaj akvokondukejoj estas kombinitaj en kompleta irigacia sistemo, kaj la zigzagaj kaj malglataj vojetoj estas nun transformitaj en rektaj larĝaj vojoj. Por faciligi kulturadon, la granda abundprodukta areo estas dividita en nombro da parceloj per irigaciaj kanaloj, kampeĝoj aŭ vojoj.

Eĉ en la montaj aŭ montetaj regionoj, malgraŭ la malebena surfaco de la grundo, establiĝas ankaŭ “abundproduktaj intermontoj” kaj “abundproduktaj monteĝoj” laŭ la sama spirito surbaze de la principo de akomodigo al la lokaj kondiĉoj. En tiuj areoj, oni prenas sintezan paŝon por malhelpi tererozion, kondukis akvon sur monteton aŭ konstruis akvokonservajn kavojn por irigacia celo, kaj sam-nivelis altaĵojn kaj malaltaĵojn por ŝanĝi la montojn en ŝtuparkampojn kaj la intermontojn en teraskampojn.

Post tiuj paŝoj multe ŝanĝiĝis la topografia fizionomio de la tero. Tiel, ekzemple, en Anguo-gubernio, Hebej-provinco, post du-jara klopodo, jam establiĝis pli ol 200 abundproduktaj areoj de granda, meza kaj malgranda tipoj. La suda parto de la gubernio formiĝis abundprodukta zono de tritiko, longa je pli ol 50 km., kun amplekso de 100,000 muoj. Kaj la norda parto fariĝis grandega kotona plantejo kun egala grandeco. En diversaj direktoj formiĝis dekunu abundproduktaj zonoj, kun malsamaj plantaĵoj. La tutaj 800,000 muoj da kampoj de la gubernio jam estis envolvitaj en abundproduktajn areojn. Efektiviĝis ke ĉiuj kampoj interligiĝis en abundproduktaj areoj, kiuj kuniĝis unu kun alia kaj entenas grandaj la malgrandajn, kaj ke kanaletoj interplektiĝis rete kaj landvojoj kondukiĝas ĉiudirekten, tiel ke la tero aspektas kiel granda ŝaktabulo.

La abundprodukta areo, kiel nova formo de socialisma agrikulturo, montris sian superecon en multaj rilatoj, tuj jam de sia apero. Dank’ al vasta stablo de abundproduktaj areoj en 1959, la greno-produkto de la supre menciita Anguo-gubernio, Hebej-provinco, kiel ekzemple, antaŭensaltis ĝis 400 kg. po muo meznombro, kun plimultiĝo de 35.3% kompare kun tiu de 1958, la jaro de granda antaŭensalto. En 1959 la tuta surfaco de abundproduktaj areoj okupis 25% de la totala kulturita surfaco de la tuta provinco, sed ilia rikolto okupis 40% de tiu de la tuta provinco. La rikoltoj de abundproduktaj areoj en ĉiuj gubernioj estas senescepte pli altaj ol tiuj de la ordinara kampoj, iuj je kelkdek procentoj,

aliaj je pli ol unuoblo. La fakto montras, ke la abundproduktaj areoj malfermas novan vojon al rapida disvolvo de la agrikultura produkto.

La kaŭzo de tio, ke la abundproduktaj areoj povas rapide plimultiigi agrikulturan produkton, kuŝas en la fakto, ke dank' al ĝi la "okpunkta konstitucio" de agrikulturo povas esti tute kaj sisteme efektiva.

En la pasinteco, sub la kondiĉo de disigitaj terpecoj, malgraŭ tio ke estis elmetitaj la postuloj pri profundeco de plugo, denseco de plantaĵoj, kvanto de sterkado, normo de irigacio k.t.p. en kulturado kaj mastrumado, malfacilaĵoj tamen ekzistis por plene kaj laŭnorme plenumi ilin. Post establiĝo de abundproduktaj areoj, la situacio tute ŝanĝiĝis. La limoj de malgrandaj terpecoj hereditaj de et-kampana ekonomio, estas forviŝitaj komplete. Tiuj malgrandaj terpecoj estas kunigitaj en vastajn areojn. Kune kun plibonigo de la grundo kaj divido en areoj, la plantado laŭregiona konforme al lokaj kondiĉoj pli efike ebligas la utiligon de la produktiveco de la tero. Abundprodukta areo havas sian kompletan irigacian sistemon, kiu garantias ĝustatempan kaj efikan akvumadon. En ĝi estas starigita porkbredejo, kiu

kreis faciligan kondiĉon por pliigi la sterkadon. En abundprodukta areo estas bazo de bonaj semoj, kiu zorgas pri selektado, kulturado kaj disvastigo de bonaj semoj. Samtempe estas eble racie kreskigi altajn kaj malaltajn plantaĵojn kaj aranĝi rotacion de plantaĵoj

Kaŭze de la fakto ke abundproduktaj areoj estas sufiĉe vastaj, kaj la plantaĵoj en ĉiu estas sufiĉe unuecaj, tio plifaciligas la formadon de diversaj specialaj produktbrigadoj. Tiamaniere ĝi ne nur ebligas ĉiun membron de la popola komunumo labori konforme al sia aparta kapablo, sed ankaŭ helpas en levado de kultura tekniko kaj renovigo de kulturaj instrumentoj

La sistemo de abundprodukta areo provizas kondiĉojn por mekanika terkulturado. La fakto, ke multaj malgrandaj terpecoj estas nun kunigitaj en unu grandan areon, malpliigas la tempon uzatan en returniro, turniĝo kaj transiro de unu kampo al alia de traktoroj, kaj plialtigas ilian laborefikon. La kreskigo de samaj plantaĵoj en vasta areo, plifaciligas, cetere, la uzadon de maŝinoj en interplugado, insektoekstermado kaj rikoltado. Plue, pro la unueco de plantaĵoj sur la vasta terpeco, la tempo por akvumado

Dekmil-mua altprodukta kotonkampo de la popolkomunumo Orienta Vento de Anguo-gubernio, Hebej-provinco.

Foto de Ki Guanŝan



aŭ drenado estas sama, kaj la postulata laborkvanto granda, kio faras la uzon de maŝinoj ebla kaj necesa.

Abundprodukta areo estas ne nur loko por produktado, sed ankaŭ bazo por teknika reformo kaj scienca esplorado. Por pli bone ellerni la leĝojn de kreskado de agrikultura produktado, en multaj lokoj disvolviĝas teknika studado kaj scienca esplorado de la amaso en la abundproduktaj areoj. Sciencesploraj grupoj, konsistantaj el kadroj, teknikistoj kaj spertaj terkulturistoj, faras eksperimentadon kaj esploron, kaj samtempe resumadon kaj disvastigon de iliaj spertoj. En multaj lokoj establiĝis ankaŭ meteorologiaj stacioj, observejoj de malutilaj insektoj kaj plantmalsanoj, teknikaj centroj, arkivoj pri kreskado de la plantaĵoj k.t.p. en la abundproduktaj areoj. Ĉiuj ĉi tiuj establaĵoj estas en intima kunlaboro kun la regulaj sciencesploraj organizaĵoj. La specialistoj sin okupas je esplorado sur la bazo de praktikaj spertoj de la amasoj, kaj la amasoj siavice laboras kaj studas sub la gvidado de la specialistoj. Tiamaniere, sciencoesplora agado de la amaso povas unuiĝi kun tio de la agrikulturaj specialistoj, kiuj povas siavice intime kontakti kun la amasoj, kaj kombiniĝis la agrikultura scienca teorio kun la praktika produktado, kaj la eksperimentado kaj esplorado kun ĝeneraligo kaj disvastigo de nova tekniko. Ĉio ĉi tio malfermas novan vojon por la agrikultura scienco.

Establiĝo de abundproduktaj areoj ankaŭ akcelis la ĉiuf flankan disvolviĝon de agrikulturo, forstado, best-bredado, fiŝado kaj flankaj okupoj. Nun la abundproduktaj areoj estas ne nur loko por agrikultura produkto, sed ankaŭ mastruma unuo pri diversaj okupoj. En kelkaj abundproduktaj areoj oni utiligis la virgejojn aŭ malfekundan grundon por starigi porkejojn, ŝafejojn kaj ĉevalejojn, en iuj lokoj oni fondis monton de dek mil kokoj, akvokonservejon de dek mil anasoj kaj plantejon de dek mil fruktarboj. En iuj lokoj oni starigis fiŝlagetojn, kaj plantis arbojn apud nove konstruitaj vojoj kaj irigaciaj kanaloj. En abundproduktaj areoj la samtempa entreprenado de la kvin fakoj de produktado — agrikulturo, forstado, bestbredado, fiŝado kaj flankaj okupoj ebligas interakceladon, ĉiuf flankan pliproduktadon inter la kvin fakoj, kaj samtempe multe ŝparas laborforton.

La amasa movado de vasta stablo de abundproduktaj areoj ŝanĝis ne nur la naturan kaj ekonomian fizionomion de la kamparo, sed ankaŭ la spiritan fizionomion de la homoj mem. Ĉar la sistemo de abundprodukta areo estas senprecedence pli grand-skala kaj plialta formo de kolektiva mastrumado ĝis nun en la kamparo, ĝi necesigas radikalan ŝanĝon de la sistemo kaj kutimo de kulturado de la disigitaj mastrumoj de la pasinteco. Tio helpas al kamparanoj efike venki sian ideologian postrestaĵon de etkamparana ekonomio, kaj pliapaŝe altigi sian kolektivisman penson, organizitecon kaj disciplinecon. La

grand-skala konstruado kaj riĉa rikolto rezultintaj el la abundprodukta areo plue liberigos la penson de kamparanoj, kaj plue altigas ilian grandan heroan aspiron ekkoni, reformi kaj superregi la naturon.

La popola komunumo malfermis larĝan vojon por la abundproduktaj areoj, kaj la establiĝo de abundproduktaj areoj siavice kreas ankoraŭ pli favorajn kondiĉojn por plifirmigo kaj disvolvo de la popola

Li Hianjaŭ:



Pompas Ĉie

Skizo pri la kampanjo de teknik

EN iu karbobutiko en Pekino ekfunkcias elektra maŝino nove farita de la laboristoj mem por rul-fabriki karbobulojn¹. Iu maljuna laboristo ĝoje venas al sia ĉiutaga laboro kunportante poton kun fajroruĝa floro.

BRILA REZULTO EL MIRINDA PENIKO

Foto de Luo Hiaŭjeng



komunumo. Kiel supre dirite, la abundproduktaj areoj ne nur akcelas ĉiuf flankan disvolviĝon de produktado, sed ankaŭ multe ŝanĝas la fizionomion de la homa penso. Samtempe, prezentiĝas al ni malproksima perspektivo, ke plua disvolviĝo de la abundproduktaj areoj certe rompos la limigon de produkta brigado kiel mastruma unuo, kaj, paŝon post paŝo, tiu disvolviĝo al pli grandskala kolektiva mastrumado.



Ruĝaj Floroj

revolucio en pekinaj produktaj frontoj

“Per tiu ĉi sama florpoto” li diris ridante al junuloj, “mi faris karbobulojn jam tra la duono de mia vivo, kaj pro tio miaj brakoj ĉiam sentas doloron dum nuba vetero. Sed nun la maŝino faras karbobulojn anstataŭ ni, sufiĉas, ke ni nur ekpremas la elektran butonon. Tiel bela afero neniam okazis eĉ en sonĝo. Jen mi plantis belan floron en tiu ĉi nigra florpoto ĵus liberigita el karbokoto por ĝin dediĉi al nia grandioza Partio kaj nia kara Prezidanto Maŭ.”

Nun tiu ĉi karbobula laboristo kaj liaj kolegoj provas krei ankaŭ fermitan aŭtomatan linion por karbobula produktado.

“Ni hieraŭaj karbnigruloj, laboros morgaŭ en blankaj bluzoj!” Jen la romantikaj versoj de la karbobulaj laboristoj, kaj ankaŭ ilia celo de la teknika revolucio daŭrigata.


La Partio gvidis la popolon al revolucio kaj la popolo renversis de sur sia kapo la tri grandajn montojn — la imperiismo, la feŭdismo kaj la burokrata kapitalismo. Nun la Partio denove gvidas la popolon al teknika revolucio alte tenante la tri ruĝajn flagojn² por forigi de iliaj ŝultroj ankaŭ la pezan montegon de korpolaro. Ne nur la karbobulofaristoj povas planti florojn en la potoj antaŭe uzataj por ruli karbobulojn, sed ankaŭ la marteloj de la forĝistoj, la portvektaj de la transportistoj, la ŝtonaj grundfirmigiloj de la domkonstruantoj ktp. estas survoje al la muzeo same kiel rikŝo. Nun Pekino estas travivanta novan “industrian revolucion”, travivanta grandan kampanjon de marksism-leninisma teknika revolucio por la urba kaj kampara ekonomio. La bravaj fortikuloj antaŭe ĝibigitaj sub la pezaj portvektaj ekde nun rektigas sian talion. Ili ekveturigas mekanikajn veturilojn kaj manipulas arganojn. La transportistoj ekkantas la

unuan triumfan kanton de teknika revolucio por prikanti sian duan liberiĝon per voĉoj ĝis nun kutimiĝintaj nur al haj-haŭ-krioj!

La kampanjo de teknika revolucio en Pekino jam ne estas maloftajo kiel malmultaj peonioj antaŭ la Altaro de Tero kaj Greno³, sed ĝeneralajo kiel la sofroraj (*sophora japonica*) floroj aromantaj ĉie tra la stratoj kaj vilaĝoj. De la Fer-ŝtala Kompanio en Ŝigingsan ĝis la Tondilfarejo de Vang la Variolulo⁴, de la karbmina ŝakto de Mentoŭgoŭ ĝis la konstruejo de Mijun-akvrezervejo, de la magazenoj ĝis la bankoj, ĉie disfloras la teknika revolucio kvazaŭ floroj post tutnokta printempa pluvo. La ministoj forjetis siajn ŝovelilojn kaj ekuzas ŝovel-maŝinon. La laboristoj de tondiloj ankaŭ forjetis la martelon kaj ekuzas pneŭmatikan martelon. Depost la ekcirkulo de monbiletoj la unuan fojon aperas la kuriozajo, ke oni nombras biletojn ne permane. Ĉe la domkonstruejoj de la ĉirkaŭurbo oni jam ne plu vidas la skafaldojn similajn al vintra arbaro, nek la bruantajn kaj dense amasiĝantajn homojn, kiel spektantoj en cirkoj. Kiom da rapideme haj-haŭ-antaj homoj anstataŭas la gigantaj arganoj, la memfaritaj aeraj kablovagonetoj navede kurantaj kaj similaj, en la pezaj laboroj. En la modernaj fabrikoj de ĉirkaŭurbo kvazaŭ en la profundaj

Vang Ŝujan k. a. laboristoj de la Dua Filio de la Radiekipajo-fabrika de Norda Ĉinio mem kreis kaj muntas aŭtomatan maŝinon por laki metalajojn.

Foto de Vang Ĉenzeng





Liu Jagjun (la dekstra), tornistino de ĈanghIndian-a Fabriko de Komunikiloj, jen sukcesis renovigi alian torntranĉilon, kiu ebligas 5-obligi la laborefikon. *Foto de Jang Ĝanhua*

montoj, estas ankoraŭ pli malfacile trovi homojn. Oni vidas tie aŭtomatajn produkt-liniojn murmurantaj kiel printempaj riveroj kaj fabrikoj alfluas kiel falintaj petaloj. . . .

La panoramo de la teknika revolucio en la kamparo ĉirkaŭ Pekino ankaŭ estas tiel ĉarma kiel la printempa pejzaĝo sude de Jangzi-rivero. En la porkbredejoj ĉe la Granda Muro la porkoj ne plu atendadas, lekante la malplenan trogon, la bredistojn alporti nutraĵojn per siteloj. Ĉar la aŭtomata transporta rubando daŭre alportas nutraĵojn tute varmajn kaj apetitigajn. Antaŭe eĉ 10 muojn⁵ da agro kamparano ne povis irigacii, kvankam li turnadis la vinĉon ĝis rompiĝo de la ŝnuroj. Sed nun kantojn zumas la elektraj pumpmaŝinoj sur la vastaj kampoj de la popolaj komunumoj. Knabinoj sidantaj en arb-ombro povas samtempe sin okupi per legado irigacianta la kampojn.

Kiel aromaj herboj kreskaj ĉie kie troviĝas tero kaj akvo, la teknika revolucio troviĝas ĉie kie oni laboras. Eĉ en la kuirejoj zumas maŝinoj por legomtranĉado, riz-lavado, knedado kaj manĝil-purigo. Ankaŭ en dommastrumaj servostacioj oni ekuzas maŝinojn por vest-lavado kaj plandum-farado.

Ho, al kiom da pekinanoj la teknika revolucio fariĝis jam inklino! Maljuna kamparano absorbiĝas en cerbumado por reformi agrikulturajn instrumentojn, kaj ekfumas bruligante la vakan pipoforneton. Junaj laboristoj estas absorbitaj en projektado de aŭtomata produkt-linio, forgesante eĉ la konsentitan rendevuon kun sia amatino. Antaŭ la liberiĝo pekinaj laboruloj ofte devis viziti ĉiujn siajn parencojn kaj amikojn spite ventojn kaj pluvojn por trovi iun okupon panondonan. Hodiaŭ biciklante kun manĝaĵo en poŝo ili same kuradas de la mateno ĝis la vespero,

en kaj ekster la urbo — sed por serĉi maŝin-desegnon aŭ maŝinpecon!

En la teknika revolucio oni kooperas kaj interhelpas, kun komuna celo rapidigi la socialisman konstruadon de la ĉefurbo. Tie ĉi ne mon-odoraĉas patentrajto, sed regas nur la nobla stilo de komunisma kooperado. Ekzemple, informiĝinte pri tio, ke du stacioj por ŝarĝado en la kvartalo Hjuanvu planis mekanikigi la ŝarĝadon kaj de-ŝarĝadon en la stacioj en kelkaj tagoj, studentoj, kadroj kaj armeanoj proksime loĝantaj alkuris propravole por helpi ilin rekonstrui la kajojn. Kiam maŝinoj por la ŝarĝado kaj deŝarĝado estis konstruataj, la fabrikoj partoprenantaj la laboron kunagis sinsekve, unu post alia kvazaŭ kunordigite en stafeto. Se vi demandas kiu fabrikis la maŝinojn de la stacioj, oni povas respondi nur, ke ili estas la kristaliĝo de la saĝo kaj ŝvitoj de miloj da personoj.

La vasta amasa teknika revolucio estas ankaŭ ia granda scienca laboratorio, kie naskiĝas novaj sciencaj teorioj. Antaŭe kelkaj maljunaj profesoroj en Pekino uzadis siajn malnovajn presitajn lekciojn ĝis defrotiĝo de la kajer-anguloj por instrui siajn lernantojn kaj poste ankaŭ iliajn gefilojn. Sed nun tio ne plu estas ebla. Nia granda antaŭensalto de produkta tekniko jam postlasis malproksime la malnovajn literaturojn. Hodiaŭ oni ofte trovas siluetojn de profesoroj ankaŭ inter la laboristoj. Dum festado de ĉiu nova teknika sukceso triumfa ruĝiĝo brilas sur la vizaĝo ambaŭ de laboristoj kaj sciencistoj. El la solvado de problemoj en la teknika revolucio la sciencistoj sorbas novajn nutraĵojn por sia scio, kiu ne plu estas velkinta floro en vazo, sed ĉiamverda arbo enradikiĝinta en la laborado de la amaso kaj sur ĝi maturiĝas de tempo al tempo fruktoj de novaj teorioj. Ruĝiĝas iom post iom ankaŭ ilia ideologio en la forno de la laboranta popolo.

Antaŭe la laboristoj estis rigardataj kiel “nekleruloj” sensciaj pri tekniko. Sed nun la alvoko de la Partio al liberiĝo de la penso kaj disrompo de superstiĉo vekis la saĝon de la laboranta popolo. Ekzemple la farado de lignaj domskeletoj estis nebla por ĉarpentistoj sen desegno de efektiva grandeco de la farotaĵoj. Kaj laŭ legendo tion povas nur Lu Ban, la dio de ĉarpentarto. Sed por ke la ĉefurbo Pekino estu konstruata pli rapide, pli bone kaj pli bele, Li Ĵujhuan, juna ĉarpentisto kuraĝis pensi kaj fari tion, kion oni aŭdis nur el legendo. Li decidis forjeti la tradician rutinon “fari unue desegnon laŭ efektiva grandeco”, hereditan generacion post generacio de la ĉarpentistoj. Kvankam lia kultur-nivelo estis malalta, tamen post diligenta lernado, li fine kreis novan metodon utiligante principojn geometriajn. La

modernaj maŝinoj antaŭe estis rigardataj tre misteraj, sed nun eĉ metilernantoj kuraĝas ŝanĝi ilian strukturon, farante al ili kuraĝajn kaj raciajn plibonigojn.

Kiom la pekina popolo sopiras, ke ili fariĝu gigantoj kun senlima forto por ke ili povu dediĉi pli da forto al la socialisma konstruado de la patrolando. En la distrikto Hajdian estas virino nomata Vu Ŝukin, kiu estis infanbofilino kaj multe subpremata de la bienuloj antaŭ la liberiĝo, nur antaŭ nelonge ŝi partoprenis la transportan laboron. Ŝi tre malpacientiĝis, kiam ŝi ŝarĝis la aŭton je brikoj. Ĉar ĉiufoje ŝi povis alporti al la aŭto nur kelkajn brikojn. Ŝi revis eĉ en la sonĝo, kiom bone estus, se ŝi havus paron da grandegaj manoj, kiuj povus plensarĝi la aŭton je brikoj per nur kelkfoja alportado. Dank' al la varma amo de popolo liberigita al la Partio kaj al socialismo, Vu Ŝukin fine sukcesis fari pinĉprenilon por brikoj, inspirite de la principo de fajropinĉilo. Tio efektivigis ŝian deziron rapide plensarĝi aŭton je brikoj. Ankaŭ la kamparanoj sub Jukjuan-monto norde de Pekino hodiaŭ rizidojn plantis rapide per riztransplantilo kantante sen kurbigo de la dorsoj.

Ili adiaŭis eterne al la labormaniero "kun la manoj en koto kaj dorso kontraŭ la ĉielo".

La pekinanoj estas admirataj jam ne nur pro la lertaj manoj por fari brodaĵojn kaj klozoneaĵojn. Ili estas forĝantaj sin gigantaj konstruantoj de socialismo en la arda fajro de teknika revolucio kaj kultura revolucio sub la gvido de Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ.

1 En Pekino oni uzas kiel brulaĵon karbobulojn fari-tajn el karbopulvoro miksitaj kun akvo kaj tero. Rule rondigante la bulojn, la laboristoj de karbobutikoj, kiuj fabrikas kaj liveras tiajn karbobulojn, uzas argilan florpoton kiel turneblan apogilon de la granda kribrilo kiu entenas la bulojn.

2 T. e. la ĝenerala linio por socialisma konstruado, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo.

3 Templo en Pekino konstruita en la feŭda epoko por kulti la dion de tero kaj dion de grenoj.

4 Tondilfarejo en Pekino fama pro la bona kvalito de siaj fabrikajoj.

5 Unu muo = 1/15 hektaro.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Nova Paĝo de Amikeco inter Ĉinio kaj Kamboĝo


Dum sia vizito al Ĉinio, en dec., 1960, Princo Norodom Sihanouk, Ĉefo de Ŝtato de la Reĝlando de Kamboĝo kaj la aliaj eminentaj gastoj de Kamboĝo faris sincerajn kaj amikajn interparolojn kun Prezidanto Liu Ŝaŭki, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, kaj Vicĉefministro Ĉen Ji de la Ĉina Popola Respubliko, subskribis la Traktaton de Amikeco kaj Reciproka Neagreso inter la du landoj kaj publikigis kune deklaron je la 19-a de dec. La kuna deklaro montras, ke la amika kaj paca interrilato de ambaŭ najbaraj landoj jam fariĝis bona ekzemplo por efektiviĝi la pacan kunvivadon inter landoj kun malsamaj socisistemoj. La kontraktado de la Traktato de Amikeco kaj Reciproka Neagreso inter Ĉinio kaj Kamboĝo, ne nur enigis la amikecajn interrilatojn de Ĉinio kaj Kamboĝo en novan stadion, sed ankaŭ estas granda kontribuo por defendi la pacon en la regiono de Indociĉio kaj en Azio. Ambaŭ landoj subtenas unu la alian la politikon de la du registaroj,

kondamnas la landojn kiuj fabrikas en sudorienta Azio streĉan situacion, subtenas la popolon de Laoso en ĝia batalado kontraŭ ekstera interveno, por paco-neŭtraleco, nacia sendependeco, kaj unuigo de sia patrolando. Ambaŭ flankoj havas tute saman opinion pri la internaciaj problemoj de la batalado por mondpaco, kontraŭ koloniismo, por ĝenerala malarmado kaj malpermeso al nukleaj armiloj, por kontraktado de

paca pakto de reciproka neagreso inter la landoj ĉe la bordoj de Pacifiko, kaj de la subteno al la bataloj por defendi la nacian sendependecon de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj. Ambaŭ flankoj ankoraŭfoje, solene deklaris, ke la registaroj kaj popoloj de Ĉinio kaj Kamboĝo prenos por ĉiam la Kvin Principojn de Paca Kunekzistado kiel la gvidajn principojn de la interrilato de ambaŭ landoj.

Post la subskribo Prezidanto Liu Ŝaŭki kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj en ĝoja intergratulo kun Princo Sihanouk.

Foto de Hinhua



Komuna manĝejo sub la lumo de la penso de Maŭ Zedong

Verkis Hjun Cungŭ, direktoro de la Popola Manĝejo de la Liucun-a Administra Distrikto, Ĵonghe-a Popola Komunumo, Vanĵong-gubernio, Ŝanhi-provinco

Inspiro de la direkto de tri malriĉaj kampanaj familioj

Post la fondiĝo de la popola komunumo, nia produkta brigado starigis komunan manĝejon je la unua de aŭgusto, 1958, kaj mi estis elektita de la komunumanoj ĝia direktoro. En somero de 1959, leviĝis de ie famaĉo pri malorganizado de la manĝejo, kaj iuj komunumanoj multe babilis pri tio. Iu bonhava mezriĉa kampano Haŭ Kehin eĉ kriegis: "Nenian superecon havas la komuna manĝejo, kiu ne povos esti bone funkciigata eĉ en komunisma socio." Ankaŭ tiuj, kiuj estas kutime intimaj al mi, admonis min: "Vi priservas aliajn ĉiutage en la manĝejo, laborante de frua mateno ĝis malfrua vespero, tamen oni estas ankoraŭ malkontentaj pri vi. Ne malbone, se la manĝejo estus malorganizita. Kiom plezure estus por vi partopreni laboron en la kampoj." Tiam mi mem ankaŭ ne sciis kion fari: ĉu ĝin malorganizi aŭ daŭrigi plu? — mi ne povis fari tujan decidon. Kiam mi parolis pri tio kun Hjue Hjugi, sekretario de la partiĉelo, li senhezite konsilis al mi: "Estu senŝanceliĝa sur via starpunkto kaj firme daŭrigu vian laboron!" La partiĉelo, krome, tuj kunvokis kunvenon por diskuti pri la estonteco de la manĝejo. Tiam, 42 familioj el la tuta brigado partoprenis en la manĝejo, sed alvenis nur 18 familioj, inter kiuj ĉiuj estis partianoj, junulliganoj, malriĉaj aŭ sub-mezriĉaj kampanoj. En la kunveno la sekretario klarigis la signifon de la starigo de komunaj manĝejoj, kaj cetere gvidis nin lerni la artikolojn de Prezidanto Maŭ, kiaj *Raporto*

de Esploro pri la Kampano Movado en Hunan-provinco, Unu Fajero Povas Incendiigi Tutan Stepon, La Problemo de Kooperativigo de Agrikulturo. La vortoj de Prezidanto Maŭ en tiuj ĉi artikoloj donis al ni ĉiuj multe da inspiro kaj instruoj. Mi legis en *La Problemo de Kooperativigo de Agrikulturo*, ke Prezidanto Maŭ diris: "La direkto montrita de tiuj ĉi tri familioj de malriĉaj kampanoj estas tiu de la 500 milionoj da kampanoj tra la tuta lando. Ĉiuj kampanoj de individua ekonomio finfine paŝos sur la vojon, kiun la tri malriĉaj kampanaj familioj firme elektis." Tiuj ĉi vortoj vekis min kaj senlime plifortigis miajn fidon kaj forton. Estante nur tri malriĉaj kampanaj familioj, ili ankoraŭ persistis en funkciigo de kooperativo. Kial ni, estante 18 familioj, t. e. sesoblo de ili, ne povus funkciigi komunan manĝejon.

Rigardu la problemon laŭ klasa vidpunkto

Post la kunveno mi longe miras, kial sekretario Hjue povas korekte rigardi la problemon, dum mi tuj konfuziĝas ĉe svingiĝo de herboj sub venteto? Mi menciis tion al la sekretario. Li respondis, ke se nur oni lernas la verkojn de Prezidanto Maŭ, oni povas trovi ĝustajn starpunktojn kaj rimedojn por korekte pritrakti problemojn, sen perdo de la direkto. Rimarkinte ke mi deziregas lerni verkojn de Prezidanto Maŭ, sekretario Hjue akceptis min en la studrondon de la verkoj de Prezidanto Maŭ. En la unua verspero ni lernis la artikolon *Pri Kontraŭdiro*, en kiu ĉe la komenco estas ekaplikataj la du mondkonceptoj. Mi aŭskultis la tutan vesperon inter la aliaj kaj trovis, ke ĝi estas iom malfacila por mi. Mi pensis pri retiriĝo el la rondo. Mi diris al sekretario Hjue: "Pro mia tro malmulta instruiteco mi ne povas bone kompreni la lernajon kaj mi ne lernos plu." Sed k-do Hjue kuraĝigis min pacience, dirante: "Lernado postulas penadon. Ne timu, ke vi ne komprenas. Vi sukcesos post diligenta klopodo." Mi pensis en mi plue ke la instruiteco de sekretario Hjue estas proksimume la sama kiel la mia. Se li povis atingi multon en la lernado, kial mi ne povas? Tial mi rekuraĝiĝis kaj persistis en la lernado. Post duonmonato ekkaptis min entuziasmo. Lernante la tekston, mi ligis ĝin kun la praktika laboro, farante meditadojn, komparon, analizon kaj studadon. Dank' al tio mia kompreno pri la verkoj de Prezidanto Maŭ iom pli profundiĝis. Kiam mi lernis la artikolon *Analizo de la Diversaj Klasoj de la Ĉina Socio*, mi ekpensis asocie, ke estas ja ne strange ke iuj bonhavaj mezriĉaj kampanoj volas ekŝiĝi el la komuna manĝejo, ĉar ilia ekonomia situacio estas proksima al tiu de riĉaj kampanoj, tial ili denature havas malstabilecon. Iliaj vivkondiĉoj estas pli bonaj ol la niaj, ili havas superflujajn grenojn kaj oleon, kaj timas malprofiti en la manĝejo, tial ili volas ĝin forlasi. Post tio mi komprenis, sur kiujn mi devas min apogi, kun kiuj mi devas unuiĝi kaj kontraŭ kiuj mi devas

lukti ideologie en la funkciigado de la manĝejo. Laŭ la spirito de klas-analizo kaj sub la gvido de la partiĉelo, mi reordigis la manĝejon, lasante tiujn bonhavajn mezriĉajn kamparanojn ekŝiĝi laŭ sia volo, provizore el la manĝejo. Tiamaniere la manĝejo estis refirmigita, ideologie kaj organize.

Bona funkciado de manĝejo stimulas produktadon

En la reordiga laboro de la manĝejo mi forte sentis, ke la verkoj de Prezidanto Maŭ estas voj-lumigilo por ĉiuj niaj laboroj. Ju pli multe ni lernas, des pli klarvidaj ni fariĝas. Poste mi lernis la artikolon *Zorgu la Vivon de la Amaso kaj Atentu la Labormetodon*. Ŝajnis al mi, ke ĝi estis speciale skribita por mi. La artikolo legiĝas i. a.: “Ĉu vi volas ricevi subtenon de la amaso? Ĉu vi volas ke la amaso oferu sian tutan forton por la batalfronto? Se jes, vi devas kuniĝi kun la amaso, elvolvi la aktivecon de la amaso, atenti iliajn zorgojn kaj plenkore klopodi por iliaj bonoj, solvante por ili la problemojn de produktado kaj vivo, tiujn de salo, de rizo, de loĝejoj, de vestoj, de infannaskiĝo, unuvorte ĉiujn problemojn de la amaso. Se ni efektive tiel agas, la vasta amaso certe nin subtenos, prenos revolucion kiel sian vivon, prenos revolucion kiel sian nesupereble gloran standardon.” El tio mi profunde ekkomprenis la gravan signifon de la prizorgado pri la vivo de la amaso, kiun Prezidanto Maŭ preparolis, kaj ekpensis asocie, kiel granda estas la respondeco de direktoro, kiun mi prenis sur min. Se ĉiuj povas bone kaj ĝissate manĝi, daŭra antaŭensalto en produktado povas esti garantiata kaj la disvolviĝo de socialisma konstruado plirapidigita. Sed kiel ĉiuj povas bone kaj ĝissate manĝi? Ree mi memoris, kion Prezidanto Maŭ diris al ni: Se nur ni plene elvolvas nian subjektivan aktivecon sur bazo de praktika situacio, ni certe povos bone fari nian laboron. Sekve mi, kune kun la kuiristoj, tuj ekagis por elpensi rimedojn kaj eltrovi laborsekretojn, por variigi la manĝaĵojn kaj plibonigi ilian kvaliton. Rezulte de tio, ekde julio pasintjare la greno monate konsumita de ĉiu persono multe reduktiĝis, sed oni manĝis pli bone kaj pli satè ol antaŭe. Pro la plibonigo de la laboro de la manĝejo, la membroj fariĝis multe pli kontentaj. Iu kamparano Hjue Guangzu estis tiel ĝoja ke li verkis *ŝunkoŭliu**:

Kiam manĝejon prilumas penso de Maŭ Zedong,

Ni ekmanĝas, kaj sate kaj frande, kun grenŝparo.

Eĉ ne unu plado ripetiĝas el menuo por sep tagoj,

Kaj bongustas same preparaĵoj el kruda grenajo.

* *Ŝunkoŭliu*: liberstila populara versaĵo deklamata kun ritmomarka klakilo.



Partia Sekretario en Komuna Manĝejo.


Lignogravuraĵo de Du Jengkiang

Post tio, multaj komunumanoj, kiuj ne aliĝis al la manĝejo, nun amase petis aliĝon. Kaj tiuj, kiuj ekŝiĝis antaŭe, ankaŭ tre pentis. Eĉ la bonhava mezriĉa kamparano Haŭ Kehin, kiu deklaris ke la manĝejo ne havas superecon, ankaŭ ne povis ne agnoski sian malvenkon antaŭ la fera realo. En decembro lastjare la nombro de la partoprenantoj en la manĝejo saltis de 80 al 389.

Tutkore pro la amaso

Kun la pligrandiĝo de la manĝejo aperis serio da novaj problemoj: La manĝosalono estas tro malgranda por enteni tiom da manĝantoj, la provizado de flankaj manĝaĵoj kaj la pliigo de kuiristoj ankaŭ fariĝis problemoj. Kion fari antaŭ la serio da novaj malfacilaĵoj kaj problemoj? Mi memoris kion Prezidanto Maŭ instruas al ni en *Pri Kontraŭdiro*: “Malnova procezo finiĝis, kaj nova procezo estiĝis. La nova procezo denove entenas novajn kontraŭdirojn, kaj komencis sian propran historion de kontraŭdiro-disvolviĝo.” Ĉi tie Prezidanto Maŭ klare montras al ni, ke seninterrompa estiĝo kaj seninterrompa solviĝo de kontraŭdiroj estas la leĝo de disvolviĝo de objektivaj aferoj. Tial anstataŭ ĉagreniĝi mi decidis solvi tiujn problemojn.

Sed en la tuta vilaĝo troviĝis neniu taŭga loko por manĝosalono, krom la tri ĉambroj de mia hejmo, kiuj estis kompare grandaj kaj taŭgas por la celo. Tamen mi timis, ke eble mia edzino ne konsentos. Tiam mi rememoris la vortojn de Prezidanto Maŭ en la artikolo *Por Rememori Doktoron Norman Bethune*: “Ni ĉiuj devas lerni lian senegoisman spiriton. Komencante de tio ĉi oni povas fariĝi homo treege utila por la popolo. Ies kapablo povas esti granda aŭ malgranda, sed se li havas tiun ĉi spiriton, li estas homo nobla, pura, morala, netriviala kaj tre utila al la popolo.” La parolo de Prezidanto Maŭ ja multege min inspiris. Mi revenis hejmen kaj persvadis mian edzinon per liaj vortoj, kaj ŝi konsentis cedi niajn tri grandajn ĉambrojn al la manĝejo kiel manĝosalonon.



La mantoŭ-tranĉilo de Ĉangĉun-a Restoracio rapidigas la laboron 20-oble.
Foto de Hju Ĝiceng

Senĉese antaŭenmarŝi sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ

La problemo de la manĝosalono estis solvita. Sed kiel solvi tiun de nesufiĉo de kuiristoj? Ĉu peti laborforton de supera instanco de la administra distrikto aŭ ĝin postuli de la rebonigo de laboriloj? Mi pensis kaj repensis, ke ĉie estas nun antaŭensaltado kaj ĉiu estas okupata en produktado. Kvankam la laboro de la manĝejo estas ankaŭ grava, tamen “bonkvalitan ŝtalon oni devas uzi sur la klingo”. Tial mi decideme alprenis la duan rimedon, t. e., mobilizi ĉiujn kuiristojn por rebonigi la kuirilojn. Sed al ĉiu el ni mankis teknikaj scioj, sekve ĉiel ajn ni sukcesis atingi nenian rezultaton. Mi petis la partiĉelon, ke ĝi sendu al ni teknikajn laboristojn. La sekretario diris: “Ĉu Prezidanto Maŭ ne diris, ke ni estu la mastroj de la objektiva mondo? Ne dependu sole de teknikaj laboristoj en reformado de laboriloj. Liberrigu vian penson, estu kuraĝaj en penso kaj ago kaj kreu mem.” Sekvante la admonon de la Partio, mi, kune kun la kuiristoj, denove cerbumadis kaj fine sukcesis elfari dekelkajn indiĝenajn kuirejajn mekanikaĵojn, kiel “mantoŭ*-tranĉilo”, “legom-dispecigilo”, k. c., kiuj ege plialtigis la laborefikon kaj ŝparis manlaboron. Sed restis ankoraŭ alia problemo, ke la mantirata blovilo estis peniga kaj malhigiena, kaj ĉiuj kuiristoj opiniis ĝin forigenda manko. Oni diris, ke la Popola Manĝejo de Ĵonghe-urbeto lernis

la sperton de Tiangin kaj kuiris rizon bone kaj rapide per vaporo. Mi vizitis ĝin por lerni la metodon kaj komencis imiti ĝin post reveno. Dum la imitado mi malsukcesis fojon post fojo, kaj iuj komencis moki. Mi mem ankaŭ malentuziasmiĝis. Sed mi ekmemoris, ke Prezidanto Maŭ diris: “Ĉiuj ajn novenaskitajo devas trapasi malfacilecon kaj zigzagon dum kreskado. La penso, ke en la socialisma afero oni povas facile sukcesi ĉiam glate sen malfacileco kaj zigzago aŭ sen granda penado, estas revo.” (*Problemo pri Ĝusta Traktado de Internaj Kontraŭdiroj de la Popolo*) Mi ankaŭ memoris, ke Prezidanto Maŭ diris: “Spertinte malsukceson, oni povas ĉerpi el ĝi instruojn kaj korekti sian penson por ĝin adapti al la leĝo de la ekstera mondo, kaj tiel oni povas turni la malsukceson en venkon. La proverboj ‘Malsukceso estas la patrino de sukceso’, ‘Falo en fosajon, gajno en spiritaĵo’ esprimas ĝuste la saman veron.” (*Pri Praktiko*) Tiuj ĉi vortoj de Prezidanto Maŭ ree donis al mi grandegan forton. El la malsukcesoj mi eltiris instruojn, kaj daŭrigis la provadon. Finfine mi elpensis aranĝon laŭ la formo de kunfajruja kaldrono. En februaro, 1960, mi sukcesis elfari indiĝenan vaporproduktilon por efektiviigi vaporuman rizkuiradon, per kiu la efikeco duobliĝis.

Komunumano Hju Ĝiceng kantis ĝoje:

*La penso de Maŭ Prezidanto ekbrilas ruĝflore.
Jen nia manĝejo ŝanĝiĝis jam tute kaj plene.
Kuiron de rizo ni faras facile, vaporo,
Blovkeston ni ne plu bezonas blovigi kunpene.*

* Mantoŭ: manĝaĵo farita el knedita, fermentia kaj vaporumita faruno.

Nun nia manĝejo jam ĝeneraldire efektivigis variigon de manĝaĵoj, mekanikigon de laborado kaj vaporumon en rizkuirado.

Kvankam ni jam gajnis grandajn atingojn en la laboro de la manĝejo, tio tamen ne signifas, ke ĝi ne povas esti plibonigita. Lerninte la teorion de sen-interrompa revolucio instruitan de Prezidanto Maŭ, ni klopodas pliapaŝe organizi la ekonomian vivon de la komunumanoj kaj pli multe klopodas por ilia bonstato. Ekde marto ĉijare nia manĝejo plie starigis servojn por helpi la komunumanojn en iliaj geedziĝaj

aŭ funebraj solenoj kaj peri iliajn poŝtaĵojn, abonojn al gazetoj kaj ĵurnaloj k.t.p. Ili unuvoĉe laŭdas:

*En brilo de l' penso de Maŭ Zedong,
Malsama l' manĝejo prezentas sin.
Post franda satmanĝo, labor' — fruktodon'.
Manĝejo, ni ĉiam subtenos vin.*

La atingoj de ni akiritaj en la laboro de la manĝejo estas efektive la venko de la penso de Maŭ Zedong. Ni nur bone lernu la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj bone sekvu liajn instruojn, kaj tiam ni povas labori tiel sagace, lerte kaj energie, ke nenia malfacilo povas bari nian antaŭeniron.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

La popola universitato en Vanjong-gubernio

Vanjong-gubernio, en Ŝanhi-provinco, estas avangarda distrikto en likvido de analfabetismo helpe de la utiligo de han-lingva fonetika alfabeto. En 1959, ĝi jam fariĝis antaŭ la laŭplana dato gubernio sen analfabetoj, kaj popularigis la nacian komunan lingvon. En 1960, ĝi fondis 1,800 post-laborajn kursojn por lernantoj de superelementaj klasoj, 316 por lernantoj de gimnaziaj klasoj. En oktobro samjare fondiĝis plie la Vanjong-a Popola Universitato, kun 100 studentoj, lernantaj en 3 fakultatoj: la industria, agrikultura kaj la instruista. Ĝi havas ankaŭ siajn etan maŝinfabrikon kaj eksperimentajn kampojn kiel bazon por labor-produktado kaj scienca esplorado de la profesoroj kaj studentoj.

Je la Nomo de Revolucio

Je la Nomo de Revolucio estas dramo verkita de sovetunia dramverkisto Ŝatrov. Ĝi priskribas la batalon kontraŭ malfaciloj en la unuaj tagoj post la venko de la Oktobra Revolucio en 1917. Tiam la nove naskita Sovetunio estis serioze minacata de la imperiismaj potencoj, la burĝa klaso kaj la kontraŭrevoluciaj elementoj. La malamikoj intencis strangoli la sovetan regpotencon per malsato. Sed la sovetunia juna generacio, leviĝis laŭ instruado kaj direktado

de Lenin, de sur la loko kie falis iliaj revoluciaj patroj kaj fratoj, por defendi la revolucion kaj patrion, kaj brave marŝis antaŭen. La Pekina Film-produktejo jam ĝin filmigis kaj la projekcio de la filmo en Pekino kaj aliaj urboj ricevis varman akcepton de la spektantaro.


Unua manuskripto de "Historio de la Han-a Lingvo"

La han-a lingvo estas uzata de plej multe da homoj en la mondo, sed mankis ĝis nun verko resumanta la leĝojn de historia evoluo de la lingvo. Lastatempe 30 studentoj kaj 3 junaj instruistoj de la lingvistika klaso de la han-lingva fakultato en la Pekina Universitato finkompilis jam la unuan manuskripton de "Historio de la Han-a Lingvo", en kiu la evoluo de la han-a lingvo ekde la skribo sur testudkiraso kaj ostoj ĝis la moderna estas koncize priskribita.

Agrara reformo efektiviĝis en Tibeto

En la kampanjo de demokratia reformo, la popola registaro de Tibeto konfiskis la bienojn de la ribelintaj servutulaj mastroj kaj iliaj agentoj, kaj elaçetis la superfluaĵajn kampojn de tiuj servutulaj mastroj kaj iliaj agentoj kiuj ne partoprenis la ribelon. La tuta sumo atingis 2,800,000 tibetajn

muojn (ĉ. 186,000 hektarojn). Nun ili estas disdonitaj al 800,000 senteraj kamparanoj kaj estas solene disdonitaj al ili ankaŭ la terposedaj atestiloj, kaj ili fariĝis mastroj de tero. La nove liberigintaj kamparanoj de Tibeto estas senprecedence entuziasmaj en produktado post la ricevo de tero. Ekde la vintro de 1959 ĝis la printempo de 1960, jam sin organizis pli ol 100,000 kamparanaj familioj en pli ol 15,000 interhelpajn grupojn de agrikultura produktado sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio, kaj disvolvis vastan kampanjon de pliprodukto en agrikulturo.



(Daŭrigo de p. 41)

Post momento ne pli longa ol tempo por fumi unu pipon, jam neniu el la fremduloj elpuŝis sian kapon. Tiam la maljunulo starante sur la boato apogante unu manon sur la puŝstango kaj ordigante sian barbon per la alia, ridis laŭte:

"Fremdulaĉoj, vi fremdulaĉoj! Ĉu vi venis por serĉi Zong Laŭlu aŭ por serĉi ĉe li la morton? Ha, ha! Mi ja ĝuste estas neniu alia ol la serĉata Zong Laŭlu!"

* *La nomo de kontraŭimperiisma organizaĵo de ĉinaj kamparanoj, metiistoj kaj aliaj malriĉaj popoloj ĉefe en Ŝandong- kaj Hebej-provincoj dum la tempo ĉirkaŭ 1900.*

Elstara Ĝardenisto Laborema

Intervjuo kun Vang Kihian — eminenta instruisto
de elementa lernejo en Pekino

LERNEJESTRO Ŝen de la Pekina Unua Elementa Lernejo Eksperimenta, tre intime konatigis al mi mezaĝulon, altkreskan kaj afablan dirante: “Jen estas Instruisto Vang Kihian de nia lernejo.”

Laŭ mia imago, sur la korpo kaj mieno de tiu ĉi “mizera instruisto” travivinta profundan mizeron kaj suferon dum pli ol dudek jaroj de l’ regado de nordaj militaristoj, de japanaj agresantoj kaj ĉinaj perfiduloj, kaj de kuomintangaj reakciuloj, certe restus iaj postsignoj de mizero kaj malĝojo. Sed kiam mi vidis lin, li ja estas maljuna instruisto sana kaj vigla, kiu ĵurpromesis “priverŝi per sia korsango de la posta duona vivo la florojn de nia patrolando.”

“Bona Estas la Socialismo! . . .”

Pentris Ŝang Taŭ




Preskaŭ tri horojn mi interparolis kun Instruisto Vang, dum mi pensadis: se mi estus elementa lernanto, mi certe amas aŭskulti la lecionon pri nacia lingvo donatan de li. Lia parolado estis tiel sincera, tiel vigla kaj viveca. El liaj profundaj okuloj, intermite radiis brilo de eksciteco kaj humoro.

Instruisto Vang devenas de iu kamparana familio. Antaŭ pli ol tridek jaroj, pro monto da malfaciloj li apenaŭ gradiĝis el instruista lernejo. Kaj tuj sekve pezis sur liajn ŝultrojn la ŝarĝo de vivtenado, ĉar tiam serĉi laboron estis ege malfacila problemo.

Portante pakajon li alvenis Pekinon por serĉi laboron. Ĉie li renkontis malestimon kaj rifuzon. Per kvin kupraj moneroj li travivis unu tagon. Tre malfacile en frosta vintro, li fine akiris okupon de instruisto en la Elementa Lernejo de Fuhue-strateto.

Tion parolante, Instruisto Vang nedeteneble profundigis en malgajan rememoron. Dum la plej malfacila tempo sub la regado de japanaj agresantoj kaj ĉinaj perfiduloj, li instruis, krom en la Eksperimenta Elementa Lernejo, ankaŭ ĉe du familioj kiel privata instruisto, kaj samtempe kumulis du horan instruadon en Hujven Lernejo malproksime en Dongdan-kvartalo. Lia tagmanĝo estis kelkaj pecoj da kukoj el miksfaruno kaŝitaj en lia librosako. Li nenature ridetis kaj diris: “Mia korpo apenaŭ povis min subteni, sed pro longdaŭra malsato kaj malbona nutro, mortis en mizero kaj malsano unu post alia miaj maljuna patro, edzino kaj gefiloj, ĝis la antaŭvespero de la Liberiĝo, el la sep personoj de mia familio, restis nur mi kaj mia plejaĝa filo.”

Pekino estis liberigita. Sub la serena kaj hela ĉielo, li ĝojege rigardadis ĉiun ruĝflagon kaj ĉiun soldaton de la Popola Liberiga Armeo enveninta en la urbon. Post ne longe, li ekrimarkis ke lia ĉirkaŭaĵo iom post iom ŝanĝiĝis: rubo estas forbalaita, kloakoj dragitaj, vojoj plilarĝigitaj, kaj lokaj despotoj estas subpremitaj, ĉie komenciĝis prosperaj konstruadoj... Tiam li komencis arde ami la Ĉinan Komunistan Partion, kiu ŝanĝas ĉion ĉi tion. Li profunde komprenis ke la rilato inter homoj ne plu estas rilato inter dungatoj kaj dungantoj, sed inter kamaradoj kunligitaj kiel sango kaj karno. De tiam, Instruisto Vang decidis ŝanĝi siajn malpravajn sintenadon kaj vidpunkton pri laboro kiujn li havis dum longa tempo, tio estis: “laŭ mia kapablo”, “zorgi pri instruo kaj ne pri ellerno”,



La Strateto Bonodoras de la Komunumaj Ruĝaj Floroj.
Lignogravuraĵo de Ĝaŭ Mingjuan

“respondeci al sia konscienco” ktp. . Li ekkonis, ke ĝuste tiuj ĉi estas pretekstoj por la vidpunkto kaj konduktilo de dunga rilato. Se oni longe sintenus kiel apudstaranto for de socialismo, nur klarigi al lernantoj tekston laŭ la teksto, sen ia politika entuziasmo pri socialismo, oni ne povas sukcese plenumi sian instruatan taskon! Sub la kulturado kaj edukado de la Partio, pli kaj pli altiĝis lia ideologia konscio, iom post iom estis starigita la revolucia vivkoncepto, kaj pli ekhavis pli korektan konon pri socialismo kaj komunismo. Vekiĝis lia konscio kaj vigliĝis lia energio, kaj multe plialtiĝis la nivelo de lia instruado de la nacia lingvo. Kiam li klarigis por la lernantoj du artikolojn “En Neĝblovo” kaj “Komenco de Laborado”, dank’ al lia detala analizo kaj simpatia rakontado, plejparto de la lernantoj eklarmis emociite de la mizera sorto de la korea knabineto kaj de k-do Vu Junduo.

En la lastaj jaroj, Instruisto Vang serioze preparadis lecionojn, penegre studadis, li profunde trastudis la instruatan materialon de ĉiu leciono, kaj ripetfoje konsideris la instruatan metodon. Por ke la lernantoj pli


facile ellernu kelkajn vortojn, li ofte tralegis multe da materialoj, kaj ilin pripensadis ĝis profunda nokto. Resumante sian sperton kolektitan dum multaj jaroj, li verkis libron *Kiel instrui vortojn en superaĵoj klasoj*. Tiu ĉi libro multe helpas la instruadon de la nacia lingvo en mezgradaj kaj elementaj lernejoj. Li ĉiam volonte helpis unue aliulojn, kaj poste faris sian propran laboron. La junajn geinstruistojn en lia lernejo li ĉiel helpis kaj direktis per sia tuta forto; kaj samtempe li ankaŭ konstante kaj humile lernadis de la aliaj.

Instruisto Vang arde amas siajn lernantojn, li verŝas sian tutan energion sur la lernantojn. Matene li atingas la lernejon je la sepa, kaj ofte forlasas ĝis profunda nokto. Kune kun la geknaboj li laboras, ekskursas kaj vizitas ekspozicion kaj dume edukas la lernantojn.

La infanoj, sub la edukado de Instruisto Vang, ne vanigis lian penon kaj aspiron. Ili progresas tre rapide. Ili ne nur arde amas Instruiston Vang, sed ankaŭ havas intiman rilaton inter si mem, kaj fariĝas unuiga kaj amikeca kolektivo.

En la pasinta jaro, Instruisto Vang honore aliĝis al la Ĉina Komunista Partio. La ekscitiĝo de lia tiama animstato estas imagebla. Laŭ liaj propraj vortoj: “La 29-a de junio, 1959 estas epokfara tago en la historio de mia vivo, estas neforgesebla tago dum mia tuta vivo, estas tago en kiu mi gajnis novan vivon dank’ al la Partio.” . . . “En la lastaj dek jaroj, la Partio plialtigis mian konscion, indikis direkton por mia penado, mi nepre priverŝos per mia korsango de la posta duona vivo la florojn de nia patrolando.”

Kiam mi adiaŭis Instruiston Vang, li akompanis min ĝis la lerneja pordego. Ĉe la pordego, antaŭ ekran-muro kun glazuritaj tegoloj, sin trovis vico da potoj de florantaj floroj. Li ridetante diris: “Kiel belaj ĉi tiuj floroj! La infanoj ĝuste similas al ĉi tiuj amindaj floroj.” Rigardante la afablan vizaĝon de Instruisto Vang, mi pensis: “Floroj de la patrolando! Do vi estas la elstara ĝardenisto laborema, kulturanta la florojn.”



Patrino kaj Filino

I

KIAM finiĝis la plivastigita kadrara kunveno de Ĝaŭhua-a Popola Komunumo, ĉiuj kadroj de diversaj administraj distriktoj kaj produktaj brigadoj ekpreparis sin por reiri al siaj vilaĝoj. Jen eksonis el la kunveneja megafono anonco, kiu diris: "Atentu Gaŭ Hiuĝen el Venhi-vilaĝo, la Partia Komitato de la Komunumo petas ke vi bonvolu resti! Ke vi bonvolu resti!"

La komuniko estis ripetita ankoraŭ unu fojon, kaj en la sudokcidenta angulo de la kunvenejo iu mezaĝa virino haltis. Ŝi estis 41-42-jara, maldikstatura, kun longeta melonsema vizaĝo. La okuloj sidis profunde kaj flagris brile. Ĉe la buŝanguloj estis videblaj du malprofundaj sulkoj, kiuj faris la vizaĝon kaj afabla kaj digna.

Tiu virino estis ĝuste Gaŭ Hiuĝen, la estrino de virina fako de la administra distrikto de Venhi-vilaĝo. Ŝi estis iranta hejmen kun la kadroj de la brigado. Aŭdinte la sciigon ŝi diris al sia maljuna edzo, la estro de la produkta brigado de Venhi-vilaĝo, Jang Ĝenghiang: "Hejmen iru vi unuaj, eble la partia komitato aranĝos ankoraŭ iajn laborojn." Tion dirante ŝi transdonis al la maljunulo sian pakajon de sur sia brako. "Kiam noktiĝos, se vi ne povus reiri? . . ." zorgeme demandis Jang Ĝenghiang transprenante la pakajon.

"Ne grave, en la Akuŝiga Stacio ĉe Perlo mi trovos liton kaj litajon." Kiam Gaŭ Hiuĝen jam volis ekiri, la maljunulo rapide ŝovis en ŝian mansakon duonpecon da mantoŭ-o*.

Alveninte al la sidejo de la partia komitato de la komunumo, Gaŭ Hiuĝen trovis ke la komitatanoj ankoraŭ kunsidas en la centra ĉambro, kaj ŝi eksidis en iu ombrejo sub la tegmentrando de la okcidenta flank-domo kaj elpoŝigis sian notlibreton por detale kontroli sian noton pri la konkluda raporto kaj aldoni al ĝi unu post la alia la mankantajn malsimplajn ideografiajn.

Kun serena ridhoro, finiĝis la komitata kunsido. Kelkaj komitatanoj eliris, kaj kriis vidinte Gaŭ Hiuĝen: "Jen, ĉu ne jam venis Gaŭ Hiuĝen! Nu, parolu kun ŝi!" Tiam alpaŝis sekretario

Hju kaj diris ridante: "Vi estas denove transpostenigota, Gaŭ Hiuĝen!"

"Kien vi nun sendos min, maljunulinon? Kion mi kapablas?" Gaŭ Hiuĝen rediris ridante kun ekvarmiĝo en la koro.

"Maljuna? Neniom!" ankaŭ duonŝerce diris la sekretario: "Por frakasi la batalpozicion de Tianmenĝen kapablas neniu krom Mu Guĵjing**." Kaj poste li daŭrigis serioze: "Vi scias ke nia komunumo lasttempe establis kelkajn fabrikojn, inter kiuj estas alkoholaj-fabro, kies estrino, la partia komitato decidis vin nomi, post interkonsiliĝo."

Aŭdinte pri nomiĝo kiel estrino de alkoholaj-fabro, Gaŭ Hiuĝen vere estis konsternita. Ŝi diris: "Ho, mia panjo! Kial min ŝarĝi per tia laboro! Tiu posteno bezonas kaj teknikon kaj klerecon, ĉu taŭgas en tio virino?"

"Vi iros politike gvidi, ja ne mem fari alkoholaĵon," diris la sekretario. "Cetere, ĉian teknikon oni povas lerni. Vi rapide ellernis eĉ la novan akuŝigan metodon, ĉu necesas timi antaŭ tio? Oni trovas vin taŭga, kaj vi ja taŭgas. Multaj

* Ĉina manĝaĵo el vaporumita fermentita pastopeco.

** Heroa militistino de Song-dinastio (960-1279 p.K.).

Mateno en Fanĉuan

Lignogravuraĵo de Ĉen Guang



estos ankoraŭ aliaj novaj laboroj estonte. Certe virino povas servi kiel fabrikestro.” Dum la sekretario parolis kaj kuraĝigis, flanke instigis ankaŭ la direktoro de la komunumo, Tian Jongji, malnova labormodelo: “Iru, vi ja ege taŭgas! Por malnova kadro jam de dek jaroj, ĉu ankoraŭ povas esti malfacile direkti iun fabrikan? Mi garantias brilan sukceson tuj ĉe via alprenado de la laboro. Elokventa en parolo, lerta en skribo, serioza kaj solida en laboro. Cetere la alkoholaj-fabriko situas ĝuste en Venhi-vilaĝo, de proksime de via maljunulo kaj eblos interprizorgado. Iru senhezite, post kelkaj tagoj ni jam iros drinki alkoholaĵon de via fabriko!”

Tiu vortsalvo de Tian Jongji vekis ĥoran ridegon, ridis ankaŭ Gaŭ Hiuĝen mem, kaj ŝi diris: “Kontraŭe, mi tamen ne donos al vi drinki. Ĉu oni povus laŭplaĉe drinki la alkoholaĵon de la komunumo?”

“Mi volis diri iom gustumi.”

“Ankaŭ gustumi ne. Jen tiu venas iom gustumi, jen alia, tuj konsumiĝas jam kvaron- aŭ duon-ĝino!” Kiam Gaŭ Hiuĝen parolis, Tian Jongji intermetis svingante sian disetenditan manon: “Jen! Jen! Jen! Sole tia seriozececo jam evidentigas ĝustan ŝofon por fabrikestro!” Je tiuj vortoj ruĝiĝis Gaŭ Hiuĝen kaj ree ridegis la aliaj.

La sekretario poste parolis kun ŝi pri la perspektivo de la fabriko kaj ĝiaj aktualaj kondiĉoj. Kun ĝoja eksciteco ŝi akceptis la novan taskon, sed ŝi zorgemis pri la virina laboro de Venhi-a administra distrikto kaj demandis: “Kiu do transprenos la virinan laboron postlasitan de mi?”

“Divenu! Kiu, laŭ via konjekto?” demandis la sekretario ridante.

Pro lia demando tuj ĉion komprenis Gaŭ Hiuĝen. “Ej, oni denove priridos nin patrinon kaj filinon!” ŝi ridis pugnobatante la sekretarion. “Inkluzive ĉi tiun fojon, mi transdonis mian laboron al mia Perlo jam kvarfoje. Tiu bubinaĉo ja havas sian seriozecon!”

“Ĉu ŝi ankoraŭ vin titolas ‘k-dino panjo’?” laŭte demandis Tian Jongji.

“Jam ne plu. Sed ŝi diras: ‘Panjo, ni devas estonte kiel eble plej disvolvi interkritikon inter ni.’ Politikan lecionon ŝi ja al mi donas.” Dirante foriris Gaŭ Hiuĝen, kaj leviĝis post ŝi laŭda ridado.

II

FORLASINTE la sidejon de la partia komitato, Gaŭ Hiuĝen turnis sin preterpasante al la Akuŝiga Stacio por vidi sian filinon Perlo, kiu estis la estrino de la Stacio. Tie ŝi tamen trovis ke la filino forestas. Ŝi babilis tempeton kun akuŝistinoj, sed Perlo ankoraŭ ne revenis. Vidante ke la tempo ankoraŭ ne malfruas, ŝi forlasis la urbeton Ĝaŭhua por senprokraste reveni al Venhi-vilaĝo.



Manĝaĵon Onjo Sendas al la Sudmonteto

**Poemo de Vang Fejkun
Ilustris Jang Venhiu**

*Jen okcident-fenestron la novlun' rigardas.
Aliri la manĝaĵon onjo tuj jam startas.
Frititaj faboj tikle ole-bonodoras,
Rizkaĉo en kaldron' intensarome bolas.*


*Kun korbopar' pendanta sur la portovekto,
Manĝaĵon onjo sendas al la Sudmonteto,
Perbrake disfendante salikbraĉan baron,
Kaj disrompante l' lumon lunan per paŝtreto.*

*Vastega l' tritikkamp' manĝejas provizore.
Ŝi sentas ĝojinundon en la korprofundo —
La sturmon de rikolt' ŝi servas bezonhore,
Miele dolĉas por ŝi la rikolt-abundo.*

Elĉinigis Laŭlum

Estis la tria monato laŭ la lunkalendaro. Ĉie verdas tritikoj, kiuj jam altas pli ol manĝbastoneto. La orflavaj floroj de kolzoj dissendas fortan aromon. Sur la lazura ĉielo, tiel pura kvazaŭ ĵus balaita, pendas nur la radiojn disjetanta ruĝa suno kvazaŭ pelvo da fajro.

Paŝante sur la vojo, Gaŭ Hiuĝen ial sentas sin eksterordinare ĝoja kun vigle batanta koro. La tritikaj plantaĵoj apud la vojo kvazaŭ sin salutas kapbalancante, kaj la kolzofloroj kvazaŭ ridas al ŝi. Malproksime ŝi vidas, ke la montdorso post Venhi-vilaĝo jam fariĝis bonordaj ŝtuparkampoj. Ili estas la rezulto de montmastrumaj laboroj de la vilaĝanoj dum



AGLO SUPER LA FLAVA RIVERO

Ĉinstila pentraĵo de Ĉen Gongĝi

la antaŭensalto en la printempo lastjare. Estas ankoraŭ videblaj blankaj postsignoj de ŝovelilbatoj sur iliaj rand-eĝoj, sed ĉijare oni jam povos manĝi tritikon el ili. En la valo flagre ondetas la verda akvo en la artefarita lago, sub kiu estas konstruata vico da ruĝbrikaj domoj por alkoholaĵ-fabriko kaj paperfabriko de la komunumo.

Antaŭ tiuj vidaj ekvenis Gaŭ Hiuĝen pretervole la penso: ŝanĝo, ŝanĝo, kiom rapida ŝanĝo fariĝis en la vilaĝo, kaj kiom bona ŝanĝo fariĝos ankoraŭ al ĝi estonte! Jam por dek plenaj jaroj Gaŭ Hiuĝen iradis la vojon de Venhi-vilaĝo al la urbeto Gaŭhua. Ŝi iris por ĉeesti kunvenon, por raportoj pri laboroj, por aĉeti la unuan azenon por la unuagrada produkto-koperativo, por helpi akusadon, por festi la Mart-okan

Feston Unuvorte, sennombrajn fojojn ŝi jam iris laŭ tiu vojo dum la dek jaroj, kaj ĉiufoje irante sur ĝi ŝi sentis sin en ĝoja humoro.

Ŝi ankoraŭ memoras pri la epizodo de sia unuafoja iro al la urbeto por ĉeesti kunvenon; tion ŝi nun trovas efektive ridinda. Estis en la jaro 1949, ankoraŭ ne longe post la liberiĝo, kiam en la urbeto estis la distrikta registaro kaj en la vilaĝo ĵus komenciĝis la “kampanjo kontraŭ lokaj despotoj”. Iu kamaradino nomata Ĝoŭ Ja el la distrikto loĝis ĉe ŝi; ili estis tiom intimaj unu kun la alia, kvazaŭ fratinoj; kaj Ĝoŭ poste instigis ŝin partopreni en vilaĝaj laboroj. Tiam ekmalpaciĝis kun ŝi Jang Ĝenghiang, kiu aŭdis de iu, ke virinoj ĉeestintaj kunvenojn baldaŭ jam postulos eksedziniĝon. Ĉiutage, kvankam li ne kuraĝis kvereli antaŭ la kamaradino Ĝoŭ Ja, tamen en ilia ĉambro li ekscitiĝis ĉe ĉiu okazo kun rondigitaj okuloj kaj blovataj lipharoj.

Iutage, venis de la distrikta registaro sciigo pri okazigo de kunveno de aktivaj malriĉaj kamparanoj el diversaj vilaĝoj en la urbeto Gaŭhua por tri tagoj. Al tiu kunveno estis invitita ankaŭ Gaŭ Hiuĝen. Tiu estis la unua fojo, ke ŝi portis kun si litajon por tranokti eksterhejme, kaj Jang Ĝenghiang ekkverelis kun ŝi, tirtenante la pakajon kun rondigitaj okuloj:

“Se vi volas forkuri, simple tion eldiru!” Tion dirante li elokuligis du larmogutojn.

“Kial mi volas forkuri? Mi ankoraŭ revenos por lukti kontraŭ la bienuloj! Kaj mi havas ankaŭ du infanojn! Mi ja iras por ĉeesti kunvenon. Aj ja! Vidu, kiel malvastan koron vi havas!”

Tuj post ŝia kverelo kun la edzo, ekgrumbliis la bofratino: “Por ĉeesti kunvenon? Por intermiksiĝi kun viroj, mia aĝa belulino! Kiu preparos la manĝojn por la tri tagoj de via vico? Ĉerte mi ne zorgos!”

Gaŭ ekploris embarasite. Ĝuste tiam alpaŝis Perlo, kiu estis tiam ankoraŭ knabino 12-jara, kun nudaj piedoj kaj hirtaj haroj, kaj tamen ŝi diris: “Iru ĉeesti la kunvenon, panjo! La manĝojn por la tri tagoj mi preparos anstataŭ vi!”

“Ĉu vi scipovas tion fari?” Ŝi sentis ekvarmiĝon en sia koro.

“Mi povas fari bakitan batatpastajon kaj prepari supon, mi nur ne scias fari vermicelon.” La knabino diris kun du larĝe malfermitaj nigraj okuloj, kaj la patrino ĝojiĝis ĝis larmo, dirante: “Venu, Perlo, nun mi instruos vin pri tio.” Ŝi kondukis Perlon al la kuirejo kaj montrante la knedtabulon kaj la fornon ŝi transdonis “laboron” al la filino la unuan fojon.

Dum la tritaga kunvenado en la distrikta registaro, ŝian koron komence ĉiam tiris la hejmo. Ŝi ne sciis, ĉu ne estingiĝis la forno aŭ kiel iras la manĝopreparado hejme. Poste, ŝi simple detenis sin de pensado pri tiuj aferoj. La kvaran tagon, iom antaŭ la

tagmezo ŝi revenis al Venhi-vilaĝo. De malproksime ŝi vidis ke fumoj leviĝas de ĉiuj domoj kaj ankaŭ de ŝia kuirejo, kio multe trankviligis ŝian koron.

Enirinte la pordon, ŝi trovis ke estas silente en la korto—eble ĉiuj iris labori en la kampoj. Ŝi ŝtele enrigardis tra la fenestro de la kuirejo, kaj trovis, ke eta Perlo kun malgranda blanka antaŭtuko staras antaŭ la forno sur la piedpintoj, sub kiuj troviĝas ankoraŭ benketo tenante sorgotigan pladon kun vermiĉelo kiun ŝi enmetas manplenen post manpleno en la kaldronon.

Vidinte la scenon, ŝi ekridis, sed el la okuloj ne-reteneble elruliĝis du larmogutoj. Ŝi rapide kuris antaŭ la fornon per du-tri paŝoj kaj varme ĉirkaŭprenis la filinon en la sinon.

Ŝi transprenis la enkaldronigon de vermiĉelo kaj demandis Perlon kun rideto:

“Ĉu via paĉjo ion diris en la lastaj tagoj, Perlo?”

“Jes.” Perlo, kiu posedis denaske lertan langon kaj facilajn lipojn, jam sciis ripeti parolojn. “Kiam mi antaŭhieraŭ portis manĝaĵon al la kampo, li diris al mi, prenante manĝaĵon el la potoj: ‘Perlo, via patrino jam ne revenos! Ŝi ne plu volas vin, nek min, maljunulon. Kaj vi ne havos patrinon de nun!’” La patrino ekridis ne reteneble, vidante la filinon imitantan la voĉon kaj mienon de Jang Ĝenĝiang. “Do, kiel vi respondis?” demandis la patrino.

“Mi respondis al paĉjo,” diris Perlo, “‘Ne maltrankviliĝu, paĉjo, panjo certe revenos. Ŝi ne forlasos nin, nek vin.’ Aŭdinte tion, paĉjo tuj demandis: ‘Ĉu tion konfesis al vi via panjo?’ Mi respondis: ‘Jes!’ Pro mia mensogo, li bonapetite manĝis plurajn bovlojn da rizajo.”

“Bubinaĉo, ĉu tio estis mensogo? Ĉu mi ne jam revenis nun? Iru voki vian paĉjon al tagmanĝo!” Kaj Perlo elkuris salte kaj elirinte el la pordo tuj vokis la paĉjon kun tirata voĉo.

Revenis Jang Ĝenĝiang, kiu ĉiam ridetis ne povante fermi la buŝon. De tiam li ne plu kverelis kun la edzino, kaj ŝin vokis pli ameme per “panjo de Perlo, panjo de Perlo.” Kiam fondiĝis la kamparana unio, li estis inter la unuaj aliĝintoj.

Dum la agrara reformo, Gaŭ Hiuĝen estis elektita la prezidantino de la virina asocio de la vilaĝo, kaj estis multe pli okupita, Perlo havis tiam 15-16 jarojn, kaj portis por ŝi plejparton de la domaferoj, kaj ankaŭ lernis helpi ŝin en aranĝado de kunsidoj, kunvokado de homoj kaj mobilizado de la amaso. En tiu tempo la patrino aliĝis al la Komunista Partio kaj la filino al la Junulara Ligo. Kiam finplenumiĝis la agrara reformo en 1952, kaj la gubernia registaro disvastigis la novan akuŝigan metodon, oni nomis Gaŭ Hiuĝen la estrino de la Akuŝiga Stacio de la Distrikto. Por anstataŭigi ŝin oni tamen elektis la Perlon kiel prezidantinon de la virina asocio de la vilaĝo.

Ŝi memoris ankoraŭ, kiam en la vespero antaŭ sia foriro al la gubernia urbo por ellerni la novan metodon de akuŝigado, ŝi sidis en la vilaĝa oficejo kaj diris al sia filino, kiu sidis kontraŭ ŝi:

“Jen mi iros al la gubernio, la laboro postlasita ĉitie estas transkonfidita al vi, Perlo.”

“Jes, panjo, iru trankvile.” Kiel kutime Perlo respondis tute sen zorgemo.

“Diru, nu, kio estas la virina laboro?” Ŝi volis ekzameni la filinon.

Perlo ekkalkulis per la fingroj: “Kunvoki kunsidojn, zorgi pri publika higieno kaj purigado, disvastigi la movadon por likvido de analfabetismo, akceli familian harmonion, organizi imunigan injektaĵon, krome, disigi kaj pacigi disputantojn, malpermesi virojn subpremi virinojn!”

Ke Brile Grasu Ĉiu Porko

**Poemo de Ĝang Kiuŝeng
Ilustris He Janjong**

*Jen knabineto
en bunta vesto,
ĉiam en mano falĉileto.
Jen oriente,
jen okcidente,
ŝi herbon falĉas diligente.
Ŝia rikolto:
plenkorb' post korbo,
ke brile grasu ĉiu porko.*

Trad. Laŭlum



Monto-translokigo

Poemo de Vu Jaŭhua
Ilustris He Joŭgi

Necesas por Malsaĝa Avo* nepoj kaj pranepoj,
Por ni sufiĉas nur la simpla portovekto.
Ekagas se l' manparoj sescent milionaj,
Ne eblas ke montegoj ne lokcedu laŭ direkto.

* Heroo en ĉina antikva fablo, kiu decidis translokigi du montegojn vojbarantajn per la daŭra laborado de siaj familianoj generacion post generacio. Ĉinoj ofte lin citas kiel ekzemplon de persisteco.



Neblas Trapas' sen Elektro-livero

Poemo de Ĝeng Ĉengji
Ilustris Ĝang Luoping

Senfine torentas la Jangzi-rivero.
Sed ĉe l' Tri Montgorĝoj jen kluz-bariero.
Kampist-Laboristo manparon etendas:
"Ne eblas trapas' sen elektro-livero!"

Trad. Laŭlum

Kvazaŭ fonto fluis la recitado de Perlo. "Per tia recitado vi devus babili ĝis morgaŭ matene." Ekridis Gaŭ Hiuĝen.

"Kio ankoraŭ do?" diris Perlo.

"Mi diris, ke vi estas simple pesilo sen skalo, sed oni ne kredis. Vi scias sole kuradi, la kruroj ja estas diligentaj! Tamen, de nun vi estas prezidantino de la virina asocio, kaj devas uzi vian kapon. La virina laboro estas laboro de prizorgado al homoj. Zorgu ĉiujn virinojn de la malriĉaj familioj, helpu ilin por levi ilian klasan konscion kaj organizi ilin en produktajn laborojn. Koncerne al ĉiuj dumtempaj centraj laboroj, sufiĉos nur sekvi la vorton de la Partio kaj helpi ĝin en plenumado de la donitaj taskoj. . . ."

"Mi scias jam," intermetis tiam Perlo, "kaj ne lasu disfali niajn du interhelpajn grupojn."

"Prave," diris Gaŭ Hiuĝen. "Tamen, tio ankoraŭ ne estas ĉio. Propagandu al virinoj la avantaĝon de interhelpo kaj kooperado. Tio estas grava afero, koncernanta la demandon kiun vojon ni kamparanoj sekvu, afero ne bagateligebla.

Kiam ŝi diris tiujn vortojn, la knabino ŝtele ekmontris la langon. Sed, poste, Perlo eklaboris tute aŭdace. Kaj kelkiam ŝi imitis la metodon kaj manieron de sia patrino en okazigo de kunsidoj kaj en propagando.

Gaŭ Hiuĝen laboris en la Akuŝiga Stacio por tri tutaj jaroj. En la jaro 1955, la nova akuŝiga metodo estis disvastigita preskaŭ tra la tuta distrikto. Kaj en la stacio estis trejnita vico da novaj akuŝistinoj. Kutime, Gaŭ Hiuĝen propagandis la novan akuŝigan metodon en ĉiu vilaĝo, kiun ŝi alvenis. Ŝi eĉ kunvokis la prezidantinojn de la virinaj asocioj de ĉiuj vilaĝoj,

kun aprobo de la distrikta partia komitato, por kune priobservi kaj lerni la novan metodon de akuŝigado. Tiel, ankaŭ Perlo tion lernis de ŝi.

En la printempo de tiu jaro, funkciis en la gubernia urbo higiena kurso, kiu ankaŭ instruis novmetodan akuŝigadon, kaj la varbitaj kursanoj devis esti almenaŭ gradiĝintaj el elementa lernejo. Perlo estis tiam sendita de la distrikto por lerni en ĝi. Kiam ŝi revenis de la kurso, ĝuste leviĝis la alta tajdo de agrikultura kooperativigo. La ses vilaĝoj sub la malgranda administra unuo de Venhi-vilaĝo estis unuigitaj en unu grandan kooperativon. La distrikta registaro decidis tiam nomi al la kooperativo kapablan kaj fidindan virinan direktoron, kaj transpostenigis Gaŭ Hiuĝen al la altgrada kooperativo. Perlo, kiu ĵus revenis de la kurso, estis destinita por transpreni la laboron postlasitan de ŝia patrino, kiel nova estrino de la Akuŝiga Stacio.

Tio estis alifoja transdono de laboro.

Tiufoje, Gaŭ Hiuĝen estis tute sen maltrankviliĝo. Ŝi trovis ke la filino notis plenan kajeron da novaj terminoj en la kurso, ellernis ankaŭ la uzadon de stetoskopo kaj injektadon, kaj sciis eĉ pli multe ol ŝi mem, kaj ŝia laborstilo estas aŭdaca kaj kuraĝa. Nur pri unu punkto ŝi estis ankoraŭ iom hezitema: Perlo estas fraŭlino 17-18-jara, ankoraŭ ne edziniĝinta. Ĉiuokaze ne estas tre konvene por ŝi okupi sin per tiu laboro. La fianĉo, kiu lernas en mezlernejo, eble diros nenion. Sed kion dirus la ge-maljunuloj de la familio? Kaj, jen, foje ŝi renkontis la bopatron de Perlo, kiu diris al ŝi: "Plenkreskaj fariĝis la infanoj, estus bone havigi ian alian laboron".

Alveninte hejme, ŝi rakontis la aferon al Perlo, kiu tuj eksplodis, dirante: "Kio hontinda estas en la laboro? Feŭdisma penso! Mi parolos kun la maljunulo!" Parolante, ŝi ekŝvingis la harojn, ekstaris kaj eliris.

La hejmo de la fianĉo de Perlo situis ĉe la orienta fino de la vilaĝo. La patrino postkuris revokante ŝin, sed malgraŭ la ripetitaj revokoj, Perlo jam ĝisiris la lokon. Kaj kia hazardo, la maljuna patro de la fianĉo ĝuste staris tie ĉe la draŝejrando kaj Perlo lin renkontis.

Ŝi alpaŝis kaj diris kun nenja hontemo: "Paĉjo! Vi estas hejme, mi petas interkonsiliĝi pri io kun vi."

Ke la bofilino ankoraŭ ne edzinigita venas por "interkonsiliĝi", iom embarasis la maljunulon. "Nu . . . nu! Diru do." Li murmuris, flanken turnante la vizaĝon.

Gaŭ Hiuĝen, trovante ne bone renkontiĝi tiam kun la bopatro de Perlo, haltis ĉe la stratfino kaj tie aŭskultis kun la dorso kontraŭ ili.

Jen ekparolis Perlo: "Paĉjo! Mi havas ion por komuniki al vi. Ni ja vivos kune en sama familio estonte; estus ja malbone ke pro io oni havu vizaĝon jen ruĝan jen bluan unu kontraŭ alia."

Dum parolis Perlo la maljunulo murmuris en la gorgo: "Jes! Jes!"

"Temas pri mia laboro, la laboro de la Akuŝiga Stacio ja ne estas io hontinda. Oni ne devas rigardi per malnovaj okuloj. En la grandaj hospitaloj en la urbo, tiujn laborojn faras senescepte junaj virinoj, kio estas malbono en tio? Ĉiu homo ja kreskas el malgranda bebo. Antaŭe, ĉitie ĉe ni, el 10 beboj oni povis vivi nur 5-6. Nun dank' al la apliko de novmetoda akuŝigo, ĉiuj naskitoj povas vivi, sanas la patrino, kaj sanas ankaŭ la infano. La vivpova proporcio atingis 96%, sciu! Procento? tio estas, el 100 beboj vivas 96. Tia bono ĝi estas por ni. Vidu, paĉjo, kian malhonoron ĝi povus havi en si?"

Perlo parolis ritme kaj klare vorton post vorto, dume la bopatro senĉese balancis la kapon kun bruliĝo de la vangoj. Kiam finparolis Perlo, li ridis karesante la barbon, dirante: "Nu . . . Nu! . . . Prave vi parolis. Mi ja dekomence havas nenion kontraŭ tio!"

Gaŭ Hiuĝen aŭdis ĉion ĉe la stratfino. La filino aplombe parolis, montrante nenian hontemon aŭ timemon. La vortoj, kvazaŭ tute pretaj ĉe la lipoj, sonis prave kaj konvinke. Subite ŝian koron ekkaptis forta sento de admiro. Kian feliĉon havas la nunaj knabinoj—ŝi pensis en si—ili povas iri kien ajn, kaj diri kion ajn. Ŝi ekmemoris, ke antaŭe, kiam ŝi estis infanbofilino,* dum 13 jaroj vivante en la familio de Jang, ŝi ne parolis eĉ unu frazon kun Jang Ĝeng-hiang, restante kvazaŭ muta ĉiutage. Tion pensante, ŝi sentis, ke la Perloj vere vivas en bona tempo.

Kaj ŝi dume aŭdis Perlon diri al ŝia bopatro: "Nu do bone, paĉjo! Mi reiros. Bonvolu veni al ni, kiam vi trovos libertempon."

La maljunulo murmuris kapjesante, kaj Gaŭ Hiuĝen aŭskultante nereteneble ekridis.

Kiam Perlo revenante trovis ŝian patrinon, ŝi tuj diris ridante: "Mi jam parolis kun li, panjo. Li diris, ke li havas nenian kontraŭopinion."

"Kaj vi ja estis vere kuraĝa por paroli kun li!" Gaŭ Hiuĝen intence rondigis la okulojn.

"Kio? Li estas homo, ankaŭ mi estas! Kion la Partio volas, tuj mi faros. Neniu povos min malhelpi. Pro kio mi timu antaŭ li?" Parolante, Perlo ekridis petoleme rigardante la patrinon.

Post reveno al Venhi-vilaĝo, Gaŭ Hiuĝen laboris kiel direktorino de la altgrada kooperativo por kelkaj jaroj ĝis nun. Komenciĝis la antaŭensaltego en la jaro antaŭ la pasinta, Venhi-vilaĝo elpaŝis kun la grandskala irigacia konstruado kaj verdigo de la nudaj montoj. Sub gvidado de la partia filio, ŝi partoprenis

* En la malnova tempo malriĉa familio pro ne eblo de vivtenado ofte sendis ŝian malgrandan filinon, kiel infanbofilinon, por ke ŝi vivu en la domo de siaj bogepatroj. La infanbofilino ofte havas amaran vivon.

la movadon kune kun la junaj kaj plenkreskaj virinoj de la kooperativo. Post pena lukto dum vintro kaj printempo, oni finkonstruis 13 malgrandajn akvokonservejojn kaj pli ol 700 muojn da ŝtupar-kampoj. Kiam fondiĝis la popola komunumo, Venhi-vilaĝo fariĝis unu el administra distrikto. Oni per la tuta forto de la komunumo plene verdigis ankaŭ la de multaj jaroj kalvan monton Ŝaŭsi en duona monato.

Nun, kiam Gaŭ Hiuĝen marŝante sur la vojo vidis la densajn, smeralde verdajn ombrelsimilajn arbetojn kaj la plantaĵojn kreskantajn en la ŝtupar-kampoj, ŝi sentis en sia koro apartajn amon kaj dolĉon. Tiuj montoj, kiujn ŝi trovis nur grandaj kaj malbelaj, kiam ŝi antaŭe kolektis hejtajojn sur ili, nun estas kvazaŭ haroj de junaj knabinoj, kiujn oni povas laŭplaĉe aranĝi, plektante el ili tiom da harplektaĵoj kiom oni volas, en maniero dezirata!

En krepusko Gaŭ Hiuĝen revenis al la vilaĝo.

Unue ŝi faris kontrolan rondiron al la manĝejoj, pririgardis la manĝaĵojn kaj palpis la mantoŭ-ojn. Poste ŝi iris al la infanvartejo por vidi la infanojn. Tiam la patrinoj jam revenis de la kampoj por reporti siajn etulojn, kaj Gaŭ Hiuĝen iom babilis kun kelkaj patrinoj. Kiam ŝi alvenis al sia domo, la luno jam montris sian vizaĝon.

Tiam, maljunulo Jang Ĝenghiang ankaŭ jam revenis de kunsido. Li demandis ridante: “Panjo de Perlo, certe la partia komitato denove instrukciis pri ia laboro, ĉu ne?”

“Jes ja!” diris Gaŭ Hiuĝen, “mi estas denove transpostenigita; ĉifoje, al io tute nova!”

“Ho, kio do?”

“Provu diveni!”

“Nun ja tro multas novajoj; industrio, agrikulturo, komerco, eduko kaj militaj aferoj — pri ĉio la komunumo zorgas. Eldiveni mi ne povas,” diris Jang Ĝenghiang frapetante sian kapon. “Mi estas nomita fabrikestrino,” diris Gaŭ Hiuĝen, “estrino de la alkoholaj-fabriko de nia komunumo.”

“Ho! Ĉu tiun rolon vi povos ludi?” “miregis Jang Ĝenghiang kun rondigitaj okuloj.

“Kian aferon ne lernas la homo? Sufiĉos pli multfoje konsulti la partian komitaton.”

“Kaj vi efektive transiĝis nun al la industrio, dum mi ankoraŭ daŭre okupas min pri la malnova agrikulturo,” diris ridetante Jang Ĝenghiang. “Do, mi produktu pli multe da bonaj batatoj por via fabriko.” Kaj ambaŭ ekridis.

Post momento, ree demandis Jang Ĝenghiang: “Tiam, kiu estos la nova respondeculino de la virina fako de nia administra distrikto?”

“Estas neniu alia ol nia Perlo,” respondis Gaŭ Hiuĝen.



Angulo de la Elektromotora Fabriko de Bejinkiaŭ-a Popolkomunumo en Pekino.

Ĉinstila pentraĵo de Vu Gingbo

“Mi jam divenis, ke estos ŝia vico!” ridis Jang Ĝenghiang. “Ŝi scias ĝuste sekvi viajn paŝojn!” Kaj kortuŝite diris Gaŭ Hiuĝen: “Fakte, ankaŭ mi ja nur sekvas la paŝojn de la Partio!”

Frue en la sekvinta mateno, kure revenis Perlo de la urbeto Ĝaŭhua, spiregante kun ruĝaj vangoj. La mallongaj nigraj haroj estis gluitaj al la frunto de ŝvito. Tuj ŝi vokis, ensaltinte en la kortpordon:

“Panjo! Panjo! Kie estas Panjo?” Vokante, ŝi traserĉis en la ĉambroj, brue levante la pordkurtenojn. Kaj Gaŭ Hiuĝen ekriproĉis, elirante al la korto:

“Jen mi estas. Pro kio tiel vokadas, kvazaŭ por revoki perditan animon, vi aĉa bubino?”

Ekvidinte la patrino, Perlo ekridegis ĝis ŝi kaŭris sur la tero, ne povante sin rektigi.

“Kion vi volas de mi?” intence demandis Gaŭ Hiuĝen.

Ne respondis Perlo, sed nur ridis dirante: “Panjo! Ĉu vi divenis, kiu sendis min por transpreni vian laboron? Estis mi mem, kiu petis tion de sekretario Hju! Post ripetitaj petoj, li fine konsentis.”

“Denove via artifikajo! Bone estas en la Akuŝiga Stacio, kial do vi petis reveni ĉi tien?”

“Mi ja ne volas resti tie. Pasintjare, vi antaŭen-saltegis ĉi tie, konstruis akvokonservejojn, kulturis altproduktajn kampojn. Ĝismorte mi malpacienis tie! Jen, vidu, preskaŭ malaperis la kaloj sur miaj manoj. Mi volas reveni al agrikulturaj laboroj. La Akuŝiga Stacio estas enuiga!”

“Jen, por kaj kontraŭ ambaŭ estas de vi diritaj. Kiel vi tiam parolis kun via bopatro?”

“Tio estas pri tiam. Nun, jam estas multaj homoj en la Stacio.”

“Mi ne volas tiom babili kun vi,” diris Gaŭ Hiuĝen. “Venu, do! Laboron transprenu!” “Jen, mi venas ĝuste por tio!” diris Perlo, elpoŝigante sian notlibron.

Tiel, la patrino kaj la filino transdonis la laboron unu al la alia en la korto, ambaŭ tenante en la mano po malgrandan notlibron. Gaŭ Hiuĝen komunikis al la filino, kiom da infanvartejoj, manĝejoj kaj kudromaŝinoj troviĝas nun en la komunumo, kiuj estas la estrinoj de la virinaj laborgrupoj, kiuj estas partianoj, kiuj—liganoj, kiel statas la laboro. Detale rakontis la patrino, kaj serioze ĉion notis la filino. Tiel pasigis longan horon la patrino kaj la filino en la labortransdono.

Komunikinte jam la tutan situacion, Gaŭ Hiuĝen diris: “Sciu, Perlo, nun, la virina laboro ne estas tiom simpla, kiom en la tempo de kooperativo. Ne estu malatenta, sed serioza kaj respondeca. Diligente raportu al la partia filio, por akiri ties helpojn. Pensu, la administra distrikto estas tiel granda, ampleksante dek kelkajn vilaĝojn, do ne ŝparu piediradon. Ju pli la amaso nun kredas la kadrojn kaj la Partion, des pli ni devas ilin prizorgi. Virinoj ja prenas grandan parton de la produktado. Kaj, cetere, la infanvartejoj kaj manĝejoj estas la plej gravaj aferoj, nepre ilin bone priatentu kaj neniom neglektu!”

Kvazaŭ al edziniĝonta filino, ŝi admonadis, kaj Perlo kapjesadis kunpremante la lipojn, kun rigardo direktita al la vizaĝo de ŝia patrino.

Kiam finiĝis la transdono de la laboro, la patrino kaj la filino ekbabilis sindistre. Perlo diris

al la patrino rigardante ŝian harbulon: “Panjo! Vi nun fariĝas fabrikestrino! Ne dece aspektas tiu via harbulo. Nu, lasu min fortondi ĝin por vi.”

Vidinte ke ŝi jam iris por preni tondilon, Gaŭ Hiuĝen rapide stariĝis kaj diris ridetante: “Lasu min, vi, senskala pesilo! Mi estas duoncentjarulo, ĉu mi ankoraŭ imitu vin junulinojn, sin tondi kiel koturnon stumpovostan? Mi nun ankaŭ zorgas pri la aspekto.”

“Mi ne tondos tro mallongaj, kiel ĉe ni,” diris Perlo, “sed restigos la harojn longaj ĝis sub la oreloj. Kiel bele aspektis la virinoj el Pekino, kiuj venis al ni esplorvojaĝe antaŭ kelkaj tagoj, ĉiuj samaĝaj kiel vi kaj kun mallongaj haroj.” Tion dirante, ŝi denove estis tondonta.

“Mi ne volas tion! Bubinaĉo!” ŝin forpuŝis Gaŭ Hiuĝen.

“Vi ja nun turniĝis al la industrio, kiel fabrika estrino!”

“Jen tia mi estas. Tia mi jam aŭdienciĝis ĉe la subprovincestro, kaj same ankaŭ ĉe la provincestro, ĉu necesus tondi mallongaj la harojn por esti fabrikestrino?” rediris Gaŭ Hiuĝen kovrante sian harbulon per mano. Perlo lasis la tondilon, dirante: “Lasu! lasu! Mi do ne tondos por vi la harojn.” Kaj ŝi foriris.

Post tagmanĝo, kiam Gaŭ Hiuĝen siestis, ŝi aŭdis subite ĉe orelo tondgrincon. Ŝi tuj vekigis, sidlevigis, kaj jen ŝi trovis, ke Perlo jam fortendis de ŝi la harbulon. “Vi ja vere fortendis de mi la harojn, Perlo!” palpinte la kapon, Gaŭ Hiuĝen kaj ridis kaj riproĉis. “Atendu, ke mi mortbatos vin, bubinaĉo!”

Sed ridegis Perlo sin klinante antaŭen kaj malantaŭen kaj diris konteste: “Rigardu mem en spegulon, panjo! Ja multe pli bele!”

“Ĉu mi petis vin plibeligi min?” diris Gaŭ Hiuĝen kaj alpaŝis por ŝin bati, sed Perlo jam retiris sin kaj forkuris ridante.

Tiam estis vekita ankaŭ Jang Ĝenĝiang, siestante en la interna ĉambro, kaj el tie ekdemandis:

“Pro kio vi bruas?”

Gaŭ Hiuĝen iris al li, ridante: “Vidu, via bubinaĉo fortendis de mi la harojn!”

“Panjo de Perlo!” subite ekridis Jang Ĝenĝiang, pririgardinte ŝian kapon. “Bele! Vere bele, multe pli juna vi aspektas!”


“Ĉu vere?” demandis Gaŭ Hiuĝen, rigardante en la spegulon.

“Vidu mem, vidu mem,” diris Jang Ĝenĝiang starante flanke. “Almenaŭ je dek jaroj pli juna!”

Trad. Tikos

Liu Kajkju:

BRILAJ SUKCESOJ de la ĉina skulptarto



Unu el la kvar marmoraj barelifaj prezentantaj la unuecon de nia patrolando kaj la unuiĝon de la ĉinaj nacioj.

*Kolektive skulptita de Fu Tianĉoŭ,
Vang Linĵi, Juan Hiaŭkin k. a.*

DANK' al la multflanka antaŭenpuŝo kaj helpo de la Ĉina Komunista Partio kaj la Popola Registaro, la ĉina skulpta laboro multe disvolviĝis kaj akiris grandajn sukcesojn post la Liberiĝo de la lando. Precipe ekde 1958 kiam komenciĝis la granda antaŭensalto, la skulpta laboro des pli prosperas senprecedence kune kun la impeta progreso de la nacia ekonomio kaj ĉiuj aliaj laboroj.

En la historio la ĉina skulptarto iam okupis brilan paĝon, sed poste, ĝi dekadencis tagon post tago. Dum la reakcia regado de Kuomintango, ĝi tiom velkis ke ĝi falis en agonion. La skulptistoj ne povis trovi skulptan laboron. Tiuj kiuj ellernis ĉi tiun arton devis ŝanĝi sian profesion, kaj tiuj kiuj estis ĝin lernantaj, ekhezitis duonvoje. Tio estas ankoraŭ freŝe konservita en la memoro de ĉiuj skulptistoj pli ol 30-jaraĝaj, sed nun jam forpasis por ĉiam kune kun la malnova Ĉinio.

Dum la mallonga tempo de 11 jaroj post la fondiĝo de nova Ĉinio, la skulptaj fakultatoj de belartaj institutoj kaj lernejoj sole eikulturis jam centojn da junaj skulptistoj. Tiuj skulptistoj kiuj devis ŝanĝi sian profesion pro manko de skulpta laboro antaŭ la Liberiĝo, nun revenis al sia malnova kariero kaj sin okupas per kreado en tiu arto. En Pekino, Ŝanhajo, Ŝenĵang, Hangĝoŭ, Kantono, Ĉongking kaj aliaj grandaj urboj kaj en la belartaj institutoj kaj lernejoj estas starigitaj skulptaj fakoj aŭ produktejoj de skulptaĵoj, kiuj provizas necesajn kondiĉojn por la artokreado al skulptistoj, junaj kaj maljunaj, same kiel al la popolaj skulptistoj. Kvankam la nombro de skulptistoj multe kreskis, ili tamen ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonojn de skulptaĵoj de la socio. Precipe ekde la apliko de la ĝenerala linio, la komen-



La Kontraŭjapana Rezistmilito (unu el la marmoraj bareliefoj ornamantaj la Monumenton al la Popolaj Herooj)
Skulptis Ĝang Songhe

ciĝo de la antaŭensalto kaj la fondiĝo de la popolaj komunumoj, la nombro de la bezonataj skulptaĵoj de ĉiuj sferoj, tiom kreskis, ke multaj el la skulptistoj kaj skulptaj laborejoj ricevis tiom da mendoj, kiom ili ne povos plenumi en du aŭ tri jaroj.

Kreskis la nombro de skulptistoj, kaj ege plimultiĝis ankaŭ la skulptaĵoj. Krom la Monumento al la Popolaj Herooj sur la Placo de Tian'anmen en Pekino, la statuo de Lusin en Ŝanhajo, k.a., faritaj en la unuaj jaroj post la Liberiĝo, sole la grandtipaj monumentoj kaj statuoj skulptitaj en la lastaj tri aŭ kvar jaroj nombris jam pli ol dudek. En 1959, por festi la dekan datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, estis faritaj pli ol 300 skulptaĵoj, grandaj, malgrandaj kaj ornamaj. Rilate la verkojn de la skulptistoj faritaj dum ordinara tempo, ilia kvanto estas nekalkulebla.

Ne nur mult-nombraj estas la skulptaĵoj, sed multaj el ili ankaŭ akiris brilajn novajn sukcesojn en la arta kreado.

La du statuaroj antaŭ la Pekina Agrikultura Ekspoziciejo, titolataj "Vivu la Popola Komunumo", estas kolektiva kreaĵo de la skulpta fakultato de la Lusin-a Belarta Kolegio. Per impona plastika formo, klaraj figuroj kaj senĝena stilo, la artistoj prezentis la ĝojan kaj entuziasman animstaton de la ĉinaj kamparanoj ĉe la fondiĝo de la popola komunumo. En la arta traktado de tiuj du statuaroj naŭ metrojn altaj, la skulptistoj aplikis la ĉinan tradician skulptarton kaj elstarigis la grandiozan spiriton kiun la temo entenas, tiel ke la kreaĵoj estas plenaj je freŝa nacia spirito kaj ĝuas ĝeneralan bonakcepton kaj laŭdon. "Miliono da Servutuloj Stariĝis", verko de

juna skulptisto Long Dehuj, prezentas per la maniero de la ĉina antikva ŝtongravura arto la tibetajn kamparanojn liberigitajn. Ĝi estas verko viva kaj forta, spiranta nacian skulptan stilon. De la ekzem-

Unu el la dekoraciaj skulptaĵoj al la Pekina Laborista Stadiono.

Kolektive skulptis la Ĉina Skulptaĵo-produktejo.





Porkobredistino

Skulptis Gu Haŭ

ploj supremenciitaj oni povas vidi, ke nia socialisma kaj nacia nova skulptarto estas en formiĝo. Tio estas speguliĝo de la nova epoko, granda sukceso de la popola skulpta arto.

Tra la vasta tero de tuta Ĉinio, ĉie bolas grandioza konstruado de industrio, agrikulturo kaj kulturo, kaj ĉiuj nacioj de nia lando ĝoje kaj vigle progresas antaŭen flugrapide. Tiu ĉi epoko, ŝtorme entuziasmiga kaj batalspiriton svinganta, kaj tiu ĉi riĉenhava kaj multkolora socia vivo prezentas al la skulptistoj plej bonajn kaj neelĉerpeblajn materialojn kaj donas al ili la plej freŝan inspiron por ilia kreado. La grandaj blankmarmoraj statuoj "La Mara, Tera kaj Aera" kaj "La Tuta Popolo en Armeo", starigitaj antaŭ la Milita Muzeo de Ĉina Popola Revolucio, estas verkoj de la skulptistoj Zeng Ĝuŝaŭ kaj Ju Ginjuan. La unua prezentas tri batalantojn, maran, teran kaj aeran, kiuj vive esprimas la herocon de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj reliefe montras ĝian ĉiam triumfan heroismon en la defendo de la patrio. La dua reliefigas la popolamasojn ne nur kiel lertulojn

en la konstruado sed ankaŭ kiel firmvolajn defendantojn de sia socialisma patrolando. Tiuj ĉi du statuoj, kun sia grandioza plastika formo, simpla sed esprimriĉa stilo, kaj aldone kun la sereneco de la blanka marmoro, donas impreson neniam forgeseblan. En transformado de la naturo, la ĉina popolo montras senegalan herocon "devigi la altajn montojn kaplini kaj la riverfluojn vojeedi". Tio inspiras la skulptistojn kaj ne malmultaj el ili kreis elstarajn verkojn sub tiu temo. Ekzemple la statuo "Monton Fendi kaj Maron Krei", farita de kelkaj junaj skulptistoj de la Ĉina Skulptaĵo-produktejo en Pekino, kiu, per forta plastiko, prezentas kamparanon kiu per ambaŭ manoj depuŝas flanken du montojn kaj formas maron per konservata akvo por irigacii milionojn da muoj da tero, kio profunde simbolas la heroan aspiron kaj grandan ambicion de la ĉina popolo en konstruado de sia patrio, kaj prikantas la senprecedencajn venkojn akiritajn de la ĉina popolo en la transformado de la naturo. Ĝuste ĉar la artistoj sekvis la karakterizaĵojn de tiu ĉi mondsdua epoko, iliaj verkoj atingis artajn rezultatojn eksterordinare impresajn kaj estas saturitaj de riĉa kreemo. La kvar marmoraj reliefoj en la ĉefa salono de la Kultura Palaco de Nacioj en Pekino (faritaj de Vang Linji, Juan Hiaŭcen, Fu Tianĉou, k.a.) prezentas la ĝojon post la Liberiĝo de la naciaj malplimultoĵ loĝantaj en la norda, suda kaj



Vekiĝo

Skulptis Long Dehuj



Revolucia leviĝo ĉe Nanĉang (Unu el la marmoraj bareliefoj ornamantaj la Monumenton al la Popolaj Herooj)
Skulptis Hiaŭ Ĉuangiu

okcidenta partoj de Ĉinio kaj priskribas la novan aspekton de grandnombra apero de fabrikoj, hidroelektraj stacioj. . . , prospero de la agrikulturo kaj bestobredado kaj la vasta starigo de akvomastromaj konstruaĵoj en la antaŭe dezertaj norda kaj sudokcidenta landlimaj regionoj dank' al la unuiĝo kaj interhelpo de la tuta popolo. Tiuj ĉi kvar reliefoj surhavas figurojn de viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj, apartenantaj al dekoj da nacioj, kun malsamaj aspektoj kaj en malsamaj kostumoj, kantantaj kaj dancantaj sur vasta lando plena de novaj konstruaĵoj. La tuto formas emociigan simfonion de skulptarto.

La gravuro de eburo kaj Kingtian-ŝtono kaj la farado de popolaj kolormodlaĵoj ankaŭ multe disvolviĝis. La aŭtoroj ne nur skulptas antikvajn heroojn kaj scenojn de mitologiaj rakontoj, sed ankaŭ prezentas la nuntempan popolan vivon. Ekzemple la ebura gravuraĵo "Kvin Knaboj en la Abunda Rikolto" de Jang Zihuj, la kolora modlaĵo "Ruĝas la Oriento" de argilaj-statuisto Ĝang, la Kingtian-ŝtona gravuraĵo "Giganta Drako en la Oriento" de Pan Juĉen, la ligno-gravuraĵoj de Dongjang faritaj de Ma Fengtang, la porcelanaj figuroj de Gingdeĝen (Gianghi-provinco) kaj de Ŝivan (Guangdong-provinco), ĉiuj, konservas, unuflanke siajn originajn bonajn artradiciojn, aliflanke enkorpigis ankaŭ novan fizionomion de la popola epoko, kaj tiel kreis freŝnovajn artajn florojn. Krome, la skulptado de bestaj figuroj ankaŭ akiris grandan disvolviĝon. En la lastaj jaroj la skulptisto Ĝoŭ Kingding faris multe da lertaj kaj viglaj figuroj de bestoj. La skulptistoj de Kantona Skulptaj-produktejo faris gigantan granitan gravuraĵon "Kvin

Ŝafoj" kaj ĝin starigis kiel urban simbolon en Kantono kiu kromnomiĝas laŭ legendo "Urbo de Kvin Ŝafoj". Laŭ la menciitaj verkoj oni jam povas bone konvinkiĝi ke la skulptaj kreaĵoj de nova Ĉinio estas tre ampleksaj kaj riĉaj je temoj kaj materialoj, variaj en speco kaj formo kaj ĉiu kun sia propra stilo. Jen vere "samtempa disvolviĝo de cent floroj", el kiuj ĉiu brile prosperas.

La progreso de la nova skulptarto estas rezultato de la multflanka antaŭenpuŝo kaj helpo de la Ĉina Komunista Partio kaj la Popola Registaro; ĝi estas ankaŭ speguliĝo de la rapida kresko de nia nacia ekonomio kaj la leviĝo de la materia kaj spirita vivo de nia popolo atingitaj sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio. La fakto ke la skulptistoj povis akiri en sia kreado tiom da artaj atingoj en la lastaj malmultaj jaroj devenas ankaŭ de tio, ke ili firme sekvis la direkton de servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj servo al la afero de socialismo, kaj la literaturan kaj artan vojon de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj, kaj de evoluigo de novo el malnovo. Ĉar, servante al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al socialismo, la kreado de la skulptistoj trovis novan celon, novan idealon de beleco kaj plej vastajn temojn kaj materialojn kaj la politikoj de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj, kaj de evoluigo de novo el malnovo havigis al la skulptistoj plej vastan kaj plej liberan kampon de arta kreado. La skulptistoj de nova Ĉinio, marŝantaj sur tiu larĝa literatura kaj arta vojo socialisma, jam kreis freŝnovan skulptarton, kaj estas certe ke ili kreos ankoraŭ pli novajn kaj pli belajn en la estonto.

Kion ili faris por ŝtalo

— Korespondaĵo el Ŝanhajo —

DUM la alta tajdo de la kampanjo por pliprodukto kaj ŝparo, la ŝanhajaj ferŝtalaj laboristoj luktas tage kaj nokte por ŝtalo antaŭ la fornoj pro ĉiu minuto kaj ĉiu sekundo. Kaj laboristoj kaj oficistoj de aliaj profesioj, kiuj priservas la ferŝtalajn fabrikojn, ĉiuj pensas en si: “Kion mi povas fari por ŝtalo?”

Persona vizito por konstrui bezonatajn maŝinojn

La ferŝtalaj fabrikoj sidantaj ĉe ambaŭ bordoj de Huangpu-rivero montriĝas pli aferoplenaj en la lastaj monatoj de la jaro 1960. Inter la tien kaj ĉitien rapidantaj homoj, estas iuj, kiuj iras kun gastanoncilo en mano al ŝtalfornoj, akompanate de ŝtallaboristoj.

Kiuj ili estas? Ili estas laboristoj kaj oficistoj de ŝanhajaj maŝin-fabrikoj, kiuj elsendis multajn laboristojn kaj oficistojn profunden en la ferŝtalajn fabrikojn por helpi ilin en solvado de ekipa demando kaj tiel glatigi al ili la vojon de pliprodukto, kiel apogo al ilia strebado en realigo de granda pliprodukto de ŝtalo en la lastaj monatoj de 1960.

Antaŭ nelonge, venis al la deponejo de gisfero de la Ŝanhaja Unua Ŝtal-fabriko kvar tiaj gastoj. Ili estis de la Ŝanhaja Popola Maŝin-fabriko, kiu estis komisiita de la supera instanco por konstrui gisferdisrompajn maŝinojn, kiujn bezonas la ŝtalfabrikoj. Kvankam ĝi antaŭe neniam tiajn produktis, tamen ĝi akceptis la taskon sentante senkomparan honoron povi kontribui sian forton por ŝtalo. Por bone plenumi la taskon, en la frua mateno du respondeculoj de la teknika fako kaj du malnovaj laboristoj estis senditaj al Ŝanhaja Unua Ŝtalfabriko.

Kiam la kvar gastoj pririgardis la materialon sur la deponejo kaj informiĝis pri kelkaj detaloj de la akompanantaj personoj de la ŝtalfabriko, ili jam havas ideon en si. Rompmasinoj estas bezonataj, ĉar la ferfandaj laboristoj lastatempe adoptis iun novan teknikon, kiu postulas disrompon de gisfero en malgrandajn pecojn por multe pli-grandigi la produkton de ferlikvaĵo kaj tiel kontentigi la bezonojn de pliprodukto de ŝtalo. Sciinte la utilon de la maŝinoj, ili des pli sentis la gravecon de la tasko,

Reveninte de la vizito la kvaropo tuj ekagis. Oni sendis komisiiton por interŝanĝi spertojn kun frataj fabrikoj, kaj formis samtempe sturmgrupon por projekti la maŝinon. Projektante ili interkonsiliĝadis klopodante ĉiumaniere fari la maŝinojn kontentigaj al la postulo labori multe, rapide, bone kaj ekonomie. Por eviti pliigon de ekipaĵo oni forlasis la projekton de martelmovo per kunpremita aero kaj prenis la projekton de martelmovo per elektro, ĉar ĉe la deponejo ili trovis multajn elektrajn komutilojn. Post tritaga klopodo estis fine pretigita la projekto de memelpensita trirada movebla disrompa maŝino por gisfero. Nun tuj komencis urĝan fabrikadon la produkta fako, kaj estis bone aranĝita ankaŭ la prilaboro de la maŝinpartoj produktotaj de aliaj fabrikoj. Kaj la 108 maŝinpartoj estis prilaborataj, trapasante de unu ilmaŝino al alia, tute senhalte — ĉiam estis lumigata por ili la “verda lampo”. La rapideco de ilia produktado estis senprecedenca en tiu fabriko, kompare kun ĉiuj antaŭaj produktadoj.

Pli rapida transporto, ĉu longadistanca ĉu mallongadistanca

Ekde la lasta tagdeko de aŭgusto, la fervojaj stacioj proksimaj al la ŝtalfabrikoj montriĝas eksterordinare aferoplenaj. Trajnoj kaj trajnoj da diversaj eroj, kalkostonoj kaj koakso estas alportataj rekte el la produktoj. Tiuj rapidaj trajnoj ne haltantaj dum

Streĉa Batalo antaŭ la Fornego

Lignogravuraĵo de Vang Ki



la vojo, nomataj “Ruĝdrakaj Ekspresoj”, estas speciale organizitaj de la Ŝanhaja Fervoja Administracio por helpi la pliprodukton de ŝtalo. Ilia rapida transporto de difinitaj kvanto, tempo kaj veturlinio, multe mallongigis la distancojn inter la ferŝtala bazo en Ŝanhajo kaj la bazoj de krudaj materialoj en la diversaj provincoj de orienta Ĉinio.

Dum la plirapidigo de la transporto la laborantoj de la fervojo, krome, ankaŭ meminitate klopodis plivastigi la fontojn de kruda materialo. Ne longe antaŭe, la estro de vartransporta sekcio de la Ŝanhaja Fervoja Administracio Ĝou Ĉe veturis al la produkta loko de kalkoŝtonoj Longtan en Giangsu-provinco por enketi la tian produktadon. Li trovis ke la pliproduktado iras ne bone pro manko de ia benzino kaj alia materialo al la produktantoj. Ĝou Ĉe studis la aferon kun koncernataj instancoj kaj la problemo solviĝis dank’ al lia helpo. Sekve rapide plimultiĝis la kvanto de kalkoŝtonoj sendata el Longtan.

Kiam impulsas vige la grandaj arterioj de fervoja kaj mara transportado, ne postrestas ankaŭ la malgrandaj de mallongadistanca transportado. La 104-a aŭtotrupo de la Unua Transporta Stacio de la Ŝanhaja Unua Transporta Administracio — unu el la landaj pioniraj kolektivoj — levis inter si altan tajdon de laborkonkurso. Unu ĝia avangarda subtrupo, defiante la aliajn subtrupojn, starigis por si labornormon po 450 tunoj ĉiudejore, kaj tion ĝi ofte superplenumas lastatempe, iufoje ĝi eĉ superis la ciferon de 900 tunoj. La transportaj laboristoj ne nur konkuras en rapideco, sed ankaŭ en ŝparado. En la fervoja stacio de Ĝanghuabang estas uzata de antaŭ nelonge nova ferŝovelilo, kiun faris tieaj laboristoj, kiuj domaĝis la perditajn ferpecetojn elfalintajn el la malnova ferporta reto, dum sargado kaj deŝargado de gisfero. Ili diris: “Ne grandaj estas la elfalintaj ferpecoj, sed multaj pecetoj formos grandan kvanton.” Tiel ili kune studis kaj sukcesis fari novan senmaŝan ferportilon dum siaj liberaj horoj. Nun ne plu estas perditaj malgrandaj ferpecoj.

La proviantsoldatoj alportas provizaĵon ĝis la pordo

“Vi ne scias, kamarado, kiom multe estas reduktita la kvanto de transportitaj materialoj en unu tago, se ĉesas funkcii unu ŝarĝaŭto en ŝtalfabrike!” diris sincere kaj ĉagrenite iu virino al oficisto en la kontoro de la Ŝanhaja Baŭĉang-a Fabrike de Aŭtaj Materialoj. Tiu estis laborantino de la Ŝanhaja Vendejo de Trafikaj Ekipaĵoj, nomata Ĝu Hujjing.

Antaŭ kelkaj tagoj ŝi informiĝis ĉe iu ŝtalfabrike, ke pro difektiĝo de kelkaj normaj piŝtoj unu ŝarĝaŭto de “Liberigo” ĉesas funkcii. Ŝi trovis ke mankas ĝuste tiaj piŝtoj en la vendejo, tial ŝi venis por peti helpon de la Ŝanhaja Baŭĉang-a fabrike. Sciinte ke piŝtojn bezonas ŝtalfabrike, la laboristoj kaj oficistoj de la



Plene streĉu la energion por krei denovan rekordon de alta kaj bonkvalita produkto.

Pentris Ha Kjongven k Caŭ Joŭceng

fabrike tuj organizis laborfortojn por tuj sturme fabrike la menditajn objektojn. Dum fabrikado Ĝu Hujjing atendis en la laborejo kaj helpis ekzameni la produktadojn. Kiam la piŝtoj estis ĉiuj pretaj, ŝi tuj portis ilin al la ŝtalfabrike.

Tio estas nur unu el ŝiaj sennombraj ekzemploj klopodi ĉiumaniere por kontentigi la bezonojn de ŝtalfabrikej. Depost la alvoko de la Partia Centra Komitato por la kampanjo de pliprodukto kaj ŝparado, ŝi ĉiam diras: “Dum la tagoj de batalado por ŝtalo, ni komercaj laborantoj devas pli bone ludi nian interligan rolon kaj pli kompleze servi al la ŝtalfabrikej. Se ŝi nur scias kian aŭtoparton oni bezonas en ŝtalfabrike, ŝi ĉiam konservas tion en la memoro kaj nepre klopodas ĉiel havigi tian al ĝi.

Por bone kaj rapide provizi la ŝtalfabrikejn per la materialoj bezonataj en produktado, multaj ŝanhajaj firmoj organizis specialajn laborgrupojn, kiuj iras profunde en la ŝtalfabrikejn por ilin priservi. Ekzemple, la Aĉeta kaj Livera Stacio de Trafikaj Elektromaterialoj sendis pli ol 30 spertajn laborantojn organizitajn en plurajn grupojn por viziti samtempe laŭ kvin vojlinioj pli ol dek ŝtalfabrikejn dum kelkaj mallongaj tagoj kaj liveris al ili en iom pli ol duonmonato inter aŭgusto kaj septembro proksimume

200,000 pecojn da varoj kun valoro de ĉirkaŭ miliono da juanoj.

Kontribuo al ŝtalprodukto, ĉiu laŭ sia kapablo

La devizo de subteno al la pliprodukto de ŝtalo emociis la korojn de sennombraj homoj. Preskaŭ ĉiuj personoj de diversaj profesioj ekagis aktive sub tiu nobla celo.

Jen, ankaŭ la famaj restoracioj sur la plej vizitata Nankin-strato sendis kuiristojn al ŝtalfabrikejoj por helpi iliajn manĝejoj plibonigi la laborojn. Kuiristoj de Jonghualoŭ-restoracio en du tagoj helpis la kuiristojn de la Ŝanhaja Dekaj Ŝtalfabrikejo pliigi dekkelkajn specojn de bongustaj manĝaĵoj. La manĝajbutikoj en Huangpu-distrikto starigis jam konekton kun kelkaj ŝtalfabrikejoj por liveri varojn, kolporte, rekte al la laborejoj laŭdejure. Regule vizitas la Ŝanhajajn Unuan kaj Okan Ŝtalfabrikejojn la barbiroj de Putuo-distrikto por tie priservi la laboristojn. La horloĝistoj kaj okulvitristoj de Vusong-distrikto vizitas ŝtalfabrikejojn por ripari halt-horloĝojn uzatajn por kontroli la tempon de ŝtalfando kaj la protektajn okulvitrojn de la laboristoj. Ĉio ĉi tio trovis varman akcepton de la laboristoj kaj oficistoj de la ŝtalfabrikejoj.

Sub la sama celo por pliprodukti ŝtalon oni prizorgas ĉiujn detalajn aferojn por la ŝtalfabrikejoj. Lastatempe telefonaj laboristoj faris ĝeneralan kontrolon kaj riparon al la telefonaparatoj de tiuj institucioj, kiuj havas kontakton kun ferŝtala produktado. La dis-

trikta telefona administracio de Siĉuan-strato sendis 130 laborantojn al la Ŝanhaja Unua Ŝtalfabrikejo por ekzameni la kvaliton de la funkciado de la telefonaparatoj kaj forigis la difektojn de mallaŭteco kaj miskomuto. La poŝtoŝtancoj proksimaj al la ŝtalfabrikejoj plilongigis sian oficetemon por esti oportuna al la laboristoj en la ŝtalfabrikejoj, al kiuj ili eĉ sendas oficistojn dum la tempo de salajrpago aŭ okazigo de kunveno, por akcepti komisionojn de transsendo de mono aŭ pakajoj.

La batalo por pliprodukto de ŝtalo entuziasmigis ankaŭ kuracajn laborantojn de la urbo. Ekde aŭgusto la hospitaloj, kiuj havas kontraktajn rilatojn kun la ŝtalfabrikejoj, regule sendas kuracistojn kaj flegistinojn en la rilatatajn ŝtalfabrikejojn por la bonfarto de la laboristoj. Pli ol 20 kuracistoj, flegistinoj kaj laboratoriaj teknikistoj de Ĵengi-hospitalo, kiu kontraktis kun la Ŝanhaja Unua Ŝtalfabrikejo, iris al la fabrikejo por elimini la profesiajn malsanojn. Kaj la elektrooftalmito jam ĝenerale likvidiĝis inter la laboristoj. La laborgrupo organizita de la Unua Hospitalo de la Ŝanhaja Unua Medicina Kolegio eĉ prizorgas la purigadon de la loĝejo de la laboristoj en dimanĉo, por ke ili povu pli bone ripozi.

La fervoro de ĉiuj profesioj kaj metioj por servi laŭ sia plejblo al la ŝtalprodukto, multe pligrandigis la laborenergion de la ferŝtalaj laboristoj. Dank' al la ĉiufanka kaj unuanima subteno la ŝanhajaj ferŝtalaj laboristoj certe akiros pli elstaran rezulton de abunda produkto de ĉiufanka antaŭensalto.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Subteno al batalado kongolanda popolo

De kiam Kongolando akiris al si la sendependecon ĝiaj legitimaj registaro, parlamento kaj patriotaj fortoj suferas la plej

barbaran kaj krudan atakon de la imperiismaj rabistoj kun Usono ĉe la kapo, sub la ŝirmo de la UNO-standardo. La perfida klicko de Mobutu-anoj, instigate de la usona imperiismo kaj subtenate de la UNO-komandejo, kiun manipulas la usona imperiismo, eĉ impertinente rabtenis Lumumba-n, Ĉefministron de la Kongolanda Respubliko, la 1-an de dec., 1960. Por esprimi sian senliman indignon kaj fortan proteston de la ĉina popolo kontraŭ tiu grava krimago, la registaro de la Ĉina Popola Respubliko publikigis, la 8-an de dec., 1960, deklaron pri tiu afero. La deklaro malkaŝas multajn krimajn aktivecojn de la usona imperiismo en komploto kun la belga imperiismo, faritajn post ilia instigo de la ribelo de Mobutu-a klicko kontraŭ la legitima registaro de Kongolando, kaj kontraŭ la krimoj de seriozaj provokoj kaj minacoj faritaj al la

diplomatiaj reprezentantoj de tiuj ŝtatoj, kiuj sin tenas sur la justa stargrundo de subtenado al la legitima registaro de Kongolando. La registaro de la Ĉina Popola Respubliko severe kondamnas kaj protestas, kaj ĝi postulas ke la imperiisma grupo estrata de Usono kaj la "UNO-trupoj" tuj haltigu la invadon kaj intervenon kontraŭ Kongolando, tuj restarigu la leĝan pozicion de la Centra Registaro de la Kongolanda Respubliko, estrata de Ĉefministro Lumumba, liberigu la gvidantojn de la Kongolanda legitima registaro, kaj punu la krimulojn ilin persekutantajn. La ĉina popolo firme subtenas la kongolandan popolon en ĝia heroa batalado kontraŭ la imperiismo kun Usono ĉe la kapo kaj iliaj lakeoj. La ĉina popolo firme kredas, ke la popolo de Kongolando nepre akiros sain finan venkon, se nur ili sin unuigas.

Jam aperis:

ĈINA ANTOLOGIO

Unu el la plej imponaj E-libroj eldonitaj en Ĉinio. 15.3 X 23 cm., 412 p. en bela bindo kun protekta kovrilo k 14 bildoj, inkluzive 3 kolorajn.

Prezo: 12 rb., 2 US\$, 10 ŝil., 7 gld., 8 fr., 6 gm., 1000 lir., 500 yen.

Riĉaj literaturajoj de la naciaj malplimultoj en Junnan-provinco



*Nur dank' al la elfoso de la Kompartio,
Ili eksaltas rekte al la ĉielo.*

JUNNAN en sudokcidenta Ĉinio estas provinco kie troviĝas plej multe da naciaj malplimultoj de Ĉinio. La diversaj nacioj en sia longtempa diligenta laboro de komuna konstruado de la patrolando samtempe ankaŭ kreis sian propran riĉan literaturon. Se vi promenas laŭ la bordo de Lanĉang-rivero aŭ Ĵuĵi-rivero, vi certe aŭdas la belajn kantojn el la du-etaĝaj bambuaj domoj de taj-oj; se vi suriras la Gaŭligong-monton aŭ Biluohjue-monton, vi certe aŭdas la heroajn kaj patosajn kantojn de lisu-oj; dum la Torĉofesto de *Marta Strato* sendube vin atingas la festaj melodioj de ji-oj kaj baj-oj; kaj en la tagoj kiam ondas la maturaj oraj tritikoj en la ŝtupar-kampoj, ĉie aŭdiĝas la vin-kantoj de hani-oj celebrantaj la riĉan rikolton. En la literatura historio de Ĉinio estas fame konata la bela anekdoto, ke *Caŭ Zigian* (192-232 p. K, poeto de Vej-regno) verkis poemon en la daŭro de sep paŝoj, sed nun ĉu ne ĉiuj taj-aj poeto-kantistoj verkis siajn poemojn improvize? Nur en Sipsŭanbanna, la aŭtonoma subprovinco de taj-oj troviĝas pli ol 1,300 tiaj talentaj poetoj. La longhistoriaj eposoj *Kreo de la Mondo* de naŝi-oj, *Mejge* de ji-oj kaj *Kantoj de Aŝi-oj*—ĉiuj estas elstaraj literaturaj verkoj. Junnan-provinco ja estas oceano de poemoj!

Fakte, Junnan-provinco estas ne nur oceano de poemoj sed ankaŭ mondo mitologia. La *Palmfolia Klasiko* de taj-nacio skribita per fera skribilo sur folioj de la arbo *Borassus Flabelli-Formis* ampleksas laŭdire 84,000 volumojn, ankaŭ *Duoba-klasiko*, skribita hieroglife de naŝi-oj ampleksas 3,000 volumojn. En tiuj ampleksaj klasikoj konserviĝas multe da belaj kaj emociaj anekdotoj, rakontoj, legendoj, fabeloj kaj fabloj. Sed plejparto el la naciaj malplimultoj estas sen skribaj lingvoj aŭ kun skribaj lingvoj tre nekompletaj. Tial nur tre malgranda parto de la literatura trezoro estas trovebla en la skribitaj tekstoj, kaj la plejparto de rakontoj kaj anekdotoj vivas nur sur la lipoj de la popoloj. Ekzemple inter Ĉang-monto kaj la lago Erhaj en la aŭtonoma subprovinco Dali de baj-oj, troviĝas belaj rakontoj aŭ anekdotoj por preskaŭ ĉiuj montoj kaj riveroj, ĉiuj herboj kaj arboj, kiel kantas en la popolkanto de ji-oj:

*Miloj kaj miloj da popolkantoj de ji-oj,
Sed antaŭe ili estis kaŝitaj sub la tero.*

La vera prospero de la literaturo de la naciaj malplimultoj en Junnan-provinco okazas nur en la nuna socialisma socio. Jam baldaŭ post la liberiĝo de Junnan-provinco, kiam sennombraj laboroj amasiĝas sur la tagordo, la partiaj komitatoj diversgradaj en siajn planojn enmetis la laborojn kolekti kaj redakti la literaturon de la naciaj malplimultoj. En lastaj dek jaroj oni entreprenis trifoje tian grandan provinckalan laboron. El ili en tiu de 1958 partoprenis plejmulte da personoj, plej vasta estis la labor-regiono, kaj plej longe daŭris la tempo. Nur el la publikaj institucioj, kulturaj organizoj kaj altaj lernejoj de la provinca grado partoprenis 114 personoj. Krome tiun ĉi laboron partoprenis sinsekve ankaŭ pli ol 100 kadroj kaj interpretistoj el aŭtonomaj subprovincoj kaj gubernioj. Ili enpenetris en la plej izolitajn vilaĝojn de la naciaj malplimultoj kaj kune kun ili manĝis, loĝis kaj laboris. Tiel ili starigis profundan amikecon kun la popolamaso kaj fariĝis iliaj intimaj amikoj en la komunaj laborado kaj vivo. Pro tio ilia esplorado estis aktive subtenata kaj entuziasme helpata de la popolamaso kaj formiĝis amasa movado de “literatur-kolektado”.

Kiam la esplora grupo venis al aŭtonoma subprovinco Dehong de taj-oj kaj gingpo-oj por kolekti kaj registri la kontraŭfeŭdan eposon *Abin kaj Ŝanglo*, komence la taj-oj ne volis ĝin rakonti. Ĉar en la feŭda socio tiu ĉi eposo estis difinita kiel malpermesata literaturo kun minaco ke “kiu rakontus la eposon, tiun trafus malfeliĉoj dum tri jaroj.” Poste la membroj de la esplora grupo ekloĝis en la hejmo de la maljunulo Pagahehuang kaj vivis kaj laboris kune kun li. Tiel familiariĝinte, la maljunulo propravole rakontis la eposon al la grupanoj, ĉiam kiam li estis libera de laboro. Alia maljuna taj-o Enheng, la tutan tagon gvidis la grupanojn al ĉiuj lokoj por serĉi skriban tekston de la eposo, kaj fine li sukcesis trovi la valoregan kopion. Kiam la grupanoj venis al la Okcidentmonta Regiono, kie amase loĝas aŝi-oj por kolekti kaj registri la eposon *Kantoj de Aŝi-oj*, ili informiĝis, ke maljunulo Pan Ĝenghing, la blindula poeto-kantisto de aŝi-oj tre bone memoras tiun eposon. Ili do ekloĝis en lia hejmo, alportis akvon kaj balais la teron por la maljunulo; kiam venis manĝohoro ili kondukis la maljunulon al manĝejo kaj lin servis en



Kolektado de Popolkantoj

Lignogravuraĵo de Vang Diekjuan

la manĝado kiel filoj al sia patro. Tio tre kortuŝis la maljunulon, tial li senlace kantis tiun kanton por la grupanoj eĉ dum nokto. Krom recitado de la tuta eposo kelkmil versojn longa, li ankaŭ ĝin tradukis en la han-lingvon. Kiam la grupanoj laboris en la aŭtonoma subprovinco Ĉuhjong de Ji-oj, la ji-oj tion prikantis jene:

*Antaŭe ni kantis sur altaj la montoj,
La kantojn forportis la ventoj;
Antaŭe ni kantis sur la river-bordoj,
La kantojn forportis la fluoj;
Hodiaŭ ni kantas niajn kantojn,
Por ilin kolekti jen sendas Maŭ Zedong, nia
Prezidanto.*

Lisenhupo, poetokantisto de la ji-oj kantis la ji-an eposon *Mejge* por la grupanoj en plenaj 8 tagnoktoj. Per labor-metodo de amasa linio, la esploraj grupoj finis en iom pli ol duonjaro la laboron neplenumeban eĉ en kelkaj jaroj antaŭe. Ili kolektis de la nacioj baj-oj, naŝi-oj, taj-oj, ji-oj, ĝuang-oj, mjaŭ-oj, hani-oj, lisu-oj, jaŭ-oj, mongoloj k. a. pli ol 400,000 literaturajn verkojn kaj kompilis kolektojn de popolkantoj, popolaj rakontoj kaj eposoj ampleksantajn je pli ol 5,000 000 vortoj. El tiuj eldoniĝis jam la longaj eposoj *La kreo de la Mondo*, *Mejge*, *La Kantoj de Aŝi-oj*, *Abin kaj Ŝanglo* kaj *Letero en la Lagenario* (*Lagenaria vulgaris*).

Grandskala kolektado kaj prilaborado de la tradiciaj literaturaĵoj de la naciaj malplimulto rekte akcelas la disvolviĝon de ties socialisma literaturo. La perloj en la malnova tempo nun rebrilas, kaj tio instigas la homojn en la nuna tempo. Multaj poetokantistoj silentaj dum multaj jaroj nun ne povas plu sin deteni de laŭta prikantado pri la nova vivo. Ĝuste pro tio en 1958, kiam komenciĝis la granda antaŭensalto ekestis amasa movado de popolkantoj de ĉiuj naciaj malplimulto en la tuta provinco. Novaj popolkantoj ĵus verkitaj nombriĝas per dekmiloj. Ĉiu

el ili estas en la nacia tradicia formo sed kun tute nova enhavo prikantanta la marŝon al socialismo de la naciaj malplimulto kun rapideco de unu salto trans kelkaj jarcentoj.

Ankaŭ la multaj maljunaj poetokantistoj sentis, ke jam ne plu sufiĉas nur la malnovaj melodioj. Ili ege deziras, ke "kresku novaj branĉoj sur la maljuna arbo". Ilia kreemo ekardis sub la flegema prizorgo de la Partio kaj la instigo de la bolanta reala vivo. En aŭtonoma subprovinco Sipsŭanbanna estas iu taj-a maljuna poetokantisto Kanglangjing. Antaŭ la Liberiĝo li estis multe subpremata de la indiĝenaj feŭdaj estroj kaj

torturata de la mizero. Indignigite li ne plu kantis kaj tiel silentis dum plenaj 15 jaroj. En 1956, la sistemo de feŭdaj mastroj estis abolitaj. En 1958 li persone partoprenis la konstruadon de la Akvorezervejo de Liuŝa-rivero. Tie li propraokule vidis, ke la taj-oj mem realigis la deziron neefektiveblan tra jam multaj generacioj, kaj ebligis la irigacion de la kampoj jam de mil jaroj soifantaj. Krome ankaŭ la gubernia partia komitatano lin kuraĝigis al verkado. Silenti plu li jam ne povis. Li ekverkis pri la temo de akvoutiliga konstruado la unuan longan poemon de la naciaj malplimulto en Junnan-provinco *La Kanto de Liuŝa-rivero* prikantantan la socialisman antaŭensalton. Alia fama poetokantisto de taj-oj Kanglanŝuaj ankaŭ verkis longan poemon *Kanto de Taj-oj* spegulantan la grandan ŝanĝon en dek jaroj de taj-a regiono. La apero de tiaj literaturaj verkoj konsiderataj kiel fundamentaj ŝtonoj de socialisma literaturo de la naciaj malplimulto, multe instigis ilian memfidon en la kreado de siaj propraj socialismaj literaturoj. Post la eldoniĝo de *La Kanto de Liuŝa-rivero*, la taj-aj poetokantistoj en Menghej de Sipsŭanbanna kolektiĝis antaŭ la domo de Kanglangjing kaj tie dancis kaj kantis por tion celebri. Ili skribis tiun longan poemon en la palmfolian klasikon kaj okazigis tutgubernian "poem-konkurson". Estis verkitaj tuj 21 longaj poemoj, ĉiu el ili prikantas la tri ruĝajn standardojn, t. e. la ĝeneralan linion, la grandan antaŭensalton kaj la popolkomunumon.

La popoloj de multaj nacioj en Junnan-provinco tre ŝatas figure kompari ĉion belan kun pavo. La popolaj literaturoj de la diversaj popoloj en Junnan-provinco ja similas al pavo, kiu estinte neniam elmontris siajn belegajn plumojn. Sed nun sin sunumante en la pensoj de Maŭ Zedong ĝia beleco ekmontriĝas. La kolor-riĉaj kaj brilaj plumoj kiel matenruĝo aldonas al la pejzaĝo de la pitoreska patrolando ankoraŭ plian allogicon.

Se Ne Ekzistus la Popola Komunumo...

Rakonto pri urĝa savo de inundsieĝitoj

Sin riski por savi samkomunumanojn


La 3-an de aŭgusto, 1960 post terura pluvego ekaperis granda akvego malofte vidita dum cent jaroj en Tajzi-rivero, branĉo de Liaŭ-rivero en Liaŭning-provinco. Hjutaj-a produkta brigado de la popola komunumo Dong'erbu de Liaŭjang-urbo situanta ĉe la malsupra parto de la rivero, estis tre rapide ĉirkaŭinundita. La vivoj de kelkcent homoj de tiu produkt-grupo estis en danĝero.

La informo tuj atingis la direkcion de Dataj-a produkta brigado, 10 kilometrojn for de Hjutaj. "La

vivminaco al la komunumanoj de Hjutaj estas vivminaco same kiel al ni mem. Per ĉiuj rimedoj ni devas ilin savi," diris iu. "Jes, antaŭ la danĝero de samkomunumaj fratoj, ni neniel povas apudstari kun manoj ŝovitaj en manikoj," diris alia. Multaj homoj volonte kaj eĉ konkure sin anoncis por urĝa savo de Hjutajanoj. Ĉiuj diris: "Mi iros!" "Kaj ankaŭ mi!". . . . Post interkonsiliĝo, la brigada komitato de la Partio decidis tujan agadon en tri direktoj: tiuj kiuj scipovas naĝi, tuj naĝu al Hjutaj por la urĝa savo; dua parto de la brigadanoj faru flosojn por alporti la minacatajn Dataj-anojn trans la rivero, kaj la tria parto preparu loĝejon kaj manĝaĵojn por la alportotaj rifuĝantoj.

Je matena krepusko, ĉiuj naĝpovaj viroj kaj junuloj naĝis unu post alia al la granda digo kondukanta al Hjutaj, kun urĝemo por savi siajn samklasanojn. Iris antaŭe de la trupo grupestro Sun Dejing. Ili ĉiuj estis viglaj kaj pretaj.

"Jen venas por nin savi la brigadanoj de Dataj!" ĝojkriis la de akvego ĉirkaŭataj Hjutaj-anoj, kvazaŭ ekvidinte siajn longe disigitajn parencojn. Pli ĝojis ol ĉiuj aliaj precipe la edzino de Liu Ĝongjen, kiam ŝi eksciis, ke venis helpo de Dataj, kie ŝi havis sian patrinan hejmon. Ŝi estis la unua, kiu pakis siajn objektojn por foriro, kaj multaj aliaj ankaŭ faris la samon. Sed estis iuj, precipe la maljunuloj, kiuj ne povis facile piediri, ne volis forlasi sian hejmon,



timante ŝarĝi tro da malfaciloj al aliaj. Oni ja devis ilin persvadi ĉiel ajn. La trupanoj de urĝa savo vizitis hejmon post hejmo, por ilin konvinki sciigante al ili, ke ĉio estas pretigita de la Dataj-anoj por ilin akcepti. Tiel ankaŭ la hezitantaj kortuŝite decidis forlasi la hejmon. Ne longe poste venis jam kelkcent sav-trupanoj. Ili sinjetinte en la akvon, puŝis la flosojn per la manoj por sekure transporti la rifuĝantojn, floson post floso, al la granda digo.

Hompono

Kvazaŭ demetinte pezan ŝarĝon, tuj malpeziĝis la koroj de la homoj, kiuj estis jam unu ĝis du tagojn ĉirkaŭitaj de la akvego, kiam ili ekpaŝis sur la firman teron de la digo, kaj ekiris laŭlonge de la digo rekte al Dataj.

Neatendite, ekaperis antaŭ ili kanalo kun larĝeco de dudek futoj, kiu servas propracele por irigacio de centoj da muoj da kampoj sed nun ĝi fariĝis torento vojbaranta kun rapidega fluo kaj ŝaŭmantaj ondoj. La sav-trupanoj, kiuj malsupren iris en la akvon por esplori la eblecon de transvado, estis tuj deportitaj de la fluo. Vidinte tion, la rifuĝantoj falis denove en embarason. La sav-trupanoj provis fari provizoran ponton super la kanalo, sed sur la larĝa kanalo oni ne sukcesis tion fari per nesufiĉe longaj tabuloj prove almetitaj kiujn tuj forportis la torento. Fiaskis la provo kaj neniu alia rimedo estis aplikebla en urĝeco. Tiam Li Hongven, unu el la sav-trupanoj, eliris el la amaso kaj kriis, "Ni faru homponton, por ke ĉiuj transiru la kanalon." Tiu ĉi propono estis unuanime aprobita. Nur en palpebruma momento, ok junuloj sin jetis en la akvon kun tabuloj sur la ŝultroj. Kaj unu sekura fortika hompono estis formita en kelkaj minutoj. La rifuĝantoj transiris la kanalon unu post la alia tra la hompono. Kelkajn virinojn, kiuj ŝajnis tre timemaj paŝante sur la ponto, oni subtenis deflanke. En mallonga tempo jam transiris granda amaso de la rifuĝantoj.

La pontoapogantoj jam longe restis en la akvo. Ili ektremis pro malvarme kaj la ŝarĝo estis sufuĉe peza. Tamen ili havis en si koron kiu flamis por savi siajn samklasanojn pro kio ili povis konkuri ĉion, eĉ akvegon pli malvarman ol ĉi tiu. La hompono firme staris meze de la torento, sur kiu la rifuĝantoj sinsekve transiris. Al virinoj kun infanoj surbrake aŭ maljunuloj, la savtrupanoj oferis apartan prizorgon. Kiam kelkaj blinduloj transiris, ili estis subtenataj ĉiupaŝe. Iu virino kun infano surbrake stumblis ĉe la bordo, kiam ŝi sin direktis sur la ponton. Tiam Li Hipu, unu el la savtrupanoj, tuj portis por ŝi la infanon. . . . Tiel, entute ducent sesdek ok rifuĝantoj sekure atingis la alian bordon, en pli ol tri horoj. Nur tiam la pont-apogantoj eliris el la akvo, el kiuj pluraj persistis de komenco ĝis la fino, tiel ke iliaj ŝultroj inflamigis ruĝe kaj ŝvele. Tion vidinte, la rifuĝantoj ege emociiĝis, ke ili ne sciis kion fari. Senĉese ili

demandis iliajn nomojn kaj dankante ilin kiel siajn savintojn.


Rekomenci la produktadon kaj rekonstrui la hejmon

Alveninte al Dataj, la rifuĝintoj el Hjutaj estis akceptitaj de la brigadanoj de Dataj per plej granda prizogemo. La tuta vilaĝo, de la norda strato ĝis la suda, de la okcidenta ekstremo ĝis la orienta, malfermis siajn pordojn al la rifuĝintoj. Multaj komunumanoj mem dormis sur la planko cedante al la rifuĝintoj siajn briklitojn*. Aparte okupitaj estis la tri komunaj manĝejoj de la brigado en preparado de manĝaĵoj. La kuiristoj kuiris por la rifuĝintoj rizon kaj milion, kiujn ili mem ordinarie tiom domaĝis. Iuj rifuĝintoj diris kortuŝite: "Se ne estus en nia nova socio, se ne ekzistus la popola komunumo, post tia akvego eĉ rizakvon oni neniel povus akiri almozpete, tiom pli ne rizon. Plej emociiĝis precipe la maljunuloj, kiuj multon travivis en pasinteco.

Post kelkaj tagoj, la akvego iom post iom retiriĝis. La rifuĝintoj revenis unu post alia al sia hejmvilaĝo. Por kiel eble plej multe redukti la damaĝon kaŭzitan de la akvego, ili tuj levis kampanjon "memsavo per produktado, kaj rekonstruo de la hejmo". En la semado de aŭtunaj legomoj, ili povis nur meti semojn en truojn per bastonetoj faritajn en ne plugita tero, kiu estis ne plugebla pro malsekeco, kaj poste kovris ilin per seka tero. Fojon post fojo la semitaj semoj estis superakvitaj, sed ili persistis ĝis la kvina fojo. Finfine elkreskis la legomoj.

Dank' al la kolektiva forto de la popola komunumo, la hejmo-rekonstruado rapide progresis. Kelk-dek brigadanoj estis speciale senditaj por rekonstrui domojn por la komunumanoj kies domojn ruinigis la akvego. Kiam ni forlasis la vilaĝon, plejparte de la komunumanoj jam translokiĝis en la nove konstruitajn aŭ riparitajn domojn.

* Lito konstruita el bakitaj aŭ ne bakitaj brikoj, kutime uzata en norda Ĉinio, hejtebla sube dum la vintro.



Zong Laŭlu

Rakontis **Dong Jaŭ** (kamparano)
Skribis **Ĝang Ŝigie**

Pri Jihetuan* multajn mirindaĵojn ja rakontas legendoj. Ni rakontu nur pri Zong Laŭlu kaj lasu flanke la aliajn!

Zong Laŭlu estis ĉefo de Jihetuan-anoj. Tiu ĉi maljunulo gvidis siajn kamaradojn speciale por kontraŭbatali la fremdlandajn imperiistojn. Kiam la unuigita armeo de la ok ŝtatoj prenis Pekinon, la ĉirkaŭaj vilaĝoj estis okupitaj de la invadantoj, kaj ankaŭ Jihetuan estis perdita. Tiam, la imperiestro fuĝis terurite kiel muso antaŭ kato, kaj la invadantoj ĉie tiranis. Regis granda malordo tra la lando kaj oni ne sciis kien malaperis Zong Laŭlu.

Kaj sur Long-rivero? Ĉe la riverandoj verdis fragmitoj, sur la riverdeklivoj ruĝis sovaĝaj floroj, kaj la rivero fluis murmurante al la orienton kun arĝentaj ondoj kiel antaŭe. Estis tute kviete sur la rivero, kaj sub la brilanta suno kaj serena ĉielo estis maljunulo kaptanta fiŝojn sur la rivero. — Kiom stabila animo, ĉielo!

Kiu atendis ke jen post kelke da tempo, alvenis dudek kelkaj fremduloj-invadantoj. La maljunulo ĵetis al ili ekrigardon, kaj daŭrigis sian fiŝkaptadon kiel antaŭe. La fremduloj, trovinte nenion rimedon por transpasi la riveron, ekkriegis al la maljunulo: “Rapide alremu vian boaton! Kaj tuj portu nin trans la riveron!”

La maljunulo metis sian manon super la okulojn kaj demandis detale pririgardante:

“Kion vi volas tie trans la rivero?”

“Aresti homon!”

“Kiun?”

“Iun nomatan Zong.”

“Ha, ha, tio estas malfacilaĵo — estas tiom multaj personoj nomataj Zong en Ĉinio. Ankaŭ mi estas nomata Zong.”

“Ĉu? sed ne vin. Vi estas nur fiŝisto.”

“Ha, ha, do kiun vi arestos? Ne nur estas multaj Zong-oj inter ĉinoj, sed diversaj ankaŭ estas iliaj profesioj!”

“Ĉesu kun via babilaĵo! Estas Zong Laŭlu, kiun ni arestos. Ni jam serĉis lin por tiom multaj tagoj; oni diris, ke li jam fuĝis al Long-rivero. Nun, rapide transportu nin trans la riveron! Alie, se li forkuros, ni prenos vin kiel anstataŭulon!”

“Ha, ha! Kial vi ĝuste volas aresti lin sed ne alian? Li estas ja Jihetuan-ano sinokupanta speciale por kontraŭbatali fremdulojn. Nun vi volas kapti lin. Ĉu tio ne estas kvazaŭ muso volus leki la nazon de kato — serĉi mem la morton? Zong Laŭlu ĵus antaŭ momento diris al mi, ke li estas lacigita mortigante vin, kaj volas ripozi kelkajn tagojn por refreŝigi sian energion kaj pliiĝi sian forton por denove vin ekstermi! Vi entrudiĝis en Ĉinion kaj tirani la popolon, li neniam vin pardonos!”

“Do, vi scias, kie li estas?”

“Ĉu mi tiel parolus kun vi, se mi tion ne sciis?”

“Kie li estas nun?”

“Li estas malproksime ĉe ĉielrando kaj proksime antaŭ la okuloj!”

“Ĉu vi mem estas tiu Zong Laŭlu?”

“Ne, kvankam mia familia nomo estas Zong. En la pasinteco Zong Laŭlu fiŝkaptis sur tiu rivero kaj terkulturis sur ĝia bordo; nun li ankoraŭ ne forlasis la riveron — li ja ripozas en la fragmitejo trans la rivero!”

Aŭdinte tion, la fremduloj freneziĝis de ĝojego, kaj ĉiuj mansignis al la maljunulo, dirante: “Rapide transportu nin! Rapidu, se li estos fortimigita, ni arestos vin kiel anstataŭulon!”

“Li ne forkuros. Hehe, male mi timas ke vi plenmano da homoj ja ne povus lin kontraŭbatali — li estas homo kun granda kapablo!”

Tion dirante, la maljunulo alremis sian boaton. Aŭdinte ke Zong Laŭlu estas en la fragmitaro trans la rivero, la fremduloj timis nur ke li forkuros, kaj saltis kune en la boaton, komplete ĝin pleningante. Tuj ili urĝis la maljunulon ekirigi la boaton. Sed la maljunulo diris ĉagrenite:

“Tiom multaj vi surboatiĝis ke eĉ ne troviĝas loko por meti miajn piedojn. Kiel mi remu?”

“Rapidu! Remi vi devas, eĉ se vi ne sciis kiel!”

“Estas vere malfacile. Ej, tiam lasu min tiel provi!”

La maljunulo demetis la puŝstangon sur la boaton, tuj saltis en la akvon, ekprenis ŝiprandon per ambaŭ manoj, kaj klininte sin ekpuŝis la boaton al la mezo de la rivero. Pro tro peza ŝarĝo el multaj homoj, la boato ekbalanciĝis, kiam ĝi proksimiĝis al la rivermezo. La fremduloj ĉiuj ektimiĝis kaj kunpremiĝis inter si petante la maljunulon ekvilibrigi la boaton. Sed la maljunulo respondis eĉ ne unu vorton kaj daŭre antaŭenpuŝis la boaton naĝante. Nun trovante ke la boato jam atingis la mezon de la riverfluo, la maljunulo faris plenpulman enspiron, levis la ŝiprandon per ŝultro kun manoj levantaj karenon kaj laŭte kriegis:

“Iru ĉiuj por esti nutraĵo de testudoj!”

Kun la kriego, la boato tuj renversiĝis plaŭde. La maljunulo rapide kaptis la puŝstangon per unu mano kaj per la alia tenis la boaton, kaj per forta ektiro li denove turnlevis la boaton brue, kun nenia akvo en ĝi. La maljunulo sin levis salte en la boaton kaj tuj levis la puŝstangon. La fremduloj, mergite en la akvo tute sen apogo supre kaj sube, klopodis elmergiĝi englutante akvon. Kiam kapo ĵus elakviĝis, bat! falis al ĝi la puŝstango; kiam denove vidiĝis kapo, bat! falis ree la puŝstango. . .

(Daŭrigo sur p. 19)



La nova filmo

“NIE ER”

Okaze de la 25a datreveno de la morto de Nie Er (1912-1935), la nova filmo nomata per lia nomo montriĝis en multaj urboj en Ĉinio.

Nie Er estas proleta batalanto, granda komponisto, kaj fondinto de la ĉina moderna muziko. Kvankam li vivis mallongan tempon de nur dudek kelkaj jaroj, tamen brila estis lia vivo. La filmo *Nie Er* rakontas pri la kvin jaroj kiam li loĝis en Ŝanhajo ekde 1930 kaj partoprenis dume la batalon sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio.

Inter 1930 kaj 1935, la japana imperiismo invadis Ĉinion paŝon post paŝo, kaj la nacia krizo pligraviĝis kun ĉiu tago. Sed la naciperfida Ĉiang-Kajŝek-a kliko alprenis la politikon de kapitulaco al Japanio, kaj kruele subpremis la popolon hejme. Dum tiu tempo, la heroo ĉina popolo, sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio, faris obstinan revolucionan batalon kontraŭ imperiismo, feŭd-

ismo kaj burokrata kapitalismo. Same kiel multaj junuloj el malriĉaj familioj, Nie Er aspiris al revolucio. Iu progresema studento de lia hejmurbo lin prezentis al la Ŝanhaja Kontraŭ-imperiisma Ligo, revolucia organizajo gvidata de la Partio, kaj li partoprenis la amasan laboron en la okcidenta distrikto de Ŝanhajo. Poste, li aliĝis al la muzika grupo de la Amikoj de Sovetunio, alia revolucia popola organizajo, kaj ekbatalis kontraŭ la tiama dekadeca muziko kaj la burĝa ideo de “arto por arto”. En tiu tempo, Nie Er aliĝis al la Ĉina Komunista Partio. Sub la gvidado kaj instruado de la Partio, Nie Er komprenis kiun vojon li devas sekvi por sia krea laboro. Nur en la daŭro de kelkaj jaroj, liberigantisian talenton, li komponis militajn kaj pasiajn kantojn: *Marŝo de l' Volontuloj*, *Kanto pri la Vojo*, *Vojkonstruaj Pioniroj*, *Diplomiĝa Kanto*, *Kanto de l' Ŝarĝistoj*, *Kanto de Ĵurnalvendaj Infanoj*, kaj *La Kantistino*. Tiuj ĉi kantoj triumfis

super la furoraj sed dekadencaj arioj, kaj rapide vaste populariĝis. Kiel la klariona voko de la epoko, vekanta la subpremitan popolon stariĝi kaj batali, tiuj ĉi kantoj potence influis kaj kuraĝigis la fortan revolucionan amasan movadon. *La Marŝo de l' Volontuloj*, komponita de Nie Er, kun vortoj de Tian Han, estis adoptita kiel nia nacia himno post la Liberiĝo.

La scenaro de la filmo *Nie Er* estis verkita de Ju Ling, Meng Po kaj Ĝeng Gjun-li, kaj direktita de Ĉeng. Ĝaŭ Dan ludis la rolon de Nie Er. Tiuj ĉi famaj filmaj laborantoj estis samtempuloj de Nie Er. Ekzemple, Ĝaŭ Dan estis bona amiko de Nie Er. Ili vivis, laboris kaj batalis kune. La filmo komenciĝas per alveno de Nie Er al Ŝanhajo kaj finiĝas per lia foriro de la urbo. La filmo priskribas la noblan karakteron de Nie Er — lia varma amo al la laboranta popolo, lia firmeco, kuraĝo kaj soifo al la vero de revolucio. Ĝi bildigas, kiel Nie Er, gvidata de la Partio, partoprenis en la amasan batalon, fariĝis kunbatalanto de la laboristoj kaj kamparanoj, kaj prenis muzikon kiel armilon en servo de la revolucio.

La filmo estas bonege akompanata per la muziko de Nie Er. Dum lia vojaĝo kun la kantodanca grupo, kiam en jonko iranta laŭlonge de la glate fluanta rivero, iu knabino ekkantas *La Kantistinon* akompanate de Nie Er per lia violono, la aŭskultantaro ekscitiĝis de la indigna akuzo kontraŭ la malnova socio. *La Ŝtormo de Jangzi-rivero* spegulas la ŝtorman kontraŭimperiisman batalon de la revoluciaj amasoj en tiu tempo. Kiam la filmo montras ke la progresema literatura kaj arto estis senhonte piedpremataj de la Kuomintang-aj reakciuloj, la potenca sono de la *Vojkonstruaj Pioniroj* inspiras la popolon al plua batalado. Kaj la filmo finiĝas per la tondro de la *Marŝo de l' Volontuloj*.


Nie Er markas novan sukceson en la filmoarto de Ĉinio.



En julio, 1930, Nie Er, veninte al Ŝanhajo por perlabori vivrimedojn, laboris en butiketo kiel helpanto. Transportante komercaĵojn li renkontis survoje manifestacion je la tria datreveno de la Aŭgustunua Revolucia Leviĝo ĉe Nanĉan, kiun li observas kun intereso.

Dum rondira prezentado kun kantodanca trupo, Nie Er komponis "La Kantistinojn" por aŭdi la maldolĉojn kaj indignon de la kantistinoj.


Nie Er ludas ĉefrolon en la opero "La Ŝtormo sur Jangzi-rivero", li mem komponis la muzikon de la opero.



La edukado fare de la Partio bruligis revolucian flamon en la koro de Nie Er. "Mi devas fariĝis revolucia muzikisto. Mi elkantos la voĉon de la ĉina popolo? li pensis kiam li fari noton en sia taglibro.



Su Ping petas Nie Er komponi la muzikon por la "Marŝo de l' Volontuloj" verkita de Tian Han.



Vegetaĵoj sur la Tegmento de la Mondo

EN la zono ĉe Ĝomo-langma, la plej alta montpinto de Himalajo, estas pitoreskaj pejzaĝoj de glacio kaj neĝo kaj ankaŭ de densa verdaĵo, estas senfina virga arbarego kaj ankaŭ buntaj sovaĝaj floroj kaj herboj. Sed ĝis nun oni tre malmulte sciis, tiel pri la vegetaĵa disvastiĝo, kiel pri la aliaj sciencaj aferoj, sur la monda tegmento. Antaŭ nelonge ni, la botanika sekcio de la Scienca Ekspedicio, faris esploron en la orienta, norda kaj okcidenta partoj de Ĝomo-langma kaj unuapaŝe malkovris la sekreton de tiu plej alta montpinto de la mondo.

La orienta kaj okcidenta partoj de Ĝomo-langma havas pli malpli mildan klimaton. Tie preskaŭ ĉiuj iom ebenaj terpecoj en rivervaloj estas jam plugitaj por kulturi sekalon, terpomon, kolzon, rafanon kaj aliajn plantaĵojn de la laborema tibeta popolo. Prosperere kreskas vegetaĵoj en tiuj partoj, precipe la virga arbaro, kiu aspektas denseverde kvazaŭ

verda maro. En la arbaro ĉe la riveraj elfluejoj, kie la alteco de la tero estas iom malpli granda super la marnivelo, kreskas diversaj malaltaj kreskaĵoj apartenantaj al pteriodo (pteriodo-phyta), formante etoson de subtropika arbaro. En tiu virga arbaro, la plej rapide kreskantaj kaj kun pli granda lignorezervo kaj pli bona lignokvalito estas la *jatung*-abioj, betuloj kaj aceroj, inter kiuj plej elstaras la *jatung*-abioj, kies trunko estas dika, ronda kaj rekta, kun alteco de pli ol tridek metroj. Ili dense kaj prosperere kreskas, kaj estas kutime uzataj de la lokaj tibetanoj kiel konstrumaterialo.


Suprenirinte laŭ la rivervalo tra la arbarmaro, ni trovas antaŭ ni alian pejzaĝon, anstataŭ la densa arbaro, la orientan flankon de la montpinto plene kovras abunde florantaj ruĝaj, purpuraj, flavaj, rozaj kaj blankaj rododendroj, interpunktitaj de nigreverdaĵoj tibetaj juniperoj, kiuj are kaŭras al la tero tie kaj ĉitie — la de-

klivoj apud la rivervalo estas kvazaŭ vestitaj per plej bela silkajo kun bunta desegnaĵo. Precipe en la lokoj, kie troviĝas glacia rivero aŭ glacia lago, estas videblaj ekstreme ĉarmaj vidaĵoj: malproksime staras altaj blankaj neĝaj montpintoj nubopentrantaj, proksime la prospere florantaj rododendroj kaj montokresto speguliĝas en la verdaj lagoj, kaj silkaj nuboflokoj ŝvebas kvazaŭ en fabela mondo.

La lokoj, kiujn ni esploris en la norda flanko de la montpinto, estas ĉiuj je pli ol 5000 metroj super la marnivelo. La alta monto baras varman aerofluon venantan de la sudo el Hindia Oceano, kaj la seka kaj malvarma aerofluo de la nordo grave influas la regionon, tial tie la tero estas malfekunda sub la klimato karakterizata de sekeco kaj malvarmeco. Vivas tie nur tiuj vegetaĵoj, kiuj povas venki la rigorajn naturajn kondiĉojn. Dum aliloke buntas diversaj floroj en printempo, ĉi tie la vegetaĵoj floras kaj fruktas nur en julio. Kaj la longeco de la kreska periodo de la vegetaĵoj tieaj estas strikte ligita kun la alteco de la loko super la marnivelo. La vegetaĵoj ju pli proksimaj al la neĝlinio komencas kreski des pli malfrue kaj kun des pli mallonga kreskoperiodo. Male estas ĉe la vegetaĵoj kreskantaj en la malpli altaj zonoj. La kreskaĵoj en tiu alta kaj malvarma zono estas karakterizataj ankaŭ per multaj aliaj specialaĵoj por adapti sin al la klimato, ekzemple: oksitropoj (*Oxytropis*) kaj astragaloj. Ilia tre multa branĉiĝo kaj tre densa interplektiĝo de la branĉoj en formo de kuseno estas por konservi varmon kaj malsekecon kaj samtempe por rezisti al la ŝtormo de la alta ebenajo

Laborantoj de la Scienca Ekspedicio kolektas mineralajn specimenojn proksime de la "Tria Poluso" Ĝomo-langma.

Foto de Hin Hua





Ĉinaj montgrimpistoj kaptis dum ripozo proksime de Ĝomo-langma montan aglon kiu povas flugi ĝis 8000 m. super marnivelo. Jen ili faras el ĝi specimenon.

Foto de Hin Hua

kaj al fortaj radioj de la suno,
kaj por la lasta celo konvenas

ankaŭ iliaj malgrandaj folioj kun
densa lanugo, enprofundiĝintaj

poroj kaj kompare dika korneca tavolo sur la epidermo, ĉio ĉi helpas ankaŭ por redukti la vaporigoŝon de la akvo en ili. La blanka lanugo sur la folioj de iuj vegetaĵoj utilas por reflekti la sunradiojn.

En pli altaj lokoj ĉie estas nudaj rokoj. Hazarde renkontatajn herbetojn oni trovas nur malofte en fendoj de rokoj. Ĉu krom tio nenia vegetaĵo estas trovebla tie? Tamen estas. Se oni atente rigardas, oni trovas multajn makulaĵojn firme kovrantajn sur la surfaco de tiuj rokoj. Ili estas malaltaj vegetaĵoj nomataj likenoj, kiuj estas la pioniroj de vegetaĵoj por okupi vivpozicion. Ili kapablas kreski tie, kie aliaj vegetaĵoj ne kapablas, kaj liveras al ili vivkondiĉojn.

La Ĝomo-langma-zono estas palaco de glacio kaj neĝo, sed samtempe ankaŭ riĉe varia botanika ĝardeno, atendanta nian pluan esploron kaj ekspluatadon.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KU

Aranĝo por Plenumo de la Traktato pri la Problemo de Duobla Nacieco subskribita inter Ĉinio kaj Indonezio

Aranĝo por Plenumo de la Traktato pri la Problemo de Duobla Nacieco estas subskribita de la registaroj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Indonezia Respubliko la 15-an de dec., 1960, en Djakarta, la ĉefurbo de Indonezio. La ĉina Ambasadoro al Indonezio kaj ĉina ĉefdelegito en la Ĉinio-Indonezia Kuna Komitato, Huang Ĝen, la indonezia Ministro por Eksterlandaj Aferoj, Subandrio parolis ĉe la ceremonio de la subskribado. Ambasadoro Huang Ĝen diris ke la Aranĝo por Plenumo de la Traktato pri la Problemo de Duobla Nacieco "mon-

tras ke la du registaroj jam akiris la unuapaŝan sukceson en sia klopodo por plena kaj racia solvo de la demando de elmigrantaj ĉinoj", "la demando atingos plenan kaj racian solvon paŝon post paŝo, la amika rilato inter niaj du landoj atingos pluapaŝan plifirmigon kaj disvolviĝon", kaj li aldonis, ke la ĉina registaro ĉiam insistas, ke ĉiuj problemoj inter aziaj kaj afrikaj landoj, kiel ajn komplikaj ili estu, povos esti solvitaj per amika intertraktado sur bazo de la Kvin Principoj de Paca Kunekzistado kaj la principoj de Bandung-a Konferenco. Subandrio ankaŭ diris, ke la subskribo de la Aranĝo por Plenumo de la Traktato pri la Problemo de Duobla Nacieco jam metis la fundamenton por starigo de la plej intima kunlaboro inter la du landoj kaj popoloj.

Traktato de Amikeco kaj Reciproka Neagreso inter Ĉinio kaj Afganio

Por konservo kaj plua disvolvo de la longdaŭra paco kaj profunda amikeco inter Ĉinio kaj Afganio, la Ĉina Popola Respubliko sendis en aŭg., 1960 Registaran Delegacion kun Ĉen Ji, Ministro por Eksterlandaj Aferoj, kiel ĉefo, por viziti Afganion, kaj ambaŭ flankoj decidis kontrakti la Traktaton de Amikeco kaj Reciproka Neagreso inter la du landoj, laŭ la fundamentaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la spirito de Bandung-a Konferenco. Tiu ĉi traktato jam estas ratifita de ambaŭ flankoj respektive laŭ la konstitucia procedo de iliaj propraj landoj, kaj la interŝanĝo de la ratifaj dokumentoj okazis la 12-an de dec., 1960 en Pekino.



Eldona Plano de Ĉ. E. L. por 1961

Post la apero de *Ĉina Antologio 1949 — 1959*, Ĉina Esperanto-Ligo komencis eldonadon de soci-politikaj verkoj per *Vivu Leninismo* kaj *Pri Praktiko* (jam aperonta). Por la nova jaro ĝia eldona aktivado daŭros en tiu direkto per verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong, ĉefe el la antaŭ nelonge eldonita vol. 4 de lia *Elektitaj Verkoj*, pri kies eldoniĝo nia revuo aperigis specialan artikolon en n-ro 6 de la lasta jaro. Laŭ la plano estos eldonataj 11 broŝuroj en 1961-1962. Ili entenos la ĉefajn artikolojn el la volumo, kiu estas speciale interesa, ĉar en ĝi estas kolektitaj gravaj verkoj de Prezidanto Maŭ dum la Tria Enlanda Revolucia Milito, en kiu la ĉina popolo akiris la finan venkon. Inter la 11 broŝuroj estos *Pri Popol-demokratia Diktaturo*. Post tio oni intencas denove prepari kolekton de noveloj. Ĉ. E. L. sincere atendas de la legantoj kritikojn kaj rimarkigojn pri la eldonitaj libroj, por plibonigi siajn laborojn.

Pro tiu nova plano oni decidis rezigni la eldonon de la anoncitantaj verkoj *Venko de Marksismo-Leninismo en Ĉinio* kaj aliaj du verkoj de Deng Hiaŭping kaj Lin Biaŭ respektive.

Hungara K-do J. Király ricevis memorinsignon de Ĉina Ambasadado

Laŭ informo de "Hungara Fervojista Mondo" k-do Johano Király ricevis de la Ĉina Ambasadado en Budapeŝto "Memorinsignon de Amikeco" pro sia amika helpo al la socialisma konstruado de la Ĉina Popola Respubliko. Kiel informis antaŭe nia gazeto, k-do Király jam trifoje venis al Ĉinio por instrui muntadon kaj uzadon de hungaraj terkulturaj maŝinoj kaj multe kontribuis al la prospero de agrikulturo en Ĉinio.

Novaj E-kursoj en Vjetnamio

En la lasta duono de 1960 ekfunkciis tri Esperanto-kursoj (2 unuagrada kaj unu duagrada) por ĉirkaŭ 140 gejunuloj kaj geoficistoj en la ĉefurbo Hanojo. Krome, estas organizitaj ĉiusemajne en la E-Klubo de Hanojo du perfektigaj kursoj por diplomitaj esperantistoj, kiuj volas pliprofundigi sin en la subtilaĵojn de la lingvo.

Esperantista Tendaro en Sovetunio

Jam en 1959 ĉebaltaj geesperantistoj aranĝis esperantistan tendaron en Latvio (apud Riga). En 1960, tio denove okazis apud fama universitata urbo Tartu (Estonio) sub aŭspicio de la Tartu-a Ŝtata Universitato.

La ejo de la tendaro troviĝis en la belega loko, en la sporta bazo de la universitato. Partoprenis 110 personoj el Estonio, Latvio, Litovio, Moskvo kaj Moldavio, precipe gejunuloj. Ne mankis ankaŭ malnovaj esperantistoj: konataj moskvaj samideanoj Sergeo Saryĉev kaj Izraelo Kudrjavickij, fama

esperanta poeto el Tallin Hilda Drezen, elstara ĉe-instruisto A. Siitani.


La organizado, kiun efektivigis studentino de la biologia fakultato Lembe Hallop, estis perfekta. Malgraŭ granda nombro da partoprenintoj, la tendara vivo fluis ekstreme bonorde.

En la tendaro regis vere amika atmosfero. Ĉi tien venis homoj de diversaj aĝoj kaj profesioj, sed kun unu sama aspiro: akceli nian movadon. Ĉiupaŝe oni povis aŭdi nur Esperanton. Oni legis esperantajn gazetojn, aŭskultis esperantajn disaŭdigojn kaj esperantologiajn prelegojn.

Post solena malfermo je la 1-a de aŭgusto, sinsekvis interkonatiga vespero, prelegoj de la somera universitato, ekskursoj, E-ekspozicio, konkurso por plej bela recito de esperantaj verkoj, literatura vespero, studenta kunveno, kaj fine la amika rondo antaŭ la forveturo. Kompreneble ne mankis kantadoj, dancoj kaj fotografadoj en la interesa tendara vivo.

La solena fermo de la tendaro estis tre kortuŝa. Neniu volis forveturi. Ĉiuj diris ke la tendaraj tagoj estas neforgeseblaj por "la tuta vivo".

Grupo da partoprenantoj de la Esperanto-tendaro en Kääriku, Estonio, USSR.



Decido estis farita, ke en 1961, la tendaro okazos en Litovio. Esperable ĝi estos same bela kiel tiuj pasintaj.

Boris Kolker (USSR)

En Liepaja, Latvia SSR

En lasta septembro okazis 2-foje disaŭdigoj pere de la radio pri agado de la loka Esperanto-rondo. Tri esperantajn ekspoziciojn oni aranĝis dum la tuta oktobro en la Liepaja Kulturdomo, kaj samloke ekfunkciis Esperanto-kursoj en 2 grupoj kun 45 partoprenantoj.

L. Lange

En Ĥabarovsk, USSR

Esperanto-movado nun bone kreskas en Ĥabarovsk, proksime ĉe Ĉinio, Koreio kaj Japanio. Nun en tiu urbo funkcias 14 grandaj Esp-grupoj en superaj kaj mezaj lernejoj, oficejoj k. c.. En kulturdomo de instruistoj ekfunkciis nova grupo, kiu havas pli ol 100 membrojn. En pedagogia instituto estas ankaŭ preskaŭ 100 novaj esperantistoj, lernantaj Esperanton laŭ la plej bona por rusoj rekta metodo de profesoro Paŭl Poni. Studentoj-esperantistoj organizis en la instituto "Klubon de Internacia Amikeco". Leteroj, ekspoziciaj materialoj kaj alilandaj gastoj estas atendataj.

E-ekspozicio en Krasnodar, USSR

En Krasnodara Domo de Sciencistoj estis aranĝita ekspozicio de esperantaĵoj en la lasta septembro. Ĉe la ekspozicio k-do V. T. Najdin, unu malnova esperantisto, faris lecion pri la historio kaj disvolviĝo de Esperanto kaj pri ĝia utilo por kulturaj kaj praktikaj celoj. Tio multe interesis la aŭskultantojn.

G. A. Galaganov (USSR)

Montodomo "Esperanto" en Bulgario

Apud la ĉefurbo de Bulgario, sur monto Vitoŝa la bulgara esperantistaro komencis konstrui montodomon. Ĉiudimanche 20-30 geesperantistoj helpas la masonistojn en la konstruado por ke la domo estu kiel eble pli frue preta. La laboron partoprenis ankaŭ



Unu el la standoj en la Ekspozicio en Krasnodar. Sur la foto staras maldekstre k-do V. T. Najdin.

geesperantistoj el Sovetunio, Pollando, Hungario kaj Svedio. Multaj gesamideanoj donacis pli ol unutagan sian salajron por la finkonstruo kaj la mebligo de la domo. Italaj kaj svedaj geesperantistoj ankaŭ finance kontribuis. Ĝi ekfunkcios en la printempo, 1961. Krom aliaj agadoj ĝi aranĝos ankaŭ bibliotekon kaj konstantan ekspozicion. Kiu volas kontribui

al ili librojn kaj esp-ajojn sendu al "Montodomo, P. K. 44, Sofia, Bulgario."
Nik Nikolov

Esperanto servas inter ĉeĥoslovakaj kaj japanaj literaturistoj

Laŭ informo de "Bulteno de Esperantista Klubo en Praha" k-do Kei Kurisu, japana esperantisto kaj tradukinto de multaj ĉeĥoslovakaj literaturaĵoj en



Ĉeestantoj al la inaŭguro kaj starigo de la "Esperantista Junularo de Uberlândia" ĉe aŭditorio de "Radio Educadora de Uberlândia.

japanan lingvon (inter ili la "Avineto" estas represita eĉ trifoje) kaj nun profesoro de japana lingvo en ĉeĥoslovaka universitato, vizitis en lasta julio kiel oficiala delegito de la Asocio de Progresantaj Japanaj Verkistoj "Nova Literaturo" la sekretariejon de Asocio de Ĉeĥoslovakaj Verkistoj en Praha por transdoni donacojn de japanaj verkistoj. Lin akceptis k-do Ptáčník, vicsekretario de la AĈV kune kun aliaj membroj de la asocio. Oni inter-

parolis helpe de Esperanto, kaj la vicsekretario esprimis interalie la estimon rilate al kultura valoro de internacia lingvo.

Medicina fakvortaro en 16 lingvoj

Laŭ informo el Amsterdamo la eldonejo Elservier, kiu specialiĝis pri vasta serio de multlingvaj fakaj kaj sciencaj terminaroj, anoncas la baldaŭan aperon de medicina terminaro *Quaestinarium*

Medicum en 16 lingvoj, inter kiuj estas Esperanto.

Esperantista Junularo en Brazilo

En lasta julio fondiĝis en Brazilo Esperantista Junularo de Uberlandia ĉe aŭditorio de "Radio Educadora de Uberlandia" en belega festvespero kun pli ol 100 ĉeestantoj. La societo estas filiita je ĵus fondita Brazila Esperantista Junulara Unuiĝo, kiu sia-vice estas ano de Tutmonda Esperantista Junulara Unuiĝo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Kunveno de budhistaj reprezentantoj en Tibeto

La tibeta filio de la Ĉina Budhista Asocio okazigis la duan kunvenon de la reprezentantoj en nov. 1960 en Lhasa. Ĝin partoprenis 98 reprezentantoj el diversaj sektoj de diversaj lokoj en Tibeto, inter ili troviĝas Gdanthripa Thubtankunga, la 96-a heredanto de sutro-eksplika tribunalo de la Flav-sekta iniciatinto, la Vivanta Budho Ĉemonling de Radreng-templo en Lhasa, la Vivanta Budho Tingkje de Ĉaŝilhunpo-templo en Ŝjegaz, la Ruĝsekta Vivanta Budhino Dojephagmo de Sibding-templo en Ĝjelci, la Sakja-sekta reprezentanto Drungjig-Dojetraethong k. a. La budhistoj esprimis unuanime en la kunveno dankemon al la Ĉina Komunista Partio kaj la Popola Registaro pro la donita politiko de libero en religia kredo kaj pro la aranĝo por bona protektado de budhistaj temploj kaj antikvaj kulturaj objektoj. Ili severe refutis, per siaj propraj travivaĵoj kaj abundaj faktoj, al la imperiistoj kaj la fremdlandaj reakciuloj kiuj kalumniis ke la Ĉina Komunista Partio detruis religion en Tibeto. La kunveno fine aprobis la rezolucion alvokantan ke ĉiuj budhistoj en Tibeto plifirmigu la unuiĝon de la budhistaj rondoj, bone efektivigu la politikon de libera religia kredo de la registaro, aktive partoprenu la kam-

panjon de socia reformo kaj kontraŭimperiisma kaj patriota agadoj, lernadu ĉiujn leĝojn kaj politikojn de la Ĉina Komunista Partio kaj la Popola Registaro kaj dediĉu siajn fortojn por konstrui la novan demokratian kaj socialisman Tibeton.

Nova progreso de "konstrubloka" ilmaŝino

"Konstrubloka" ilmaŝino el simplaj malmultaj maŝinpecoj sed povanta formi plurajn specojn da ilmaŝinoj kreita en Ĉinio estas pli vaste uzata en diversaj laboroj. Jam de la unuopa maŝino ĝi sin disvolvis en serion da tiaj maŝinoj kaj oni faris laŭ ĝi ankaŭ etan maŝinon bezonatan en la vilaĝoj. Tia maŝino konsistas el 9 maŝinpecoj, kaj povas formi laŭbezzone 7 specojn de ilmaŝinoj. Ĝi povas esti uzata ankaŭ en meza riparado de traktoroj kaj por fabrikado aŭ riparo de diversaj agrikulturiloj. Lastatempe oni ankaŭ elfaris liliputan ilmaŝinon konstrublokan, kiu pezas malpli ol duontunon kaj kapablas fari 13 specojn da metala prilaboro. Ĝi estas movebla por plenumi riparlaborojn diversloke.

Stereoskopa filmo projekciebla en ordinaraj kinejoj

Antaŭ nelonge la "Filmproduktejo Unua de Aŭgusto" produktis stereoskopan filmon pro-

jekcieblan en ordinaraj kinejoj. Ĝi estas dokumenta filmo titolita "Printempo en Pekino". La filmo enhavas tri partojn: La unua parto estas la imponaj scenoj de la 10 grandaj konstruaĵoj en Pekino; la dua parto estas la elstaraj fragmentoj de la prezentadoj de Ĉina Akrobata Trupo; kaj la tria parto estas la unua kaj dua scenoj de la fama baleto "Societo de glavetoj" prezentitaj de la Ŝanhaja Eksperimenta Opera Instituto.

Ĉie floras popolaj elementaj lernejoj en Tibeto

Rimarkindan sukceson atingis la alta tajdo de la tibeta popolo por establi elementajn lernejojn. Laŭ nekompleta statistiko de la Kultur-eduka Fakoj de la Prepara Komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, nun en la tuta regiono nombriĝas jam proksimume 2,000 elementaj lernejoj fonditaj de la popolo mem. La nombro de la akceptitaj geknaboj superas 30,000. Ĉu en urboj, ĉu en vilaĝoj kaj ĉu en paŝtaj areoj, plejparto el la infanoj de la kamparanoj kaj paŝtistoj neniam povintaj viziti lernejon ekde iliaj prapatroj nun frekventas elementajn lernejojn. En la regionoj de Lhasa kaj montsudo troviĝas jam lernejoj en ĉiuj vilaĝoj. 95% el la infanoj en Lhasa atingintaj lernejan aĝon ĝuas edukadon en la lernejoj.



Pro unu bovino — novelaro el Vjetnamio, 272 p., formato: 13 × 19 cm., prezo: 4.08 rubloj aŭ 0.282 US\$. Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio.

Tiu ĉi libro kun pli granda amplekso kaj pli alta literatura valoro estas nova kontribuo de niaj vjetnamaj kamaradoj. Ĝi enhavas 19 elektitajn novelojn kaj raportojn de 18 verkistoj pri la militrezistado de Vjetnamio kontraŭ la francaj koloniistoj kaj iliaj lakeoj. Oni ne devas ilin rigardi fikciaj, ĉar la verkintoj mem partoprenis la heroajn batalojn, kaj iliaj literaturaj verkoj estas teksitaj el realaĵoj.

La noveloj lerte bildigis al la legantoj, kiel la vasta laboranta popolo de Vjetnamio malamegas la koloniistojn, kiel ĝi unuiĝas malgraŭ la malsamaj religiaj kredoj, la diverseco de nacioj, la diferenco de seksoj kaj aĝoj por kontraŭbatali kaj forpeli la malamikojn. La libro havas tre realan sencon speciale nun, kiam urĝiĝas la tasko defendi la pacon kaj batali kontraŭ la nova koloniismo, kiu servas kiel nova armilo de la imperiistoj, precipe la usonaj, por meti denove la liberigintajn popolojn en Azio, Afriko kaj Latinameriko sub siajn jugojn. El tiuj noveloj oni povas klare vidi, ke la popolo decidas ĉion, sed ne la koloniistoj, kvankam la lastaj havas pli da soldatoj, armiloj kaj ekipaĵoj. Kaj la legantoj en la okcidentaj kapitalismaj landoj ankaŭ povas kompreni, kontraŭ kiuj ili defendu la pacon: ĉu kontraŭ la popoloj leviĝantaj por sin liberigi el sub la koloniismo kaj ekspluatado? ĉu kontraŭ siaj samlandanaj koloniistoj, kiuj daŭre trudadas ankoraŭ nun la subpremadon kaj ekspluatadon al la t. n.

ne-progresintaj landoj aŭ la samon daŭrigas sub alia kamuflo? (H. F.)

Vortaro Esperanta-Vjetnama — formato: 13 × 19 cm., 318 p., kompilita de Quóc Te Ngū kaj eldonita de V. P. E. A. Hanojo, Vjetnamio.

Ĝi estas la unua vortaro Esperanta-Vjetnama kiun mi vidis. La bindo estas fortika kaj la preso klara.

Tiu ĉi vortaro estas, laŭ ĝia antaŭparolo, kompilita verŝajne sur la bazo de la jenaj tri vortaroj: Plena Vortaro de Esperanto, Plena Vortaro Esperanta-Ĉina kaj Dictionnaire Complet Français-Esperanto.

Mi trovis ĝin bona, precipe en la elekto de vortoj kaj ekzemploj kiuj ne nur povas komprenigi la uzon de la vortoj, sed ankaŭ donas modelojn por frazokonstruado al la lernantoj de Esperanto.

Tamen en la vortaro mi trovis kelkajn dubojn kaj eraretojn: Kial la partoj C kaj Ĉ estas kunmetitaj en unu parton kaj por la parto D eĉ mankas la indika litero? La vortoj *absolut-ismo*, *prevent-ejo*, *prevent-ilo* laŭkutime estas rigardataj kiel derivaĵoj, sed ĉitie presiĝas kiel apartaj radikoj. *Aerobia* estas aparta vorto, sed en tiu ĉi vortaro ĝi estas metita sub la radiko "aer". *Ig* kaj *ig-i* estas sennecese metitaj kiel du apartaj vortoj. En multaj lokoj vortoj kun literoj "ĝ" kaj "g" estas mislokitaĵoj. Espereble la supremenciitaj punktoj estos korektitaj en estontaj eldonoj. (Zensto)

Antologio de Portugalaj Rakontoj — kompilita de Manuel de Seabra kaj eldonita de "Grupo de Admirantoj de Zamenhof" por memorfesti la centjaron de Zamenhof. Formato 12 × 19 cm., 215 plus 6 p., broŝurita.

Tiu ĉi libro donis al mi grandan ĝojon, tuj kiam mi legis ĝian titolon. Ĉar verkojn el portugala literaturo mi apenaŭ konis. Ili estas tiel mal-

multe konigitaj en nia lando, kaj mi esperis, ke tiu ĉi libro iel kovros la mankon. Tian esperon nutris precipe tio, ke ĉiuj 14 rakontoj en la antologio estas verkoj de nuntempaj verkistoj. Ja estas pli grave, koni la nunan Portugalion ol la historian! Ni devas konfesi, ke la espero ne min trompis. Mi ricevis el la rakontoj bildon pri Portugalio tute freŝan, drastan kvankam iom neatenditan. Mi scias, ke en lando regata sub militarista diktaturo oni ne povas trovi popolon feliĉan kaj ĝojplenan. Sed mi ne atendis, ke la portugala popolo troviĝas en tia mallumeco, kian rakontis la verkoj en la antologio: Oni trovas ĉe la vivantoj enuiĝon, ĉe la suferantoj senesperon, kaj al socia justeco pesimismen — unuvorte, perspektivon seneliran. Verŝajne la verkistoj, malgraŭ de malsamaj literaturaj skoloj kaj vidpunktoj, veve kaj iasence bone respogulis kaj bildigis la mizeron, la subpremitecon kaj la torditajn figurojn de simplaj homoj sub tia subpremo. Sub plumoj de la verkistoj oni aŭdas malkontentecon, grumbladojn kaj agonion de la suferantoj, kvazaŭ ili vivus sub vulkano tuj erupcionta kaj la situacio ŝajnas al ili senespera kaj senelira.

Eble la verkistoj nur fidele respogulis tion kio ilin impresis kaj ne ĉiuj klare konsciis kion tio signifas. Tamen, ĉu ne ĝuste el la agoniado de la herooj oni rajtas kredi, ke tie akumuligigas, kolektiĝas kaj kreskas forto eksplodiga de la brava portugala popolo por rompi al si la ŝajne nerompeblan katenon. Sed, bedaŭrinde neniu el la aŭtoroj trovis por siaj herooj ian luman elirejon.

La tradukoj ne ĉiuj estas egale bonaj, sed ĝenerale ili estas fluaj, kaptivaj kaj ŝajne fidele redonis la spiriton de la originaloj. Nur tro iniciatemaj estas kelkaj el la tradukintoj, ke ili enkondukis en la libro tro multe da nekutimaĵoj. ekz-e: *tempas*, *horas*, *junulas*.

transis, kvazaŭas ankoraŭas, pluis, ktp., kaj kunmetaĵojn de tuta frazo kiel *minescias* aŭ uzis tutan frazon (sen subjunkcio) kiel prepozician komplementon, ekz-e “laŭ ŝia frato diris”. (H. F.)

Esperanta Resumo de la Stenologio kaj Stenografio de Prof. Delfi Dalmau — 15-paĝa broŝureto kun formato 12 × 15.3 cm. Prezo: 2 resp. kuponoj. Fonetika sistemo de stenografio aplikebla al Esperanto kaj al la angla, franca kaj germana lingvoj. Ĝi certe interesas la esperantistajn stenografistojn. Laŭforme la stenografiaĵoj havas tro multe da akutaj anguloj, kiuj verŝajne ne tre helpas al alta rapideco en la skribado. Krome la strekoj estas diferencigitaj je dikaj kaj maldikaj. Ankaŭ tio malhelpas la uzon de fontplumoj. (H. F.)

Dio Rekompencu Vin — triakta komedio de Joracy Camargo, esperantigita de Sylvio, 18.5 × 13 cm., 172 p. Eldonita de Kultura


Kooperativo de Esperantistoj, Brazilo. Prezo: 150 Cr.

Laŭ la prezento de la tradukinto, tiu ĉi komedio (pli ĝuste ia tragedi-komedio) estas eldonita jam 20 fojojn en Brazilo kaj ludita pli ol ok mil fojojn. Do tre sukcesa verko ĝi estas, kaj por ĝia sukceso kontribuis interalie “la originaleco kaj socia tendenco de la temo, la filozofio kaj psikologia observokapablo, kun kiu la aŭtoro malkaŝe pritraktis iujn individuajn kaj sociajn moralajn problemojn, la moderna tekniko en la prezentado de la scenoj, la brileco kaj spontaneeco de la dialogoj, la kunfandiĝo de komedio kun tragedio.” La verko prezentis al ni la abomenindan bildon de la kapitalisma socio, en kiu “La kapitalistoj nenion inventas. Ili profitas de la aliulaj inventoj: homoj senutilaj, kiuj tamen el ĉio faras al si utilon!”, “La laboristo estas senigita je tio, kion li produktis. . .”, “almo-

zuloj. . . ekzistas ĉie!”, “la egoistoj (la kapitalistoj!), kiuj, sciante, ke la Naturo donis al ĉiuj la saman vivon, kun la samaj bezonoj, tamen malpermesas al la plimulto kontentigi tiujn bezonojn”, kie “jam ne ekzistas estonteco”, kie por juna virino “socia pozicio (de junulo) estas malpli alloga ol la riĉeco de maljunulo. . .”, kie friponojn kaj rabantojn oni renkontas je ĉiu paŝo. Maljustecon kaj mizeron de la kapitalisma socio, la verkinto malkaŝis al ni, grumblis kontraŭ ĝi, sed ne trovis ĝustan eliron el la terura labirinto, ĉar li ne vidas, ke la maljustaĵoj kaj mizeroj de la kapitalisma socio devenas de tiu plej kruela ekspluatata sistemo, kaj la laboranta popolo en ĝi povas sin savi de tio nur per ĝia forigo.

La esperanta traduko estas flua kaj bonstila. Preserarojn oni apenaŭ povas trovi.

(Li Ŝizun)



* **Jonanes kaj Raja Palu**, Tallinn-Nõmme, Sõlme 21, Estonio, USSR. Geedzoj dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉinaj geamikoj. Ankaŭ por siaj studrondanoj en mekanika uzino k-do **Joh. Palu** serĉas korespondantojn el a tuta mondo.

* **La Kultur-Palaco de Maristoj** (E-rondeto) kun maristoj el Azio, Afriko, Sudameriko, Sudeŭropo pri fakaj k. a. temoj, interŝ. revuojn, pk. il., librojn: USSR Odessa, PK 256.

* Laborista sindikato de metalurgia uzino en Japanio aperigas daŭran Esp-kurson sur sia organo. Gratulojn kaj instigojn al la membroj kaj la redaktoro, adresu al: **Kyuŝu Esperanto-Ligo, Suehiromati 2-16, Yawata, Japanio.**

* **Podŝuvejt V. V.** Dram-rondetgvidantino. Nur kun junpioniroj.

USSR, Luga, Leningrada distrikto, Prosp. de Kirov No. 40, Domo de Pioniroj.

* 28 gecirkanoj ĉe **Valentin Frolov**, glavpoĉtamt, dovostrebovanija, g. Alma-Ata, Kaz. SSR. USSR kun la tuta mondo pri ĉt.

* **Baskomflot** (Profsindikato marista en Odessa) pri profsindikataj, maristaj k. a. temoj. USSR. Odessa, Primorskij bulvar, 3. Baskomflot. Prez. **k-do Bakurskij.**

* “**Studenta Klubo de Internacia Amikeco**” helpas studi Esperanton kaj rusan lingvon per kor., kolektas k dissendas ilustraĵojn por E-ekspozicioj. Adr. Esperanto-Klubo, Pedagogia Instituto, str. Marksa 64, Ĥabarovsk, USSR.

* **Herman Liebelt**, Magdel-str. 91. en Jena, DDR (Germanio) kun ĉinaj k orientaj geesp-istoj pri ĉt, interŝ. ankaŭ bk, pm kaj Esp-revuojn ktp.

* **Nguyêñ thúy Cáu**, lernantino 17 j. adr: 208 strato Lõ. Duć, Hanoj, Vjetnamio.

* **Nguyêñ Iê Thúy**, lernantino 20 j. adr: 208 strato Lõ. Duć Hanoj,

Vjetnamio, kun gejunuloj el USSR, Bulgario, Ĉinio, Pollando, Hungario, Francio, Germanio, Ĉeĥoslovakio ktp.

* **D-ro Mihail Adjarov**, str. Maksim Gorki 8, Plovdiv-Bulgario, dez. interŝ. pm. kun Ĉinio kaj aliaj landoj de Azio.


* **Aleksandro Tauŝćuk**, str. Ghenadie Petresku 43, Bukaresti 23, Rumanio, k. interŝ. pm., revuojn.

* **Koliu Petkov Kânćev**, vilaĝo Tepava, Okr. Loveŝki, Bulgario; dez. kor. kun ĉl. pri ĉt. k interŝ. pm., pk. k E-literaturon.

* **Hans Flassbeck**, Postfako, Mozartstr. 49, BONN, Okc. Germanio; dez. kor. kun orientlandaj esp-istoj.

* **Nijazi Ĥjuseinov**, str. Radecki 8, Kirĝali, Bulgario; dez. kor. kun orientlandaj es-istoj pri literaturo, kultura k lerneja vivoj, scienco, pedagogio ktp.

* **Ivan Georgiev Savor**, str. “Volga” 38, Plovdiv, Bulgario dez. kor. pri ĉt.



VIGLAS LA SKULPTILOJ de Novĉiniaj Skulptistoj

1. Vigla kreado en la Ĉina Skulptaĵo-produktejo.
2. Ding Hiejin, artistino en la Ĉina Skulptaĵo-produktejo prilaboranta sian verkon "La Afrika Virino Batalas por Sendependeco kaj Libero".
3. Ĝang Ginghu, majstro de argilaj modlajoj, vizitis al nacimalplimultoj en Junnan-provinco, kaj post tio li kreis la argilan modlajon "Apreco de Katuno" kiu spegulas la feliĉan vivon de taj-nacio.
4. Subigo de Drako (Unu el la multnombraj skulptaĵoj de la kamparano-artisto He Ĝan-aŭ)
5. He Ĝan-aŭ estas talenta kamparano-artisto, kiu kreis, kuraĝigate kaj subtenate de la Partio, centojn da skulptaĵoj ĉe iu akvokonserva konstruejo por kuraĝigi siajn labor-kunulojn. Jen la prikantanto de laboro skulptas buston de la ruĝflago-instruistino Li Ginglan.



